# FRONTE AL LA VIVO

# EDUKO KAJ VIVSIGNIFO

Jiddu KRISHNAMURTI

SAT-Broŝurservo / Laŭte!
FR 47470 Beauville
1998

# FRONTE AL LA VIVO

Jiddu KRISHNAMURTI

**SAT-Broŝurservo / Laŭte!**
F 47470 Beauville
1990



# ENKONDUKO

En nia epoko, kiam kreskadas la krizoj kaj la mondaj problemoj, necese kaj urĝe estas malkovri novan moralon, novan sintenon kaj novan agad-manieron, kuŝantajn sur la kompreno pri la tuta procezo de niaj vivoj. Nuntempe oni klopodas malimpliki la kolektivajn aferojn per metodoj, politikaj organizoj, ekonomiaj reĝustigoj, reformoj, kiuj neniam solvos la komplikegajn malfacilaĵojn starigitajn de la homa ekzisto, kaj kiuj povos nur mallongtempe ilin malpezigi. Ĉiu reformo, kiel ajn profunda kaj daŭra ĝi ŝajnas, estas nur kaŭzo de novaj konfuzoj, kiuj, siavice, postulos novajn reformojn. Se oni ne komprenos la tutecon de la homo en ties komplikeco, simplaj sociaj korektigoj povos estigi nur novajn konfuzajn postulojn kaj tiel plu, senfine, ĉar sur tiu vojo ne ekzistas ĝisfunda solvo.

Ankaŭ ne la politikaj, ekonomiaj kaj sociaj revolucioj alportas tiun solvon. Ili naskis terurajn tiranecojn aŭ nur transdonigis la potencon kaj la aŭtoritaton de unu grupo al alia. Neniam ili estos solvo al niaj malordoj.

Sed ekzistas tute alia revolucio, kiu nepre okazu, se ni volas liberiĝi el tiu senfina sinsekvo de zorgoj, konfliktoj, senigoj, en kiu ni enŝlimiĝis. Kiel deirpunkton tiu revolucio ne havu ideojn kaj teoriojn, kiuj ĉiel montriĝus senvaloraj. Ĝi konsistu en ĝisradika transformo de la konscienco; ĝi povas okazi nur per edukado orientita al la plena disvolviĝo de la homo; ĝi devas renversi ne nur la penson, sed la tutan konsciencon. La penso estas ja nur rezultato, ne fonto, kaj estas ja la fonto, kiu devas esti ĝisradike transformita. Nuntempe oni korektas nur la kon-

sekvencojn, kuracas simptomojn; oni nenion ĝisfunde ŝanĝas, oni ne elradikigas la malnovajn pensmanierojn, oni ne liberigas la spiritojn el iliaj tradicioj kaj el iliaj kutimoj. Laŭ mi, devas esti nia ĉefa zorgo tiu ĝisfunda ŝanĝiĝo kaj al ĝi celi devas ĉiu edukado.

La funkcio de l'spirito estas informiĝi, lerni. Tio ne signifas kulturi la memorkapablon aŭ amasigi sciojn; lerni estas la kapablo pensi klare, sane, seniluzie; konstati faktojn sed ne teoriumi per kredoj kaj ideologioj. Kiam la penso kuŝas sur konkludoj, oni nenion lernas. Akiri informojn kaj sciojn, tio ne estas lerni. Lerni estas ŝati kompreni kaj ŝati fari ion, tiu lo mem; kio eblas nur se la spirito estas submetita al neniu ajn premdevigo. Kaj la premdevigoj havas multajn aspektojn. Estas la premdevigo de la influoj, tiu de la korligiteco, tiu de la minacoj, tiu de la persvadaj kuraĝigoj, tiu de la subtilaj rekompencformoj.

Oni ĝenerale opinias, ke la komparo instigas lerni. La malo veras, ĉar ĝi naskas frustraciojn kaj instigas nur ian formon de ĵaluzo, kiun oni nomas konkurado. Same kiel ĉiu persvado, la komparo malhelpas lerni kaj naskas la timon. Ankaŭ la ambicio naskas la timon. Ĉu persona, ĉu identigita al kolektivo, ĝi ĉiam estas kontraŭsocia. En la sociaj rilatoj, la ambicio, laŭdire nobla, estas fundamente detrua.

Necesas kuraĝigi la disvolviĝon de la spiritoj, por ke ili kapablu fronti al la vivo en ĝia tuteco, ne fuĝi la aperantajn malfacilojn, por ne perdiĝi en internaj kontraŭdiroj, por ne senti sin frustraciitaj, por ne fariĝi amaraj aŭ cinikaj. Tiucele gravas, ke tiuj spiritoj konsciu pri sia kondiĉigo, pri siaj motivoj kaj siaj instigiloj.

Ĉar tiu disvolviĝo estas nia ĉefa celo, tre gravas starigi la demandon pri edukado. La tutecon de l'spirito oni devas kulturi; oni ne povas kontentiĝi, disdonante informojn. Dum li transdonas sciojn, la edukanto devas instigi al diskutado kaj kuraĝigi la lernantojn informiĝi kaj pensi sendepende.

La aŭtoritatulo kiel "ulo-kiu-scias" ne havas lokon en la instruado. La profesoro kaj la studanto ambaŭ devas

kapabli lerni en siaj interrilatoj, kio ne signifas, ke la unua povas permesi al si pensi sen ordo kaj sen metodo. Sed tiu metodo ne estas tiu de disciplino trudata de la certeco de la akiritaj scioj. Ĝi estas la natura konsekvenco de la libersento naskita de la disvolviĝo de la inteligento. Ĝi ne permesas al la lernanto fari ĉion laŭplaĉe aŭ memvole sin loki en kontraŭdiron; ĝi devas helpi lin ekkonscii pri la profundaj deziroj, kiujn povas ĉiutage montri al li liaj agoj kaj liaj pensoj.

Neniam liberas spirito, kiun oni disciplinas. Ĝi ne povas esti libera, kiam ĝiaj deziroj estas subpremitaj; libera ĝi povas esti, nur kiam ĝi ekkomprenas la tutan procezon de l'deziro. Ĉiu disciplino limigas la spiriton al moviĝo retenata en kadro de pens- kaj kred-sistemo, tiel ke ne estas permesate al ĝi esti inteligenta. Sin disciplini estas submetiĝi al aŭtoritato, do kapabligi sin agi laŭfunkcie interne de socia armaturo. Tiu ĉi uzas la funkcian lerton, sed ne vekas inteligenton, kiu disvolvus siajn proprajn kapablojn. La spiritoj, kiuj kulturis nenion alian ol kapablojn bazitajn sur memoro, similas al komputoroj, kiuj, kvankam mirigaj pro sia lerto kaj precizo, tamen restas nuraj maŝinoj. Aŭtoritato povas orienti nian penson en apartan direkton. Sed ricevi gvidadon por pensi iamaniere, aŭ laŭ terminoj de donita konkludo, tio estas tute ne pensi sed funkcii kiel homa maŝino kaj droni en senpripensa malkontento, en malfeliĉa stato, kiu entenas frustracian senton.

Kio gravas por ni, tio estas, ke ĉiu homo povu plene disvolviĝi. Endas helpi lin plene realigi siajn plej altajn kapablojn, kaj ne ian fiktivan kapablon, kiun la edukanto povus celi kiel koncepton aŭ idealon. Ĉiu komparemo malhelpas la maturiĝon de la individuo, ĉu temas pri scienculo, ĉu pri ĝardenisto. La plena kapablo de ĝardenisto estas la sama kiel la plena kapablo de scienculo, kiam ne estas komparo. Sed tuj kiam oni komparas, tiam ekrolas la malŝato kaj la ĵaluzaj reagoj, kiuj estigas konfliktojn interhomajn. Same kiel la doloro, la amo ne estas kompara; oni ne povas ĝin kompari al pli aŭ al malpli granda ol ĝi. Doloro estas doloro, amo estas amo, tiel ĉe la malriĉulo kiel ĉe la riĉulo.

Ĉies plena disvolviĝo kreus socion de egaluloj. La nuntempa socia batalo cele al ekonomia aŭ spirita egaleco havas nenian signifon. La sociaj reformoj celantaj la egalon naskas novajn kontraŭsociajn agadojn, sed per bone orientita edukado oni tute ne bezonus celi egalecon tra iu reformo, socia aŭ alispeca, ĉar kiam ĉesas ĉiu komparo inter kapabloj, tiam malaperas la ĵaluzo.

Necesas distingi inter kapablo kaj socia pozicio. Ĉi-lasta, kun sia hierarkia kaj emocia prestiĝo, ekzistas nur kiam oni konsideras, ke iuj funkcioj estas pli altaj ol aliaj. Se ĉiu individuo florus en la pleneco de siaj kapabloj, oni ne komparus inter la funkcioj, oni simple havus esprimojn de malsamaj kapabloj, kiel instruisto, ĉefministro aŭ ĝardenisto, kaj la sociaj situacioj ne plu estigus la mordon de ĵaluzo.

La funkciajn aŭ teknikajn kapablojn oni hodiaŭ taksas per la titoloj, kiuj akompanas la personan nomon; sed ĉar interesas nin la plena disvolviĝo de la homo, ni ekkonsideras la aferon laŭ tute malsama vidpunkto. Tiu, kiu havus tian kapablon, povus, laŭ sia gusto, akiri diplomon aŭ universitatajn titolojn, sed li tre konscius pri siaj realaj kaj profundaj ebloj, kiuj povus ne tute konformi kun liaj titoloj, kaj kies esprimo ne naskus do tiun egocentrisman malhumilon, kiu akompanas simplan teknikan kapablon. La persona manifestiĝo en la funkcio estas kampariga, do kontraŭsocia. La komparo povas havi utilan rolon, sed la rolo de la profesoro ne estas kompari inter la kapabloj de la lernantoj nek ilin taksi.

Ĉar nia ĉefa celo estas la plena disvolviĝo de la individuo, tial ni opinias, ke en la komenco oni ne permesu al la lernanto elekti siajn temojn, ĉar lia elekto verŝajne dependus de la momenta humoro, de antaŭjuĝoj, aŭ de iuj facilaĵoj, kiujn li povus havi. Li ankaŭ povus klopodi nur kontentigi iujn tujajn dezirojn. Oni devus helpi lin malkovri per si mem kaj kulturi siajn denaskajn emojn; tiam li spontane elektus ne la plej facilajn temojn, sed tiujn, en kiuj povus pleje esprimiĝi liaj propraj kapabloj. Se oni de la komenco gvidas la lernanton konsideri la vivon en ties

tuteco, kun ties psikaj, intelektaj kaj emociaj problemoj, li ne timos ĝin.

La inteligento estas la kapablo fronti al la vivo en sia tuteco. Doni noton, tute ne ebligante la manifestiĝon de tia inteligento, malnobligas la homan dignon. Tiu kompara taksado kripligas la spiriton. Evidentas, ke la mastro ne povas rezigni siajn observojn. Siaflanke la gepatroj volas ricevi pri tio informojn per raportoj; sed se, bedaŭrinde, ili ne komprenas kion volas fari la mastro, inter iliaj manoj tiuj dokumentoj fariĝas subpremiloj por akiri la de ili deziratajn rezultatojn, kiuj detruas la laboron de l' edukisto.

La gepatroj devus kompreni la signifon, kiun la lernejo volas doni al la edukado. Ĝenerale ili kontentiĝas, vidante la infanojn prepari diplomojn, kiuj certigos al ili vivtenilon. Malmultas tiuj, kiuj interesiĝas pri io pli profunda. Kompreneble, ili volas vidi siajn infanojn feliĉaj, sed krom tiu malpreciza deziro, ili ne multe pensas pri ilia plena disvolviĝo. Ĉar la plimultaj gepatroj deziras precipe, ke iliaj infanoj sukcesu en sia profesio, ili timigas ilin aŭ milde taŭzas ilin, por ke ili akiru sciojn. Tiam fariĝas grava la libro kaj ankaŭ la kulturo de la memorkapablo, kaj tiu tuta ripetado estas senigita je vera pensado.

La granda malfacilo, kontraŭ kiu devas fronti la edukisto, eble estas la indiferenteco de l' gepatroj pri pli vasta kaj pli profunda edukado. Kio interesas ilin, tio estas nur provizi siajn infanojn per kelkaj supraĵaj scioj, kiuj certigos al ili respektindan situacion en koruptita socio. La edukisto devas do ne nur instrui ĝuste; li krome devas atenti, ke la bono, kiun li povas fari en la lernejo, ne estu detruita far la gepatroj. Verdire, la lernejo kaj la hejmo devus esti ĝemeligitaj edukejoj kaj neniam kontraŭstari unu kontraŭ la alia, kiel nun, kiam la gepatroj deziras ion, dum la edukistoj orientiĝas en tute alian direkton. Tre gravas, ke la gepatroj estu tute informitaj pri tio, kion faras la profesoroj, kaj ke ili estu vitale interesataj pri la plena disvolviĝo de siaj infanoj. Zorgi, ke la edukado orientiĝu en tiun direkton es-

tas tiel ilia respondeco kiel tiu de la edukistoj, kies ŝarĝo estas jam sufiĉe peza. Tiu plena disvolviĝo povas okazi nur kiam la rilatoj inter la mastro, la lernanto kaj la gepatroj estas harmoniaj. Ĉar edukisto ne povas cedi al la kapricoj aŭ al la obstino de la gepatroj, tial endas, ke ĉi tiuj komprenu tion kaj kunlaboru kun li, se ne, ili kreas konfuzon en la spirito de la infano kaj estigas konfliktojn.

La natura scivolemo de la infano, lia lernavido, ekzistas jam de la komenco kaj tiu inteligento devus daŭre ricevi kuraĝigojn por fariĝi vivanta, por ke ĝi ne misformiĝu kaj por ke ĝi instigu la infanon studi plej diversajn temojn. Se la infana fervoro estas tiel daŭre kuraĝigata, liaj studoj pri matematiko, geografio, historio, sciencoj, ktp, levos problemojn nek por li nek por liaj profesoroj; kaj li lernos des pli facile, ju pli bone oni scios ĉirkaŭi lin per amema atento.

La infano povas korsente disflori kaj disvolvi sian afekciecon, nur kiam li sentas sin sekura en la rilatoj kun siaj mastroj. Tiu sekursento estas nepra bezono de la infaneco. Ĝin oni ne konfuzu kun la sento pri dependeco. Konscie aŭ nekonscie, granda nombro da edukistoj kultivas ĉe la infano korligitecon, kiu submetas lin. Per tio ili subtile inokulas al li timemon, kiun kultivas ankaŭ la gepatroj per sia konduto, amema aŭ agresema. La infana submetiĝo rezultas de aŭtoritataj aŭ dogmecaj asertoj far la gepatroj kaj la mastroj pri tio, kio la infano devas esti aŭ kion li devas fari. Tiun dependecon ĉiam akompanas la ombro de la timo. Estas la timo, kiu devigas la infanon obei, konformiĝi, senpripense akcepti la dekretojn kaj la sankciojn de siaj pliaĝuloj. En tiu etoso de regateco, la sensivo estas premita; sed kiam la infano scias kaj sentas, ke li estas sekura, tiam la timo ne kontraŭas la floradon de lia kapablo emociiĝi.

Tiu sekursento ĉe la infano ne estas la kontraŭo de malsekureco. Ĝi estas la sento esti komforte, ĉu hejme ĉu en la lernejo; la sento, ke li povas esti si mem sen ajna trudo; grimpi sur arbon sen esti riproĉata se li falos. Tiun sekursenton li povas havi nur se la gepatroj kaj la edukistoj profunde priatentas lian plenan bonstaton.

Gravas, ke en lernejo la infanoj sin sentu komforte kaj tute sekure tuj de la unua tago. Plej gravas la unua impreso. Sed se la edukisto provas artifike, per diversaj rimedoj, kapti la konfidon de la infano, permesante al li agi laŭ sia propra volo, fakte li subordigas lin, li ne donas al li sekuron, ĉar la infano ne havas la impreson troviĝi en loko, kie personoj profunde interesiĝas pri li.

La tute unuaj kontaktoj en nova medio, bazitaj sur konfido, kiun la infano eble ankoraŭ neniam travivis, stargigos naturajn interŝanĝojn inter li kaj liaj pliaĝuloj, kiuj por li ne reprezentos minacon. Kiam la infano ne havas timon, kiam li sentas sin en sekuro, li havas propran manieron esprimi sian respekton. Respekto estas esenca faktoro en la instruado, sed kondiĉe ke ĝi estu senigita je aŭtoritato kaj timo. Kiam la infano sentas sin en sekuro, lia konduto - aŭ lia sinteno - estas ne trudita de liaj pliaĝuloj, sed konsistiga ero el la procezo per kiu lernas la infano. Sin sentante komforte en siaj rilatoj kun siaj mastroj, la infano havas naturan estimon por ili kaj, ĉar disfloras lia afekcieco, li ekkonscias pri tio, kion konvenas fari, plu sentante sin libera entrepreni tion, kio plaĉas al li. Lia sinteno estas nek la rezulto de rezisto, de obstino, aŭ de subpremo, nek la esprimo de momenta impulso.

Havi sensivon, tio estas esti sensiva al ĉio nin ĉirkaŭanta: al la plantoj, al la bestoj, al la arboj, al la ĉielo, al la riverakvo, al la birdo, ankaŭ al la humoro de la homoj, al la preterpasanta fremdulo. Tiu sensivo naskas, responde al la ekstera mondo, nekalkulitan, ne egocentran sintenon, moralan en la vera signifo de tiu vorto. Sensiva, la infano, tute ne kaŝema, estos malfermita al la mastraj sugestoj, kiujn li facile akceptos, sen rezisto kaj skuo.

Ĉar celas oni la plenan disvolviĝon de la homo, oni devas kompreni liajn emociajn impulsojn, kiuj estas ĉiam pli fortaj ol la intelektaj rezonadoj. Endas do kultivi liajn emociajn kapablojn kaj ne helpi lin subpremi ilin. Se oni komprenas la mondon de la emociemo kaj ke oni tial povas konsideri ĝiajn problemojn tiel bone kiel la intelektajn problemojn, oni ne plu timas ilin ektrakti.

Por la plena disvolviĝo de l' homo, necesas la soleco, kiel rimedo kultivi la sensivon. Endas scii kion signifas esti sola, kion signifas mediti, kion signifas morti, kaj la implicoj de l' soleco, de l' meditado, de l' morto, povas esti konataj, nur se oni serĉas ilin. Oni povas ricevi indikojn, sed lerni kion oni indikas al vi, tio ne estas travivi mem la solecon aŭ la meditadon. Por travivi tiujn spertojn, oni devas esti en demanda stato. Nur la demandanta spirito kapablas lerni. Kiam la esplorado estas forigita per antaŭaj scioj, aŭ per aŭtoritato, aŭ per alies spertado, lerni estas nur imiti, kaj imitado igas la homan individuon ripeti kion li lernis, sen travivi ĝin.

Instrui estas ne nur disdoni sciojn, sed ankaŭ kultivi la spiritan scivolemon. Tiel esplorema spirito penetros en la religian demandon kaj ne limigos sin akcepti unu el la organizitaj religioj kun ties temploj kaj ties ritaro. Celi Dion, la Veron - malmulte gravas ka vorto - kaj ne kontentiĝi akceptante kredojn kaj dogmojn, jen kio estas la vera religio.

Same kiel la lernanto ĉiutage brosas siajn dentojn, sin banas ĉiutage, ĉiutage lernas ion novan, devus esti la ĉiutaga agado trankvile sidiĝi kun aliaj aŭ tute sole. Tiun solecon oni povas nek instrui, nek trudi per la aŭtoritato de tradicio, nek praktikigi sub la influo de tiuj, kiuj volus sidiĝi en la kvieto, sed ne kapablas esti solaj. Soleco helpas la spiriton vidi sin hele kiel en spegulo, liberigi sin el la vanaj strebadoj de la ambicio kaj de ĉio ĝin akompananta: ĝiaj komplikaĵoj, ĝiaj timoj kaj la frustracioj, kiujn naskas la egocentra agado. Soleco donas al la spirito ian stabilecon, ian konstantecon, kiun oni ne povas taksi per daŭroterminoj. Tiu heleco estas la karaktero. La manko de karaktero estas stato de interna kontraŭdiro.

* * *

Havi sensivon estas ami. La vorto ami ne estas la amo. La amo ne estas dividebla en amo al Dio kaj amo al la homo, nek mezurebla kiel amo por unu persono aŭ por la tuta homaro. La amo donas sin en abundo, kiel floro donas sian parfumon. Sed oni ĉiam mezuras ĝin en la homaj rilatoj kaj tiel oni ĝin detruas.

Amo ne estas varo por reformantoj aŭ politikistoj; ĝi ne estas politika instrumento uzebla por krei agadon. Kiam la politikisto kaj la reformanto parolas pri amo, ili uzas la vorton kaj tute ne ekkontaktas kun la realo, ĉar la amo ne estas utiligebla kiel rimedo por atingi proksiman aŭ malproksiman celon. La amo apartenas al la tuta Tero, ne al iu kampo aŭ al iu arbaro. La amon de la realo monopoligas neniu religio, kaj kiam la organizitaj religioj uzas ĝin, ĝi ĉesas ekzisti. La Socioj, la organizitaj religioj, la aŭtoritataj registaroj, per siaj diligentaj aktivaĵoj, nekonscie detruas la amon, kiu povus fariĝi pasio en ago.

En la plena disvolviĝo de l' homo, kiun kreas ĝusta edukado, la am-kvaliton oni devas nutri kaj subteni jam de la unuaj paŝoj. Amo estas nek sentimentaleco nek pieco. Ĝi estas tiel forta kiel la morto. Ĝin oni ne povas aĉeti per scioj; la spirito, kiu sen amo celas sciojn, estas kruela, celas nur la efikecon.

La edukisto devas do tuj de la komenco zorgi pri tiu am-kvalito, kiu estas humilo, afablo, estimo, pacienco kaj ĝentilo. Modesteco kaj ĝentilo estas naturaj ĉe la ĝuste edukita homo. Li estimas ĉion, inkluzive la bestojn kaj la plantojn, kaj tion spegulas lia sinteno kaj lia parolmaniero.

Akcenti tiun am-kvaliton liberigas la spiriton, kiun absorbis la ambicio, la avido, la akiremo. Ĉu amo ne enhavas en si ion rafinitan, kiu esprimiĝas per respekto kaj bongusto? Ĉu ĝi ne kaŭzas emon orgojle rigidiĝi? Konduta rafineco ne estas io, kiun oni trudas al si, nek rezultas el eksteraj postuloj; ĝi spontane aperas, kiam ekzistas tiu am-kvalito. Kiam oni komprenas kio estas amo, ĉiuj komplikaĵoj kaj subtilaĵoj de la homaj interrilatoj - inkluzive de la seksaj rilatoj - povas esti ektraktataj sane, sen agitiĝo kaj sen timo.

La edukisto, por kiu plej gravas la plena disvolviĝo de la individuo, devas kompreni la implicojn de la seksaj bezonoj, kiuj ludas tiel grandan rolon en niaj vivoj, kaj li devas kapabli fronti de la komenco al la natura scivolo de la infano, sen estigi malsanecan interesiĝon. Sin lim-

igi, liverante biologiajn informojn al la adoleskantoj, povas instigi ilin al seksaj eksperimentoj, dum la amo ne estas sentata. La amo purigas la malbonon. Sen amo kaj komprenemo far la edukisto, kontentiĝi apartigante knabojn disde knabinoj per pikdratoj kaj dekretoj, povas nur stimuli ilian scivolon kaj veki pasion, kiu povus degeneri en ĝuavidon. Tre gravas do, ke knaboj kaj knabinoj estu edukataj kune sur sanaj bazoj.

Tiu am-kvalito devas esprimiĝi per manlaboro kiel ĝardenado, lignaĵarto, pentrarto, metiarto, kaj per edukado de la sensoj; ekzemple, lerni kiel vidi la arbojn, la montarojn, la Ter-riĉaĵojn, la malriĉecon, kiun la homoj kreis inter si, kaj kiel aŭskulti la muzikon, la birdajn kantojn, la murmuron de la rapidakvoj.

Kio gravas por ni, tio estas ne nur kiel kulturi la spiriton kaj veki la emoci-sensivon, sed ankaŭ kiel atingi ekvilibran korpan disvolviĝon, kaj ni devas dediĉi al tio multe da pripensado, ĉar se la korpo ne estas sana kaj tre vivanta, ĝi neeviteble deformas la penson kaj tendencas al nesensivo. Estas tiel evidenta tiu punkto, ke ne utilas detale ĝin ekzameni. Necese estas, ke la korpo bonfartu, ke oni donu al ĝi la konvenan nutraĵon kaj ke ĝi ĝuu sufiĉe da dormo. Se la sensoj ne estas akrigitaj, la korpo baros la plenan disvolviĝon de l' homo. Por havi graciajn movojn kaj ekvilibran mastrecon super la muskoloj, oni devas praktiki variajn ekzercojn, dancon kaj ludojn. Misflegita, mola korpo, kiu ne staras en ĝustaj pozicioj, ne favoras la sensivon de la penso kaj de la emocio. La korpo ne estas la instrumento de la konscienco; la korpo, la emociaco kaj la penso konsistigas tutaĵon, kaj se ili ne vivas kune en harmonio, konflikto en la homo estas neevitebla.

Ĉiu konflikto igas sensenta. La penso povas superregi la korpon kaj subpremi la sensojn, sed tiel ĝi igas la korpon sensenta, kaj ĝi fariĝas obstaklo al la ekflugo de la konscio. La korpa turmentado neniel estas vojo por esplori la profundajn tavolojn de la konscio; eblas tiu esplorado nur kiam la penso, la emocioj kaj la korpo ne kontraŭas inter si sed kune integriĝas, sen streĉado, sen stimulado per koncepto, kredo aŭ idealo.

En la edukado de la penso, oni emfazu la atentemon sed ne la koncentriĝon. Koncentriĝo trudas al la spirito fiksiĝi sur iu punkto, dum atentemo ne havas limojn. Koncentriĝi estas limigi la spiritan aktivecon; sed ja interesas nin kompreni la tutan konscion, do la koncentriĝo fariĝas malhelpo. La atentemo estas senlima, ĝin ne entenas la limoj de la scioj. Tiuj ĉi estas la rezulto de la spirita koncentriĝo kaj ĉiu pliiĝado de la scioj okazas ĉiam interne de siaj propraj limoj. En atentado oni povas kaj devas koncentriĝi sur la studata temo, sed parto ne estas tuto, kaj adiciante ĉiujn partojn oni ne atingas la scion pri la tuto. La scioj, kiuj estas la adicia procezo de la koncentriĝo, ne kondukas al la kompreno de la nemezureblaĵo. Koncentriĝanta spirito neniam povas ĉirkaŭpreni la tuton.

Atentemo do ege gravas, sed ĝi ne okazas per koncentriĝ-penado. Ĝi estas stato, en kiu oni ĉiam estas lernanta sen konscio-centro ĉirkaŭ kiu amasiĝus scioj kiel akumulita spertado. Spirito koncentriĝinta sur si uzas sciojn kiel rimedon por propra progresado, kaj tiu aktivado iĝas kontraŭeca en si mem kaj kontraŭsocia.

Lerni, laŭ la vera signifo de tiu vorto, eblas nur en atento-stato, en kiu estas neniu trudo, ekstera aŭ interna. Oni povas ĝuste pensi nur kiam la spiriton ne ligas tradicio aŭ memoro. Estas la atento, kiu ebligas al la silento aperi en la spirito kaj malfermi la pordon al la kreado. Jen kial gravegas la atento.

La scioj estas necesaj ĉe la funkci-nivelo kiel rimedo por kulturi la spiriton, sed ne kiel celo en si mem. Kio gravas por ni, tio estas ne la disvolviĝo de ununura kapablo kia estas tiu de la matematikulo, de la scienculo aŭ de la muzikisto, sed la plena disvolviĝo de la infano kiel homo. Kiel naski tiun atento-staton? Ĝin oni ne povas kulturi per persvadado, komparado, rekompencoj aŭ punoj, kiuj ĉiuj estas subprem-formoj. Eliminado de la timo signas la komencon de la atento. La timo ekzistas tiel longe dum ekzistas la deziro esti aŭ fariĝi, kio estas strebado al sukceso kun ĉiuj ties frustracioj kaj ties ruzaj kontraŭdiroj. Oni povas instrui la koncentriĝon, sed ne la

atentemon, tute same kiel tute ne eblas instrui la liberecon per la timo; sed oni povas ekmalkovri la kaŭzojn, kiuj naskas la timon, kaj ĉi-lasta eliminiĝas, kiam oni komprenas ĝiajn kaŭzojn. La atentemo ŝprucas do spontane, kiam estas kreita ĉirkaŭ la lernanto etoso de bonstato, kiam li havas la impreson esti sekura, komforta, kaj kiam li konscias pri neprofitcela agado, inspirita de amo. La amo ne komparas, tiel ke ĉesas la ĵaluzo kaj la turmento de la "fariĝo".

La ĝenerala malkontenteco, kiun ĉiuj, junuloj kaj maljunuloj, suferas, rapide trovas vojon al la kontentiĝo, kaj tiel la spiritoj lulas sin kaj ekdormas. La malkontenteco de tempo al tempo aperas, kiam oni suferas, sed oni tiam reekserĉas agrablan solvon. En tiu senfina sinsekvo de malkontentoj kaj rekvietiĝoj, la konscio sufokiĝas kaj ĝiaj intermitaj vekiĝoj estas la vojo al demandemo, sed ne okazas esplorado, se la spirito estas katenita al tradicio, al idealo. La volo informiĝi estas tio, kio daŭrigas la atentemon.

Per "malkontentecon" mi celas la staton, en kiu oni komprenas "tion estantan", la nunon, kaj en kiu oni informiĝas ĉiam por esplori pli foren. Ankaŭ ĝi estas moviĝo, kiu tendencas iri trans la limojn de "tio estanta", kaj, se oni trovas vojojn kaj rimedojn por sufoki aŭ venki la malkontenton, tio signifas, ke oni akceptas la limojn de la egocentraj aktivaĵoj kaj de la Socio, en kiu oni troviĝas.

La malkontenteco estas la fajro, kiu konsumas la skoriojn de la kontenteco, dum la plimultaj el ni male klopodas sin kontentigi, pro tio, ke ili estas malkontentaj. Tiam ili sin ĵetas en la strebadon al "io plia" : pli granda domo, pli bona aŭto ktp. Tiu kontentiĝo situas sur la tereno de envio kaj estas la envio, kiu mem pluigas ĝin. Sed tiu, pri kiu mi parolas, ne enhavas ĵaluzon, nek avidon al "io plia"; ĝin subtenas neniu kontentiĝ-deziro. Ĝi estas ne-poluita stato, kiu ekzistas en ĉiu el ni, se ĝin ne sufokas misedukado, plaĉcelaj solvoj, ambicio aŭ la strebado al idealo. Kiam oni komprenas la naturon de reala malkontenteco, oni vidas, ke la atentemo apartenas al tiu brulanta fajro, kiu konsumas la trivialaĵojn, kaj kiu

liberigas la spiriton el la limigoj, en kiuj ĝi enfermiĝis, strebante al kvietiĝoj.

***

La atentemo ekzistas nur kiam la esplorado ne apogiĝas sur promociiĝemo aŭ kontentiĝemo. Tiun atentemon oni devas kulturi ĉe la infano tuj de la komenco. Kiam la edukisto havas en si amon - kiu esprimiĝas per humilo, ĝentilo, pacienco, afablo - li estas jam liberigita el la bariloj, kiujn konstruas la nesensivo kaj li tiel povas helpi en la apero de tiu atentemo ĉe la infano ekde lia plej juna aĝo.

La atentemon oni ne povas instrui, sed oni povas favori ĝian vekiĝon ĉe la lernanto, ne kreante ĉirkaŭ li subprem-etoson, kiu ĉiam estigas kontraŭdirojn en la vivo. Tiam lia atentemo povos tuŝi je ĉiu ajn momento iun ajn temon kaj tio ne estos la streĉa koncentriĝo, kiun estigas la prem-impulso de la ekposedemo aŭ de la sukcesavido.

Tiel edukita generacio ne plu havus tiun akiremon nek tiun timon, tiujn psikajn heredaĵojn de la gepatroj kaj de la Socio. Ĝi liberiĝus ankaŭ el la materiaj heredaĵoj. Tiu afero pri heredo detruas ĉiun realan sendependecon kaj limigas la inteligenton, ĉar ĝi naskas falsan sekursenton kaj havigas falsan senbazan memfidon; ĝi estigas en la spirito obskuron, en kiu nenio povas flori. Sed generacio edukita laŭ la tute malsama maniero, kiun ni ĵus pritraktis, kreus novan socion, ĉar ĝi posedus la kapablojn, kiuj naskas inteligenton nesufokitan de l' timo.

Ĉar la edukadon respondecas tiel la gepatroj kiel la mastroj, ni devas lerni la arton labori en kuneco, kio eblas nur kiam ĉiu ekkonscias pri tio, kio estas vera. Kio kunigas, tio estas la percepto de la vero, ne opinioj, kredoj aŭ teorioj. Estas granda diferenco inter koncepto kaj fakto. La konceptar-mondo povas portempe unuigi, sed estos denove disiĝo, se la laboro en komuneco ne estas afero pri konvinkoj. Se la veron vidas ĉiu, povas esti malakordoj pri detaloj, sed ili ne estigos rompon. Estas malracie ĉion rompi pro ia detaleto. Kiam la veron vidas ĉiuj, la detalo ne povas estigi malpacon.

La plimultaj homoj kutimas kune labori nur sub la direktivoj de establita aŭtoritato. Oni kunsidas por apliki koncepton aŭ por disvastigi idealon, kio postulas konvinkitecon, persvademon, propagandon ktp... Tiu kunlaboro por ideo aŭ idealo tute diferencas de kunlaborado, kiun oni dankas al la fakto, ke oni vidas la veron kaj la neceson ĝin efektivigi. Labori pro stimulo de aŭtoritato - ĉu tiu de idealo aŭ tiu de persono reprezentanta idealon - ne estas kunlabori. Centra aŭtoritato, kiu posedas grandajn sciojn aŭ kiu havas fortan personecon kaj estas obsedata de iuj ideoj, povas trudi aŭ subtile persvadi al homoj kune labori por tio nomita idealo; sed tute alia afero estas la kunlaborado de vigle atentaj kaj vivplenaj personoj. Kiam ĉiu komprenas per si mem la veron de ĉiu problemo, ĉies kompreno de tiu vero kondukas al agado kaj tiu agado estas kunlaborado. Kiu aliĝas al tia laboro pro tio, ke li vidas la veron kiel veron, la malveron kiel malveron kaj la veron en la malvero, tiu scios ankaŭ je kiu momento li ne devos kunlabori, kio ankaŭ gravas.

* * *

Se ĉiu el ni vidus la neceson de ĝisfunda revolucio en la edukado, kaj ekvidus la veron de tio, kion ni ĵus ekzamenis, ni povus kune labori sen ajna speco de persvado. La persvadado trudiĝas, nur kiam iu okupas pozicion, ne volante ĝin ekforlasi. Kiam iu estas konvinkita pri ideo aŭ alkroĉita al opinio, tiu naskas kontraŭanton, kaj tiam unu aŭ la alia kontraŭulo devas sin lasi persvadi, influi aŭ subordigi. Tia situacio neniam okazas, kiam ĉiu per si mem vidas la veron de iu afero. Sed se oni ne vidas la veron kaj agas surbaze de nura perparola konvinko aŭ de intelekta rezonado, neeviteble okazas disputoj, akordoj aŭ malakordoj, kun ĉiuj deformiĝoj kaj senutilaj streĉoj, kiuj akompanas tion.

Plej gravas kune labori. Ekzemple, en dom-konstruado. Se iuj konstruas ĝin, dum aliaj ĝin malkonstruas, ĝi evidente neniam estos konstruita. Ni devas do esti tre klaraj pri la bazo de nia kunlaborado : estas la fakto, ke ni reale vidas kaj komprenas la neceson starigi edukadon kiu naskos generacion kapablan fronti al la vivo en ties

tuteco kaj ne en izolitaj sektoroj, disigitaj de la tuto.

Por kapabli kune labori en tiu kunlaborema spirito, oni devas ofte renkontiĝi, esti vigle atenta kaj ne lasi sin dronigi per detaloj. Inter ni, tiuj, kiuj reale dediĉas sin al la tasko starigi ĝustan edukadon, havas ne nur la respondecon meti en praktikon ĉion, kion ni komprenis, sed ankaŭ helpi aliulojn atingi tiun komprenon. La instruado estas la plej nobla el la profesioj - se ĝin oni povas nomi profesio - ĝi estas arto, kiu ne postulas nur intelektajn kapablojn, sed senfinan paciencon kaj amon. Esti vere edukita, tio estas kompreni niajn rilatojn kun ĉio - kun la mono, la posedaĵoj, la homoj, la naturo - en la vasta kampo de nia vivo.

***

La belo estas parto de tiu kompreno, sed belo ne dependas nur de proporcioj, de formoj, de gustoj aŭ de sistemo. Ĝi estas stato, en kiu oni forlasis la egoan centron, en la pasio de la simpleco. Simpleco ne havas finon kaj povas ekzisti nur en morrigoro ne rezultanta el kalkulita disciplino aŭ el abnegacio. Tiu morrigoro estas la forlaso de la egoo, kiun nur la amo povas efektivigi. Kiam oni ne havas amon, oni kreas civilizon, en kiu la beleco de la formo estas celata sen la vigleco kaj la rigoreco de la simpla memcedemo. Tiu ego-forlaso ne konsistas en memofero por bonfaroj, por idealo aŭ kredoj. Tiaj faroj nur ŝajne estas liberigitaj el la egoo; fakte, la egoo en ili restas aktiva sub la ŝirmo de diversaj etikedoj.. Nur la freŝa spirito povas informiĝi pri tio nekonata. Sed la kalkulita freŝeco, kiu vestas sin per nura zonotuko aŭ per monaka robo, ne estas la pasio de la ego-forlaso, el kiu fontus la ĝentilo, la afablo, la humilo, la pacienco - la esprimo de amo.

La plimultaj el ni konas la belon nur tra tio kreita aŭ konstruita - la belo de la homa formo aŭ de templo. Ni diras pri arto, monumento aŭ riverego en ties larĝa kurbeco, ke ili estas belaj. Kaj, per komparo, ni scias, kio estas la malbelo - almenaŭ kredas ni tion scii. Sed la belo estas al nenio komparebla. Ĉu ĝi ekzistas en tio, kio manifestiĝas, en tio, kion oni evidentigis? Ni juĝas

belaj tian pentraĵon, tian poemon, tian vizaĝon, tial ke ni jam scias kio estas belo, laŭ tio, kion oni instruis al ni aŭ kio estas al ni familiara, kaj pri kio ni formis al ni opinion. Sed ĉu la belo ne ĉesas en la komparado? Ĉu familiariĝo kun tio konata aŭ kun animstato, povas ne enteni kreitan formon?

Ni ĉiam aspiras al belo kaj evitas la malbelon. Kaj tiu strebado al pliriĉiĝo per unu kaj tiu rifuzo kontakti la alian, neeviteble naskas la nesensivon. Por kompreni aŭ senti kio estas la belo, endas esti sensiva samtempe al tio, kio laŭdire estas bela kaj al tio laŭdire malbela. Sento estas nek bela nek malbela. Sed ni rigardas ĝin tra religia kaj socia kondiĉiĝo kaj gluas al ĝi etikedon. Ni diras, ke ĝi estas bona aŭ malbona sento kaj tiel ni deformas aŭ detruas ĝin. Kiam ĝi ne surhavas etikedon, ĝi restas intensa kaj tiu pasia intenseco estas ja esenca por kompreni tion, kio estas nek belo nek malbelo manifestataj. Tiu daŭra sento estas pasio, sed ne nura ĝuo pro egocentra plezuro; kaj ja tiu pasio kreas la belon. Ĉar al nenio komparebla, ĝi ne havas malon.

Celante plene disvolvi la homon, ni kompreneble devas konsideri tiel la nekonscian kiel la konscian mondojn. Eduki nur la supraĵan konscion sen kalkuli pri la nekonscio, estigas internajn kontraŭecojn en la homa vivo kun ĉiuj ties frustracioj kaj mizeroj. La kaŝita konscio estas vitale pli grava ol la supraĵa. La plimultaj edukistoj kontentiĝas, donante informojn aŭ sciojn je supraĵa nivelo de la konscio, cele ke la lernanto povu praktiki metion kaj adaptiĝi al la socio. Tiel la kaŝitaj tavoloj neniam estas tuŝataj : la nura efiko de tiu pseŭdo-edukado estas surŝlimi lin per tavolo el scioj kaj tekniko kaj el ia kapablo adaptiĝi al la medio.

La kaŝita konscio multe pli gravas ol la supraĵa, kiel ajn edukita kaj adaptiĝkapabla estas ĉi-lasta; kaj tiu kaŝita konscio ne estas io tre mistera. La nekonscio - tio kaŝiĝanta en la spirito - estas la kolektujo de la rasaj memoroj. La religioj, la superstiĉoj, la simboloj, la strangaj tradicioj propraj al ĉiu raso, la influoj de la sanktaj kaj profanaj literaturoj, la kondutmanieroj, la nutraĵdiverseco, ĉio tio radikas en la nekonscio. La sekretaj kaj mal-

kaŝaj deziroj kun iliaj motivoj, esperoj, timoj, suferoj, plezuroj, kaj la kredoj, kiujn nutras diversmaniere la profunda sekurbezono, ankaŭ ĉio tio estas entenata en la nekonscio, kiu havas ne nur tiun eksterordinaran kapablon enteni la restaĵojn el la pasinteco, sed ankaŭ la kapablon influi la estontecon. La supraĵa konscio ricevas elsendojn el la nekonscio per sonĝoj aŭ per alia rimedo, kiam ĝi ne estas tute absorbita de la ĉiutagaj okazaĵoj.

La kaŝita mondo de la konscio estas neniel sankta nek timiga, nek postulas fakulon por aperi al la supraĵa konscio. Sed, ĉar la kaŝa konscio estas ege potenca, la konscia konscio ne povas trakti ĝin kiel ĝi volus tion fari. La konscia konscio estas grandparte senpotenca rilate al la kaŝa. Kiel ajn streĉe ĝi strebas regi la kaŝan konscion, modli ĝin, ĝin direkti por kontentigi siajn sociajn bezonojn, la konscia konscio povas nur grati ĝian supraĵon, tiel ke okazas inter ili rompiĝo aŭ kontraŭstaro. Per disciplinoj, diversaj praktikoj, punoj, ktp, oni provas transponti tiun abismon. Sed oni ne povas sukcesi tion.

La konscia spirito estas okupita de la tujo, la limigita nuno, dum la nekonscia kuŝas sub la pezo de l' jarcentoj kaj povas esti nek digita nek deturnita por tujaj necesaĵoj. La nekonscio havas la kvaliton de la profunda Tempo kaj la konscio, kun sia freŝdata kulturo, ne povas submeti ĝin al siaj momentaj postuloj. Por elradikigi tiun internan kontraŭdiron, la supraĵa inteligento devas silente kompreni tiun maleblon - kio ne signifas lasi tutan liberon al la manifestiĝo de la nenombreblaj kaŝaj deziroj. Kiam ne estas rezisto inter tio videbla kaj tio kaŝita, ĉi-lasta, havante la paciencon de l' Tempo, ne perfortos la tujon.

La kaŝa, neesplorita, nekomprenita konscio kontaktas kun la instigoj kaj la postuloj de la tuja nuno, pere de sia supraĵa parto, kiu estis "edukita". Tiu ĉi povas adekvate respondi tiun defion, sed pro la kontraŭeco ekzistanta inter ĝi kaj la nekonscio, ĉiu nova eksperimento, kiun ĝi povas travivi, povas nur pliintensigi ilian konflikton. Tiu konflikto naskas aliajn eksperimentojn, kiuj ankoraŭ plilarĝigas la abismon inter la nuno kaj la pasinteco. La eksperimentoj, kiujn oni supraĵe travivas, sen

kompreni la internajn tavolojn de la konscio, povas nur naski pli kaj pli profundajn kaj vastajn konfliktojn.

Male al tio, kion oni ĝenerale opinias, la eksperimento ne liberigas nek riĉigas la spiriton. Tiom longe dum ĝi vigligas la eksperimentanton, nepre estas konflikto. Travivante eksperimentojn, kondiĉita spirito nur plifortigas sian kondiĉiĝon kaj tiel pluigas sian kontraŭecon kaj sian mizeron. Nur por la spirito kapabla tute kompreni sian esto-manieron la travivita eksperimento povas esti liberiga faktoro.

Kiam oni ekvidas kaj komprenas la potencon kaj la kapablojn de la multaj kaŝitaj tavoloj de l' konscio, tiam la detaloj povas esti konsiderataj kun prudento kaj inteligento. Kio gravas, tio estas kompreni tiujn profundaĵojn, sed ne instrui la supraĵon, kvankam ankaŭ tio estas necesa; tiu kompreno liberigas la spiriton el ĉiu konflikto, kaj nur tiam oni agas inteligente.

Ni devas veki la plenan kapablon de la spirito en tiuj aktivaj supraĵaj tavoloj en la ĉiutaga vivo kaj ankaŭ kompreni ties kaŝajn tavolojn. Tiam okazas vivpleneco, en kiu ne plu ekzistas la kontraŭdireco kun ties alternaj sufero kaj doloro. Gravas koni la kaŝitan parton de la konscio kaj ekvidi ĝian aktivecon, sed ankaŭ gravas ne droni en ĝi kaj ne doni al ĝi tro da valoro. Nur kiam la spirito konas sin supraĵe kaj profunde, tiam ĝi povas transcendi siajn proprajn limigojn kaj malkovri feliĉon, kiu ne apartenas al la Tempo.

***

# LA TIMO

Mi demandas min, kial vi lernas. Tuj kiam vi estas sufiĉe aĝaj, viaj gepatroj sendas vin al la lernejo. Eble ili scias la kialon, sed ĉu vi mem scias tion? Tio, kion vi scias, estas nur ke vi devas ricevi instruon kaj edukon Kion tio signifas? Ĉu vi iam pensis pri tio? Ĉu ke vi devas trapasi ekzamenojn, iam edziĝi, havi metion kaj daŭrigi dum via tuta vivo metion, kiun vi ŝatos aŭ ne ŝatos? Ĉu estas tio la celo de l' edukado?

Vi apartenas al diversaj lernejoj. Vi lernas matematikon, historion, geografion, sciencojn, kaj ceteraĵojn. Kial? Ĉu nur por esti kleraj pri tiuj temoj, aŭ ĉu la edukado devas esti io tute alia? Sufiĉas rigardeti ĉirkaŭ si por vidi la staton, en kiu troviĝas la mondo. Ĉu vi vidas ĉiujn malfeliĉulojn, kiuj havas nenion por manĝi, kiuj devas labori, neniam ĝuante ripoztagon, dum viaj gepatroj iras al siaj kluboj en luksaj aŭtomobiloj? Tiel estas la vivo, ĉu ne? Estas riĉuloj kaj malriĉuloj, sanuloj kaj malsanuloj, kaj ĉie estas militoj, mizero, ĉiuspecaj malfeliĉoj. Ĉu vi ne devus pensi pri tio ekde via junaĝo? Sed viaj lernejoj ne preparas vin fronti la vastecon de la vivo kaj ties eksterordinarajn konfliktojn. Neniu parolas al vi pri tio. Oni liveras al vi nur simplajn faktojn. Ĉu tio sufiĉas?

La edukado devus doni al vi ne nur metion. Ĝi devas prepari vin al la vivo, kaj la vivo estas simila al profundega oceano: ĝi havas potencajn fluojn, kie svarmas tre malsamaj estaĵoj, de la multspecaj fiŝoj, kiuj dikaj manĝas la maldikajn, ĝis la homoj, kun ties diversaj specoj de plezuroj kaj suferoj, ties mirigaj inventoj, ties nenombreblaj medit-sistemoj kaj homamasoj aspirantaj al fe-

liĉo. Ĉio tio estas la vivo kaj al tio oni ne preparas vin. En la lernejo estas tro da lernantoj en ĉiu klasĉambro kaj la profesoroj pensas nur pri via preparado por ekzamenoj; ili faras nenion por lumigi viajn spiritojn. Ili ŝtopas vin per informoj, kiujn oni povas trovi en ĉiu ajn enciklopedio, se oni scipovas legi, sed ili ne diras al vi kiel fronti sentime ĉiujn komplikaĵojn de l' vivo. Ĉar vi timas: vi timas viajn profesorojn, viajn gepatrojn aŭ iun ajn alian aŭtoritaton. La plenkreskuloj havas la povon vin puni, vin forigi de ili. En la lernejo, kiel hejme, vin gvidas la timo, kaj ĝi modlas vin poste ĝis la morto. Ĉu vi observis tiam, kiam vi timas? Vi konas la korpajn efektojn, la streĉiĝojn, la ŝvitadon, la koŝmarojn, kiujn estigas la timo. Vi emas fuĝi tion, kion vi timas; kun tiu sento vi iras al la kolegio kaj kun tiu sento vi eliras el ĝi por fronti la vastan riveregon, la egan profundaĵon, kiun oni nomas la vivo. Ŝajnas al mi, ke la unua celo de la edukado estas liberigi vin el tiu timo, kiu stultigas vin, kiu kripligas la spiritojn, kiu ĵetas ilin en la mallumon. Tiom longe, dum estos en vi timo, vi ne povos krei novan mondon. Ĉu vi komprenas, kion mi diras, aŭ ĉu tio estas tro nova por vi?

Ĉu vi scias, ke ekster la mondo, kiun vi konas, en Eŭropo, en Ameriko, en Rusio, oni preparas egajn detruilojn? La mondo travivas tre danĝeran periodon; kvankam ili asertas la malon, la politikuloj estas ĉiuj en granda konfuzo, ĉar ĉiam okazas konfliktoj kaj militoj. La nuna mondo ne belas; ĝi ne estas loko por vivo paca kaj feliĉa; kaj se oni ne donas al vi, kiam vi estas tre junaj, edukadon sur novaj bazoj, vi certe pludaŭrigos malfeliĉan, mizeran kaj konfuzan mondon. Tre gravas do, ke vi sciu kiel oni devus vin instrui, por ke vi kapablu krei malsaman mondon, mondon, kie la homoj povu vivi feliĉaj kune, kie estus nek riĉuloj nek malriĉuloj, nek politikuloj kun la potenco kaj la ĝin akompananta prestiĝo, nek la malfeliĉuloj devigataj laboregi ĝis sia morto.

Estas vi, kiuj devas krei novan mondon, ne la maljunuloj, kiuj faris el ĝi teruran ĥaoson. Kaj estas vi, kiuj povas fari ĝin, se vi ricevos la taŭgan edukadon, vi, ne la politikuloj nek la pastroj. Vi povos krei mirindan mondon,

kiu estos nek hinda nek eŭropa, kiu estos tiu de la homoj, en kiu la homoj kune vivos feliĉaj. Kaj mi asertas, ke la kreado de tia mondo dependas de vi, nur de vi. Sed vi devas atenti, ke oni donu al vi celkonforman edukadon. Se la profesoroj vivas en timo, iliaj lernantoj fariĝas timemaj. Se la profesoroj havas malvastan kaj malnoblan spiriton kaj kontentiĝas, komunikante al vi informojn, ankaŭ vi havos nebonajn spiritojn kaj vi kreskos, ne kompreninte tion, kio estas la vivo.

Tre gravas, ke vi kresku en libero, kaj libero ne eblos tiom longe, dum vi vivos, timante viajn profesorojn, viajn gepatrojn, aŭ tion, kion diros pri vi unuj aŭ aliaj. Vi povas konstati, ke ĝenerale la profesoroj ne funde esploris tiun demandon. Tuj kiam ili devigas vin ion fari, uzante kontraŭ vi aŭ tion, kion ili nomas bonvolo, aŭ disciplinan sistemon, ili estigas timon en vi. Se profesoro komparas vin al alia lernanto, dirante, ke vi estas malpli inteligenta ol li, li detruas vin. Niaj nuntempaj lernejoj uzas ekzamen-sistemon, kiu estigas timon en la lernantoj, kaj not-sistemon kiu estas konstanta komparilo, tiel ke oni taksas la naturdotojn de la infanoj kaj ne tion, kio estas ĉiu aparta infano. Sed la infano, kiu brilas en lernejo, povas esti stulta aliloke, kaj foje ĝi estas tia.

La komparsistemoj per ekzamenoj kaj notoj, kaj ankaŭ ĉiuj formoj de subpremo per afekcio aŭ minacoj, estigas ĉe la infano timon kontraŭ kiu ĝi batalos dum sia tuta vivo sen sukcesi liberiĝi. Pro sia sinteno rilate al la vivo la plenkreskuloj favoras formon de edukado, kiu nur ripetas la antaŭan. Tiel, neniam io ŝanĝiĝas. Jen kial gravas, ke vi pripensu tiujn demandojn en via junaĝo. Se vi ne bone komprenas, kion mi diras, petu de viaj profesoroj, ke ili klarigu tion al vi, kaj vidu, ĉu eblas, ke vi vere liberiĝu el la timo. Vi studos multe pli bone, kaj ne suferante premdevigojn, vi malkovros vian talenton, kaj dum via vivo vi faros nur kion vi ŝatas fari. Tio multe pli gravas ol serĉi socipozicion. Se oni vere ŝatas iun permanan aŭ intelektan laboron, oni povas krei novan mondon, kondiĉe ke oni ne timu ribeli kontraŭ la malnova ordo ekde sia junaĝo.

Ĉu vi scias, kion tio signifas? Dum la tuta periodo inter la infanaĝo ĝis la plenkreskuleco, la vivo premas al la

individuo. La gepatroj, la profesoroj, la tradicioj, la najbaroj, la aparta kulturo de la socio, kie ĝi kreskas, enfermas ĝin kvazaŭ en karcero kaj devigas ĝin konformiĝi al difinita estmaniero, tiel ke ĝi neniam estas si mem. Sed ĉu ne gravas, male, ke la edukado helpu vin pensi kaj vivi sen ajna timo, por ke vi povu scii mem, kion signifas ami? Se viaj gepatroj vere amas vin, ili atentos, ke vi estu liberaj, liberaj vivi kaj kreski sentimaj kaj feliĉaj. Sed estas tre malmulte da tiaj gepatroj. Ĉiuj volas, ke iliaj filoj estu similaj al ili. Se la patro estas advokato, policisto aŭ komercisto, li volas, ke ankaŭ lia filo estu tio.

Kompreni tiujn tiel komplikajn problemojn estas tre malfacile. Necesas por tio inteligento, kiun povas disvolvi en vi viaj profesoroj ekde via plej juna aĝo, kondiĉe ke ili mem komprenu tiujn demandojn. Sed por multaj el ili, la instruado estas nur panakirilo manke de io pli bona, kio signifas, ke ili ne vere interesiĝas pri vi, eĉ ne pri la edukado.

Do vi, kiuj estas ankoraŭ infanoj, devas vidi la veron de tio, kion mi diras. Ne lasu vin malsovaĝigi same kiel etaj dombestoj. Mi esperas, ke vi komprenas min; tio postulas multe da pripensado viaflanke. La mondo estas nun diseriĝanta; ĝi ekruiniĝas; estas militoj, mizero, malsatego. La kreado de nova mondo estas inter viaj manoj. Sed ĝin vi ne povos krei, se vi ne havas ribelemon, kaj vi ne havos ribelemon, tiom longe, dum vi vivos en timo, ĉar ĝi kripligas la inteligenton.

*
* *

## LA LIBERO

Ni ekzamenis la timon. Ni konstatis, ke ĝi ekzistas profunde ĉe la plimulto el ni, kaj ke ĝi obstaklas al la iniciatemo, pro tio ke ĝi pelas nin kroĉiĝi al homoj kaj aĵoj, tutsame kiel kroĉiĝemaj plantoj kroĉiĝas al arboj. Ni estas kroĉitaj al niaj gepatroj, edzoj, filoj, filinoj, al niaj edzinoj, al niaj posedaĵoj. Tio estas la ekstera formo de la timo. Interne, ni timas esti solaj kaj sendependaj. Eble ni havas multajn sariojn, juvelojn, kaj aliajn posedaĵojn, sed psike ni estas tre malriĉaj. Ju pli malriĉaj ni estas interne, des pli strebas ni riĉiĝi ekstere, ligante nin al homoj, al socipozicio, al posedaĵoj.

Ni kroĉiĝas ne nur al eksteraĵoj, sed ankaŭ al psikaj aferoj, ekzemple al tradicioj. Por la plimultaj maljunaj personoj kaj por tiuj, kiuj interne estas vakuaj kaj malplenaj, multe gravas la tradicioj. Ĉu vi rimarkis tion ĉe viaj geamikoj, viaj gepatroj, viaj instruantoj? Ĉu vi rimarkis tion en vi mem? Ĉar tiu interna vakuo timigas, tial oni provas ĝin kovri per respektindeco kaj konformismo. Oni tiam perdas ĉian iniciatemon, oni nur sekvas instrukciojn kaj la tradicio fariĝas ege grava. La tradicio estas tio, kion diras la homoj, kion la pasinteco transdonis. Ĝi havas nenian vivkapablon, nenian viglecon, tial ke ĝi estas nura sensenca ripetaĵo.

Kiam oni timas, oni ĉiam imitemas. Ĉu vi rimarkis, ke la timantoj ĉiam imitas iun? Ili kroĉiĝas al tradicio, al siaj gepatroj, al siaj edzinoj, siaj fratoj, al siaj edzoj. Kaj imitado detruas la iniciatemon. Kiam oni desegnas

aŭ pentras arbon, oni ne kopias ĝin tute tia, kia ĝi estas tio estus fotado. Por esti libera pentri arbon, floron aŭ sunsubiron, vi devas senti, kion tio reprezentas, signifas por vi. Tre gravas tio: provi transdoni la signifon de tio, kion oni vidas, kaj ne sin limigi, kopiante, ĉar tiam oni vekas la kre-procezon. Kaj por tio necesas havi liberan spiriton, spiriton ne pezigitan de la tradicio, de la imitado. Sed vidu viajn vivojn kaj tiujn, kiuj ĉirkaŭas vin; vidu kiagrade ili estas tradiciemaj kaj imitemaj.

Por iuj aferoj vi estas devigataj imiti: la vestaĵoj, kiujn vi surhavas, la libroj, kiujn vi legas, la lingvo, kiun vi parolas, estas formoj de imitado. Sed necesas iri trans tiun nivelon kaj ke vi sentu vin liberaj pensi per vi mem, ne konsentante senpripense, kion oni diras al vi, kiuj ajn estas la personoj, kiuj diras tion al vi, viaj mastroj, viaj gepatroj aŭ unu el la grandaj religiaj instruantoj. Pensi memstare, ne havi disĉiplan menson, tio tre gravas, ĉar fariĝi disĉiplo montras, ke oni timas. Tuj kiam oni proponas al vi ion de vi deziratan - la paradizon, la ĉielon aŭ pli bonan oficon - vi timas ne akiri ĝin kaj sekve vi ekkredas, ekaliĝas al tio, kion oni diras al vi. Tiom longe dum vi aspiras akiri ion, vi nutras en vi timon, kiu tiel stumpigas vian spiriton, ke vi ne povas esti liberaj.

Ĉu vi scias, kio estas libera spirito? Ĉu vi iam observis vin? Vi ne havas liberan spiriton, vi estas ĉiam demandanta al vi, kion viaj geamikoj opinias pri vi. Vi similas domon, kiun ĉirkaŭas muro kaj dratoj. En tia stato vi neniam estas novaj. Novo povas naskiĝi, nur kiam timo forestas el vi. Kaj ege malfacilas malplenigi la spiriton el ĉia timo, ĉar tio signifas liberigi sin el la deziro imiti kredi, amasigi riĉaĵojn, konformiĝi al tradicio (sen pro tio ekstravanganci).

La spirita libero naskiĝas, kiam oni ne timas, kiam oni ne deziras brili, kiam oni ne intrigas por akiri situacion aŭ prestiĝon. Tiam oni ne imitas. Kaj gravas esti tiel liberigita el la tradicioj, ĉar ili naskas spiritan aŭtomatecon, kiu fariĝas kutimo.

Ĉu tro malfacilas ĉio ĉi? Mi ne opinias, ke tio estas pli malfacila ol via geografio, aŭ via matematiko. Tio estas pli facila, sed vi ankoraŭ neniam pensis pri tio. Vi

pasigas eble dek aŭ dek-kvin jarojn en lernejo por akiri informojn kaj vi neniam prenas tempon - eĉ nur unu semajnon, eĉ nur unu tagon - por plene, komplete pensi pri tiuj aferoj. Tial ili ŝajnas al vi tiel malfacilaj. Sed male, ili estas tute ne malfacilaj, se vi prenas la tempon vidi mem; kiel funkcias viaj spiritoj, kiel ili agas, kiel ili reagas. Kaj tre gravas komenci memkomprenon, kiam oni estas juna, se ne, oni kreskas, forte ligiĝante al iu tradicio, oni vivas kun imitemo, t.e., ke oni nutras en si timon kaj neniam estas libera.

Ĉu vi rimarkis kiel tie ĉi, en Hindio, vi estas ligitaj al tradicioj? Vi devas geedziĝi laŭ iuj kutimoj, obeante la elekton de viaj gepatroj. Vi devas plenumi iujn ritojn; eble ili nenion signifas por vi, sed al vi ili estas trudataj. Vi havas spiritajn estrojn, kiuj gvidas vin. Ĉirkaŭ vi, ĉio spegulas vivmanieron, laŭ kiu la aŭtoritato firme staras. Estas la aŭtoritato de l' guruo, tiu de la politika grupo, tiu de l' gepatroj, tiu de la publika opinio. Ju pli malnova la civilizo, des pli peza la tradicio kaj ĉio imitada, kiun ĝi entenas. Ŝarĝite per tiu pezo, viaj spiritoj neniam estas liberaj. Vi povas paroli pri politika libero aŭ pri ajna alia libero, sed vi, kiel individuoj, ne povas ĝin malkovri, ĉar vi nur sekvas guruon, sekvas idealon, sekvas ajnan absurdan superstiĉon.

Tiel viaj tutaj vivoj estas ĉirkaŭitaj de bariloj; ili estas limigitaj en iuj ideoj; kaj en la fundo de viaj konsciencoj estas la timo. Kiel vi povas libere pensi en la timo? Jen kial tiel gravas konscii ĉion ĉi. Kiam oni ekvidas venenan serpenton, oni ĝin fuĝas. Sed vi ne scias, ke vi estas kaptitaj de imitada vivo, kiu obstaklas la iniciatemon; vi estas nekonsciaj. Pri tio fariĝu konsciaj; vidu kiel tiu ekzisto tenas vin; komprenu, ke se vi imitas tion vi faras, ĉar vi timas kion oni opinias pri vi, ĉar vi timas viajn gepatrojn kaj viajn mastrojn. Tiam vi povos ekzameni tiujn konformismojn, en kiuj vi estas implikitaj, vi povos studi ilin same kiel oni studas matematikon aŭ ajnan temon.

Ekzemple, ĉu vi komprenas la kialojn kial iuj viroj traktas la virinojn malŝate? Kaj kial vi iras en templojn plenumi ritaĵojn? Kial vi fariĝas adeptoj de guruo?

Endas konscii tiujn aferojn; poste oni povas ilin ekzameni, pridubi ilin, pristudi ilin; sed se oni akceptas ilin blinde, pro tio ke tiuj aferoj estas tiel de antaŭ tridek jarcentoj, la vivo havas neniun signifon, ĉu ne? Ni bezonas en ĉi tiu mondo nek kromajn imitantojn, nek kromajn estrojn, nek kromajn disĉiplojn. Ni bezonas individuojn, kiuj, samkiel vi kaj mi, ekekzamenas ĉiujn ĉi problemojn, ne supraĵe sed profunde, por ke la spiritoj estu liberaj krei, liberaj pensi, liberaj ami.

La edukado estas rimedo por malkovri niajn verajn rilatojn kun la aferoj, la homoj, la naturo. Sed la spirito kreas ideojn kaj tiuj ideoj fariĝas tiel fortaj, tiel regantaj, ke ili malhelpas al ni vidi pli foren. Tiel longe dum ni timas, ni estas kaptitaj de l' tradicioj, ni imitadas. Sed spirito, kiu kontentiĝas per imitado, estas mekanikizita; en sia funkciado ĝi similas maŝinon, ĝi ne estas kreiva, ĝi ne iras ĝis la fundo de siaj pensoj. Ĝi povas estigi iujn agojn, akiri iujn rezultojn, sed ĝi ne estas krekapabla.

Kion devus nun fari ni ĉiuj - vi kaj mi kaj la profesoroj, la direktoroj kaj la eminentuloj - tio estas kune penetri tiujn ĉi problemojn, tiel ke, forirante el ĉi tie, vi estu maturaj individuoj memstare pensantaj, sendependaj de ajna tradicia stultaĵo. Tiam vi havos la dignon de reale liberaj homoj. Tion devas celi ĉiu edukado, kaj ne sin limigi trapasigante al vi ekzamenojn, por ke vi poste ŝimu ĝis la vivofino, en iu okupo, kiun vi ne ŝatas, kiel advokato, oficisto, dommastrino aŭ infannaska maŝino. Vi devus insisti por akiri edukadon, kiu kuraĝigu vin pensi libere, kiu helpu vin demandi, kompreni; vi devus postuli tion de viaj profesoroj, sen kio viaj vivoj estos fuŝitaj. Via edukado devus helpi vin iĝi sufiĉe inteligentaj por akiri la de vi ŝatatan okupadon, anstataŭ enkotiĝi en stulta profesio, kiu malfeliĉigos vin la tutan vivon.

Do, dum vi estas junaj, vi veku en vi la flamon de l' malkontento, vi estu en revolucia stato. Estas nun la tempo por demandi, malkovri, kreski; insistu do ĉe viaj gepatroj kaj ĉe viaj mastroj, por ke ili taŭge eduku vin. Ne kontentiĝu, sidante en klasĉambro kaj sorbante la

informojn pri tia reĝo, pri tia milito. Estu malkontentaj, iru al viaj mastroj, informojn petu, demandu ilin. Se ili ne estas inteligentaj, per viaj demandoj vi helpos ilin fariĝi tiaj, kaj kiam vi forlasos la lernejon, vi iros al via vera matureco, al via vera libero. Tiam vi plu lernos dum via tuta vivo kaj ĝis la morto vi estos feliĉaj kaj inteligentaj homoj.

**Demando** : *Kiel oni povas akiri la kutimon ne timi?*

**Respondo** : Vidu la vortojn, kiujn vi uzis! La kutimo implicas senĉese ripetatan movadon, kaj tio, kion vi senfine ripetas, naskas nenion alian ol monotonecon. Esti sentima, ĉu tio estas kutimo? Tio signifas fronti ĉiujn incidentojn de la vivo, komprenante ilian profundan signifon kaj oni ne povas ilin ekzameni, se onia spirito estas malakrigita per kutimoj.

Kiam oni falas en pens- kaj viv-rutinon, oni fariĝas simpla ripetmaŝino. La kutimo konsistas en ĉiama refarado de la samaj aferoj sen pripenso, kio ekvivalentas konstrui muron ĉirkaŭ si. Kaj konstrui muron ĉirkaŭ si, tio estas neniam liberiĝi el la timo; male, la fakto mem ke oni vivas malantaŭ tiu muro, igas onin timema. Kiam oni havas sufiĉe da inteligento por ekzameni ĉion ekokazantan en la vivo, t.e. ĉiun problemon, ĉiun incidenton, ĉiun penson, ĉiun emocion, ĉiun reagon, nur tiam oni liberiĝas el la timo.

* * *

## LA AŬTORITATO

Ni parolis pri la timo kaj pri kiel liberiĝi sin el ĝi, kaj ni vidis, ke ĝi perversigas la spiriton, ĉar ĝi malhelpas esti libera kaj kreiva, ĝi senigas ĝin je tiu tiel grava kvalito, la iniciatemo.

Mi opinias, ke ni devus ekzameni ankaŭ la aŭtoritaton. Vi scias, kio estas la aŭtoritato, sed ĉu vi scias, kiel ĝi naskiĝas? Estas la aŭtoritato de la Ŝtato, de la leĝo, de la policisto, de la soldato; viaj gepatroj kaj viaj profesoroj iel aŭtoritatas super vi, ili diras al vi kiel vi kondutu, je la kioma vi devas enlitiĝi, kion vi devas manĝi, kiujn vi frekventu. Ili disciplinas vin, ĉu ne? Kial? Ili asertas, ke tio estas por via intereso. Ĉu estas vere? Ni ekzamenos tion, sed ni unue komprenu kiel aperas la aŭtoritato, kiu estas trudo, devigo, la povo de iu homo super alia, de iuj homoj super plimulto, aŭ de plimulto super malplimulto.

Pro tio ke hazardo faris, ke vi estas mia patro aŭ mia patrino, ĉu vi havas rajtojn super mi? Kio rajtigas iun malŝate trakti alian? Laŭ vi, kio kreas la aŭtoritaton?

Unue estas, en ĉiu el ni, la deziro trovi trankviligan kondut-manieron. Ni volas, ke oni diru al ni, kiel agi, kiam ni estas malcertaj kaj maltrankvilaj. Ĉar ni kredas, ke spirita gvidanto, guruo, scias pli ol ni, ni iras al li, ĉe niaj gepatroj aŭ aliloke, por ke oni montru al ni manieron eliri el nia konfuzo. Tiel, kreas la aŭtoritaton nia deziro trovi vivmanieron, kondutlinion.

Dum vi estas junaj, via profesoro povas montri al vi,

el kio konsistas via nescio, sed se li estas inteligenta, li helpos vin viavice fariĝi inteligentaj; li helpos vin kompreni vian konfuzecan staton, tiel ke vi bezonos neniun aŭtoritaton, nek lian nek tiun de aliulo.

Estas la ekstera aŭtoritato de la Ŝtato, de la leĝo, de la polico. Ni kreas ĝin, ĉar ni havas posedaĵojn. Tiuj riĉaĵoj apartenas al ni, kaj ni ne volas, ke aliaj forprenu ilin de ni, tial ni kreas registaron, kiu ŝirmas ilin. Tiu registaro fariĝas nia aŭtoritato. Elpensis ĝin ni, por ŝirmi nian vivmanieron, nian pensosistemon. Iom post iom, laŭ la jarcentoj, ni starigas leĝan sistemon, aŭtoritaton - la Ŝtaton, la registaron, la policon, la armeon - por ŝirmi la "mion" kaj la "mian".

Estas ankaŭ la aŭtoritato de l' idealo, kiu estas ne ekstera sed interna. Kiam ni diras: "Mi estu bona, mi ne estu enviema, mi estu frateca al ĉiu", ni kreas en niaj spiritoj la aŭtoritaton de idealo, ĉu ne? Imagu, ke mi estas stulta kaj kruela intriganto; mi volas ĉion por mi, mi volas la potencon. En vero mi estas tio, sed mi pensas, ke mi estu frateca, ĉar religiuloj diris tion kaj ankaŭ ĉar tio estas konvena, ĉar estas profite tion diri; tiam mi kreas la fratecon kiel idealon. Mi ne estas frateca, sed pro multaj kialoj mi volas esti tia, tiam la idealo fariĝas mia aŭtoritato.

Kun la celo vivi laŭ tiu idealo, mi ekdisciplinas min. Mi tre envias vin, ĉar vi havas pli belan mantelon ol la mia, pli belajn sariojn aŭ pli da titoloj ol mi; tiam mi pensas : "Mi ne havu envion, mi estu frateca". La idealo fariĝis mia aŭtoritato kaj mi provas al ĝi konformiĝi. Kio tiam okazas? Mia vivo iĝas senĉesa batalo inter tio, kio mi estas, kaj tio, kio mi "devus" esti. Mi disciplinas min - disciplinas min ankaŭ la Ŝtato. Ĉu komunisma, ĉu kapitalisma aŭ socialisma, la Ŝtato havas ideojn pri la maniero, laŭ kiu mi devas konduti. Iuj personoj diras eĉ, ke la Ŝtato estas ege grava, kaj ke se tiuj, kiuj vivas sub ĝia leĝo, faras ion ajn kontraŭan al la oficiala ideologio, ili estas persekutataj far la Ŝtato, t.e. far la kelkaj personoj, kiuj ĝin mastras.

Estas du zonoj en nia konscio; unu estas malkaŝa, la alia, kaŝita, estas nomata la nekonscio. Ĉu vi komprenas, kion tio signifas? Imagu, ke vi promenas sur vojo kun amiko. La konversacio okupas vian malkaŝan konscion; sed en ĉi-lasta estas alia parto, kiu nekonscie sorbas nenombreblajn impresojn - la arbojn, la foliojn, la birdojn, la sunlumon sur la akvo. Senĉese la ekstero trafas la nekonscion. Kvankam la konscia spirito estas okupata, la aktiveco de la nekonscia estas multe pli grava ol tiu de la konscia. Ĉi-lasta povas asimili nur relative malmulton, ekzemple, tion, kion oni instruas en lernejo, kaj tio estas vere malmulte. Sed la nekonscia parto sorbas senĉese tion okazantan inter vi kaj la profesoro, inter vi kaj viaj amikoj; ĉio ĉi okazas en profundaj regionoj kaj multe pli gravas ol la nura akumulado de faktoj supraĵe (...)

Ni parolu pri la aŭtoritato, kiun ni kreas, tiu de la Ŝtato, de la polico, de la idealo, de la tradicio. Vi volas fari ion kaj tion via patro malpermesas al vi. Vi devas obei lin, ĉar materie vi dependas de li. Li superregas vin per la timo, li fariĝas via aŭtoritato. Same superregas vin la tradicio : vi devas surporti vian sarion laŭ iu maniero, vi ne devas rigardi la knabojn aŭ la knabinojn. La tradicio diktas al vi, kion vi devas fari, kaj la tradicio efektive estas sciaro. Estas libroj, kiuj diras al vi kion fari, ankaŭ la religio. Kaj kio vi fariĝas? Vi estas premitaj, rompitaj. Vi neniam pensas nek agas laŭ vere viva maniero, ĉar vi timas. Vi diras, ke vi devas obei, se ne, vi estus sen vivrimedoj. Tio signifas, ke vi kreas la aŭtoritaton, ĉar vi volas vivmanieron, kiu certigas al vi sekurecon. Kreas la aŭtoritaton tiu strebado al sekureco, kaj tiel vi iĝas sklavo, radaĵo en maŝino, vi vivas sen la kapablo pensi kaj krei.

Mi ne scias, ĉu vi pentras. Ĝenerale, la profesoro klarigas, kiel oni pentru. Vi vidas arbon kaj vi kopias ĝin. Sed pentri estas vidi la arbon kaj esprimi sur tolaĵo aŭ papero tion, kion oni sentas pri ĝi, kion ĝi signifas - la movon de l' folioj kun la murmuranta vento. Por senti tion, por senti la movon de la lumo kaj de l' ombro, necesas granda sensivo. Kaj kiel vi povas havi ĝin, se vi pen-

sas nur : "Mi devas fari tion ĉi, mi ne devas fari tion, se ne, kion oni dirus al mi?" Ĉiun sensivon al ĉio bela iom post iom detruas la aŭtoritato.

Tiel leviĝas la problemo scii, ĉu kolegio kiel tiu ĉi devus vin disciplini. Vidu la malfacilojn, kiujn devas fronti la profesoroj, se ili estas veraj edukistoj. Vi estas petolemaj; se mi estas via profesoro, ĉu mi devas disciplini vin? Estante pli granda kaj pli forta ol vi, tial ke mi havas aŭtoritaton kaj ĉar mi estas pagata por tion fari, mi trudas al vi obei. Farante tion, ĉu mi ne kripligas vian spiriton? Ĉu mi ne estas detruanta vian inteligenton? Se mi devigas vin fari ion, ĉar mi kredas, ke tio estas bona, ĉu mi ne stultigas vin? Kaj vi ŝatas tion. Vi ŝatas, ke oni devigu vin fari ion, eĉ se ekstere vi protestas. Tio donas al vi sekurecon. Se vi ne lasus vin trudi, vi kredus vin malafabla, vi opinius vin malprava; do vi diras: "Disciplinu min, mi petas, helpu min bone konduti."

Ĉu mi devas vin disciplini, aŭ ĉu mi prefere komprenigu al vi, kial vi malbone kondutas? Tio signifus, ke, kiel edukisto aŭ parenco, mi ne devas havi ian aŭtoritaton. Mi devas vere voli helpi vin, por ke vi komprenu viajn malfacilojn, por ke vi komprenu, ekzemple, kial vi fuĝis el la kolegio. Mi devas voli, ke vi komprenu vin mem. Se mi devigas vin, mi ne helpas vin. Se, kiel edukisto, mi vere volas helpi vin, por ke vi komprenu vin mem, tio signifas, ke mi povas zorgi nur pri malmulte da lernantoj. Mi povas havi nur malmultajn, por ke mi povu dediĉi mian atenton al ĉiu el ili. Tiam mi ne stariĝus aŭtoritate por devigi vin fari tion, kion vi fine farus sola, se vi komprenus vin mem.

Mi esperas, ke vi tiel vidas, kiel la aŭtoritato detruas la inteligenton. Inteligento ja povas naskiĝi nur en libero - en la libero pensi, senti, observi, demandi. Sed se mi devigas vin, mi faras vin tiel stulta kiel mi mem estas; kaj tio ĝenerale okazas en lernejo. La profesoro kredas, ke li scias kaj ke vi ne scias. Sed kion li scias? Malmulte krom sia matematiko aŭ sia geografio. Li solvis neniun el la ĉefaj problemoj, li ne pridemandis sin pri

tio plej grava en la vivo - kaj li tondras kiel Jupitero aŭ kiel adjutanto.

Do, en kolegio kiel tiu ĉi, gravas, ke anstataŭ disciplini vin, oni vin helpu kompreni, esti inteligentaj kaj liberaj, ĉar fine vi estos kapablaj fronti sentime ĉiujn malfacilojn de la vivo. Necesas por tio kompetentaj edukistoj, kiuj reale interesiĝas pri vi, kiuj ne havas materiajn aŭ familiajn zorgojn, kaj estas la respondeco tiel de la lernantoj kiel de la profesoroj, krei tian situacion. Ne kontentiĝu per obeo, sed trovu la rimedon pensi problemon ĝisfunde. Ne diru: "Mi faras tion, tial ke mia patro volas, ke mi faru tion", sed provu kompreni kial li volas, ke vi faru tion, kial li opinias, ke tiu afero estas bona kaj tiu alia malbona. Pridubu, kion li diras, por ne nur veki vian inteligenton, sed instigi ankaŭ lin esti inteligenta.

Sed kio ĝenerale okazas, kiam vi ekargumentas kun via patro? Li trudas sian vidmanieron. Lin okupas liaj aferoj, li ne havas la necesan amon por trankvile eksidi kaj paroli kun vi pri la grandaj malfaciloj de la vivo, pri la ĉiutaga pano, pri la familio. Li ne volas preni la tempon ĝisfunde ekzameni ĉion tion. Tiam li resendas vin al via lernejo. Kaj via profesoro agas kun vi same. Ĉi-rilate li similas ĉiujn aliajn. Sed estas la tasko de viaj profesoroj, de viaj gepatroj kaj de vi, la lernantaro, disvolvi vian inteligenton.

*D : Kiel esti inteligenta?*

R : Kion vi volas diri? Ke vi deziras metodon por disvolvi la inteligenton? Tio implicus, ke vi antaŭe scias, kio ĝi estas. Se vi volas iri ien, vi konas vian vojaĝcelon kaj vi nur petu vian vojon. Same, vi kredas scii, kio estas la inteligento kaj vi volas metodon por atingi ĝin. Sed la timo, kiu estas en vi, detruas ĝin : ĝi malhelpas vin ekzameni, pridubi, serĉi, ĝi malhelpas vin malkovri la veron. Probable vi estos inteligenta, kiam vi estos malkovrinta kaj komprenanta la timon, kiu estas en vi, kaj ke vi estos liberiginta vin el ĝi. Sed se vi demandas kiel fariĝi inteligenta, vi nur serĉas metodon, kiu stultigus vin.

***

*D : Kial ni sentas nin malsuperaj antaŭ niaj superuloj?*

R : Kiuj estas viaj superuloj? Ĉu tiuj, kiuj scias? Ĉu tiuj kiuj havas titolojn kaj diplomojn? Ĉu tiuj, de kiuj vi esperas ion : rekompencon aŭ oficon? Tuj kiam vi konsideras iun kiel vian superulon, ĉu vi ne konsideras aliajn personojn kiel malsuperajn al vi?

Kial oni kreas tiun distingon inter superaj kaj malsuperaj personoj? Ĝi ekzistas, nur kiam oni deziras ion. "Mi sentas min malpli inteligenta ol vi, mi havas malpli da mono aŭ da kapabloj, mi ne estas tiom feliĉa, kiom vi ŝajnas esti, do mi sentas min malsupera al vi." Alivorte, kiam oni estas enviema, kiam oni provas imiti iun aŭ kiam oni volus akiri ion de tiu persono, oni tuj fariĝas ties malsuperulo, oni lokas lin sur podion, oni atribuas al li tre grandan valoron. Tiel, psike, interne, oni kreas la superulon kaj la malsuperulon, oni kreas tiun senton de malegaleco inter la havantoj kaj la nehavantoj.

Inter la homoj, estas ega malegaleco de la kapabloj. Estas tiu, kiu desegnas la jeton kaj tiu, kiu gvidas la plugilon. Tiuj grandegaj diferencoj en la intelektaj aŭ fizikaj naturdotoj estas neeviteblaj. Sed ni atribuas eksterordinaran gravecon al iuj oficoj. Ni konsideras, ke la guberniestro, la ĉefministro, la inventisto, la scienculo, estas multe pli gravaj ol la domservisto; tiel la ofico fariĝas socia stato. Tiom longe, kiom ni atribuos tian socian staton al tia ofico, nepre estos sento de malegaleco, fosaĵo, kiu fariĝos netranspasebla, inter la kapabluloj kaj la nekapabluloj. Se ni povos senigi la oficon de la socistato, kiu ĝin akompanas, ni kreos veran senton de egaleco. Sed por tion atingi necesas amo; ĉar estas la amo, kiu detruas la senton pri malsupereco kaj supereco.

La mondo estas dividita inter la havantoj - riĉuloj, potenculoj, kapabluloj, tiuj, kiuj havas ĉion - kaj la nehavantoj. Ĉu eblas krei mondon, en kiu tiu divido ne ekzistus? Nuntempe okazas, ke la politikistoj kaj la ekonomikistoj, vidante tiun fosaĵon inter la riĉuloj kaj la malriĉuloj, la kapabluloj kaj la nekapabluloj, provas solvi tiun problemon per ekonomiaj rimedoj kaj sociaj reformoj. Tio efikas ĝis certa grado.

Sed reala transformiĝo ne povas okazi tiom longe, dum ni ne komprenas la tutan procezon de la antagonismo, de la envio, de la malbonvolo. Nur kiam finiĝas tiu procezo, tiam povas esti amo en niaj koroj.

*D : Ĉu eblas havi pacon en niaj vivoj, dum ĉiumomente ni luktas kontraŭ nia medio?*

R : El kio konsistas tiu medio? Ĝi estas la Socio, la ekonomia, religia, nacia organizo, la sociaj klasoj de la lando, en kiu vi kreskis, kaj ankaŭ la klimato. La plimultaj personoj luktas por adaptiĝi al sia medio, esperante akiri oficon kaj profiti de la avantaĝoj, kiujn tiu Socio povas havigi al ili. Sed el kio konsistas tiu Socio, en kiu vi vivas kaj en kiu vi provas adaptiĝi? Ĉu vi iam pensis pri tio? Ĝi staras sur certa nombro da kredoj kaj tradicioj, kiujn oni nomas religio kaj sur ia ekonomia sistemo. Vi estas parto el ĝi, kaj vi luktas por pluteni en ĝi bonan lokon. Sed ĝi estas la produkto de akiremoj, de posedstrebadoj, kun envio, timo, avido, kun, foje, kelkaj eroj de amo. Kaj se vi volas esti inteligenta, sentima, senavida, ĉu vi povas adaptiĝi al tia Socio? Ĉu vi povas tion fari?

Se vi volas krei novan Socion, endas, ke vi, kiel individuo, ne havu tiun akiremon, ke vi havu nek envion nek avidon, nek nacian aŭ patriotan senton, kaj ke via penso ne estu rigide religia. Sed tiom longe, dum vi luktas sen inteligento por alĝustiĝi al via medio, vi nur konformigas vin al la malnovaj putraj valoroj de ambicio, de la povo, de la prestiĝo, de la kredoj.

Tre gravas, ke oni komprenu tiujn problemojn ekde la junaĝo. Kaj ke oni konstruu en si realan liberon, se oni volas krei novan mondon, novan Socion, novajn homajn interrilatojn. La vera rolo de la edukado estas helpi vin sur tiu vojo.

***

## LA RELIGIO

Kiam oni estas juna, eble oni ne estas impresata de la vivkonfliktoj, de la zorgoj, de la momentaj ĝojoj, la fizikaj ruiniĝoj, la timo pro l' morto kaj la mensaj misformiĝoj, kiuj pezas sur la pliaĝaj generacioj. Feliĉe, la plimultaj junuloj ne estas ĵetitaj en la miksbatalon de l' vivo. Sed, maljuniĝante, oni iom post iom baraktas meze de problemoj, de duboj, de materiaj zorgoj, de internaj konfliktoj, kaj oni demandas al si la signifon de ĉio tio. Oni demandas sin pri la suferoj, la mizero, la ruiniĝoj; oni volas scii, kial iuj estas privilegiuloj kaj ne la aliaj, kial tiu estas sana, inteligenta, naturdotita, kapabla, kaj alia misdotita. Se oni estas supraĵema, oni sin lasas kapti de hipotezo, teorio aŭ kredo, kaj oni trovas respondon al ĉio, sed kiu ne estas la vero. Oni ja vidas, ke la vivo estas malbela, dolorplena, kaj oni faras al si demandojn, sed, ne estante sufiĉe sendependa, vigla, inteligenta, kaj animfreŝa por serĉi la veron, oni estas kaptita en teorioj, en kredoj, en iu spekulativo aŭ doktrino ĉioklariga. Iom post iom tiuj ideoj fariĝas dogmoj, kiuj radikiĝas en la spirito kaj oni ne povas liberiĝi el ili, ĉar ankoraŭ pli profunde kaŝiĝas la timo pro ĉio nekonata. Oni neniam frontas tiun timon, oni deturnas sin de ĝi, oni rifuĝas en kredoj. Sed se vi ekzamenas tiujn kredojn - hinduajn, budhanajn, kristanajn aŭ aliajn - vi vidas, ke ili dividas la homojn. Ĉiu dogmaro roligas apartajn ritarojn, truddevigojn, kiuj sufokas la spiritojn kaj disigas la homojn disde la homo. Tiel oni ekiras kun deziro demandi, scii la vivsignifon, kaj, ĉar oni havas nek la sendependecon, nek la viglecon, nek la animfreŝecon necesajn por daŭrigi tiun

esploradon ĝis la fundo, oni falas en kredojn, kiuj fine difektas, koruptas la homon. Malantaŭ la idealisma moralo, kiun ili naskas, ĉiam gvatadas la "mio", kiu senĉese aspiras fariĝi pli granda, pli potenca. Oni konsideras, ke la religio konsistas en la kredo je Dio. Iuj Societoj malaprobas la "nekredantojn", la "ateistojn", aliaj kondamnas la "kredantojn". Estas neniu diferenco inter tiuj du sintenoj.

Resume, la religio fariĝis afero pri kredo, limigo, kiu malhelpas la spiriton iam esti libera. Nur la libero povas malkovrigi tion, kio estas la vero, kio estas Dio, sed neniam kredo, ĉar tiu ĉi estas nur la projekciaĵo de tio, kion oni pensas, ke "Dio "devus" esti, de tio, kio "devus" esti la vero. Se vi "kredas", ke Dio estas amo, ke Dio estas bono, ke Dio estas tio aŭ tio ĉi, vi ne povas kompreni tion, kio ĝi vere estas, kio la vero estas. Sed, ĉu ne? oni volas sin fordoni al kredo, oni volas sin oferi, oni volas konkuri kun aliaj en la serĉado de interna paco kaj virtoj.

Konstante implikite en siaj konfliktoj, siaj suferoj, siaj ambicioj, siaj plezuroj kaj siaj intermitaj feliĉoj, la spiritoj serĉas ion egan al kio alkroĉiĝi, ion, kio superas ilin kaj al kio ili povas identigi sin. Tion ili nomas Dio, la vero, kaj ili imagas, ke ili kunsentas kun ĝi pere de kredoj, de konvinkoj, de raciigoj, de diversaj disciplinoj kaj de morala idealismo. Sed tiu vastega io, kiu naskas tiom da spekulativaĵoj, ankoraŭ estas parto de l' mio. De l' mio ĝi estas projekciaĵo, pere de kiu la mio esperas eskapi el la konfuzo de sia vivo. Oni identigas sin al lando. Oni diras sin hindo, anglo, germano, ruso, usonano. Vi opinias vin hindoj. Kial? Kial vi identigas vin al Hindio? Vivante en urbeto, mizere vivante meze de familiaj kvereloj, vi estas malkontentaj kaj malfeliĉaj; tiam vi identigas vin al lando nomata Hindio. Diri "Mi estas hindo" donas al vi senton pri grandeco, gravecon, psikan kontenton. Kaj por tio vi pretas mortigi, morti aŭ stumpiĝi.

Same, ĉar oni estas tre nebona, ĉiam batalanta kontraŭ si mem kaj la aliaj, en stato de konfuzo, angoro kaj malcerto, kaj ĉar oni scias, ke la morto ekzistas, oni

imagas esti io esence transcenda, tre vasta, kiun oni nomas Dio. Tiu iluzio donas al la individuo senton pri gravеco, kiu feliĉigas lin; ĝi apartenas ankaŭ al la procezo de plivastiĝo, en kiu moviĝas kaj baraktas la mio.

La religioj, tiaj kiaj ni konas ilin, estas aroj da kredoj, dogmoj, ritoj, superstiĉoj; ili inkluzivas la adoradon al idoloj, la kulton al relikvoj, la sinturnon al guruoj, kaj oni opinias, ke ili malfermas la vojon al la fina celo. Tiun celon projekcias ni; ĝi konsistas el tio, kion ni deziras, el tio, kio, laŭ ni, feliĉigus nin, el garantio pri senmorteco. La spiritoj avidaj je certeco kreas dogmojn, pastrojn, superstiĉojn, idolojn, kaj falas en stagnecon. Ĉu tio estas religio? Ĉu la religio estas akcepti la sciojn, spertojn, la asertojn de iuj personoj? Ĉu ĝi estas la praktikado de iuj moraloj? Tio ne estas malfacila : suficas imiti. Sed malantaŭ tiu sinteno, la agresema, ambicia, regema mio senĉese gvatas. Ĉu tio la religio? Endas malkovri la veron, jen kio gravas, kaj ne, ke oni estas riĉa aŭ malriĉa, feliĉa en paro kaj havanta multajn infanojn, ĉar ĉio ĉi finiĝas en la morto. Endas havi, sen ajna kredo, sufiĉe da vigleco, da sendependeco, da iniciatemo, por malkovri per si mem, kio estas la vero, kio estas Dio. Neniu kredo liberigas la spiriton; male, ĝi povas nur korupti, blindigi, faligi en mallumon. La spirito povas esti libera, nur ĉerpante forton en si mem.

La celo de edukado estas la kreado de individuoj, kiujn limigas neniu kredo, neniu modelo pri moralo aŭ respektindeco. Nur la mio sentas sin morala kaj respektinda. Estas vere religia la persono, kiu mem malkovras kaj rekte vivas tion, kio estas Dio, kio estas la vero. Tiu rekta sperto neniam eblas pere de kredo, de ritaro, de kulto. Laŭmezure kiel vi kreskos kaj vivos viajn vivojn, vi, kiel individuoj, povos malkovri la veron de momento al momento kaj tiel fariĝi liberaj.

Multaj homoj opinias, ke liberiĝi el la materiaj aferoj de la vivo estas unua paŝo al religia vivo. Sed tiu ideo estas erara. Forlasi la terajn aferojn estas ege facile. La reala unua paŝo konsistas esti plene libera, sendepende pensi, kio signifas ne esti enfermita en kredoj, nek premita de la cirkonstancoj aŭ de la medio. La li-

bera individuo, kies spirito estas nekondiĉita, povas scii kio estas Dio, kaj la rolo de la edukado estas helpi lin liberiĝi el ĉiuj sistemoj kaj el ĉiuj guruoj, por ke li povu malkovri la realecon. La inteligento de l' individuo vekiĝas en la libero, kiam neniu truddevigo, neniu disciplino agas kontraŭ li. Nur per tiu inteligento naskita de la libero, li povas malkovri tion, kio troviĝas trans la pensado. Tiun vastegecon, kiu havas nek nomon nek limojn, kiun neniu vorto povas mezuri, en kiu estas amo superanta la komprenkapablon, oni devas rekte travivi. La spirito ne povas ĝin koncepti; ĝi do devas esti tre kvieta, mirige trankvila, sen postuloj kaj sen deziroj. Nur tiam eblas la ekapero de tio, kion oni povas nomi Dio.

***

## KIO ESTAS OBEO?

*D : Kio estas obeo? Ĉu ni obeu ordonon, kiun oni donas al ni, eĉ se ĝin ni ne komprenas?*

R : Ĉu ne ĝuste tion vi preskaŭ ĉiuj faras? Viaj gepatroj, viaj profesoroj ordonas al vi fari iujn aferojn. Al vi ili diras tion ĝentile aŭ kun bastono, kaj, ĉar vi timas ilin, vi obeas. Same agas la registaroj kun ties armeoj. Vi estas trejnitaj obei sen scii, pri kio temas. Ju pli ordonemaj la gepatroj kaj ju pli tiranecaj la ŝtatoj, des pli ili modlas vin ekde la infanaĝo. Kaj ili diras al vi ankaŭ kion vi pensu. La spiritoj estas malplenigitaj je ĉiu penso, kiun ne aprobus la Ŝtato aŭ la lokaj aŭtoritatoj. Neniam oni helpas vin, lernigas vin kiel pensi. La pastroj gvidas viajn konsciencojn, apoge de religiaj libroj kaj, ĉar vi havas profundan timemon, vi obeas, se ne, vi estus en konfuzo, vi sentus vin perditaj.

Tiel, oni obeas, tial ke oni ne pripensas. Oni ne volas pensi, ĉar pensi estas pridubi, esplori, serĉi per si mem, kaj ĉio tio estas maltrankviliga. La plenkreskuloj kontraŭas tiajn iniciatojn kaj cetere ne havus la paciencon aŭskulti viajn demandojn : tro okupas ilin iliaj kvereloj, iliaj ambicioj, iliaj antaŭjuĝoj, ilia moralo kaj ilia respektindeco, kaj vi, kiuj estas junaj, timas malbone agi, ĉar ankaŭ vi ambicias esti respektindaj. Vi ne volas aspekti diferencaj de la aliaj, vi ne volas pensi memstare, nek ke oni montru vin kiel nealiĝinton al grupo.

Kiom ajn aĝa vi estas, vi obeas, vi sekvas, vi imitas, ĉar interne vi timas, vi estas en malcerto. Kaj ĝuste

certon vi serĉas : samtempe ekonomian kaj moralan; vi volas, ke oni aprobu vin, vi serĉas trankvilan pozicion, kie vi enfermus vin, neniam havante zorgojn. Via timo estas konscia, sed ankaŭ nekonscia, kaj tial vi estas obe-emaj. Malhelpas vin malbonfari al aliaj la timo pro la puno. Tiel ĉiuj viaj agoj, ĉiuj viaj strebadoj, kaŝas la deziron pri certeco, pri sekureco, pri trankvileco. Endas konscii tiun profundan timon kaj observi tagon post tago ties diversajn manifestiĝojn. Tiam oni povas liberiĝi el ĝi, kaj tiam povas aperi komprenkapablo, kiu estas stato de individua unikeco, en kiu estas nenia akumulado de scioj aŭ spertoj.

# RIMARKI

## Kompilo de konferencoj en Eŭropo, 1962-1963.

Traduko de
Ruben Feldman Gonzalez

### 1. Kie komenci

Ne komprenante la mekanismon, la tutan procezon de la propra menso, oni ne povas iri tre malproksimen. Kaj ni devas entrepreni vojaĝon en la netempon. Por fari tion, ni devas komenci plej proksime: ĉe ni mem. Tial gravegas rimarki la funkciadon de la propra menso, kio estas la komenco de memkono.

Tra la tuta mondo, per sia kapablo skribi kaj sin esprimi, lertaj kaj surfacaj mensoj influas multajn personojn, kiuj, tro taksante informadon aŭ konon, fariĝas pli kaj pli dependaj de eksteraĵoj.

Kvankam utila kaj necesa en certaj niveloj de la ekzisto, kono ne estas celo en si mem kaj kiam oni ĝin trogravigas, ĝi fariĝas fonto de sopiro, kulpo, malespero.

La menso trejniĝis per kono kaj pasis tra multaj konfliktoj, pluraj spertoj, alkroĉata al sennombraj influoj. Ĉu tia menso povas liberiĝi kaj esti nescia? Certe nur nescia menso malsopiras, maltimas, ne malesperas. Sed en la moderna mondo ni enfermiĝas en timo, malespero, en granda sento de necerteco.

## 2. Malespero

Ni havas diversajn formojn de malespero. Malespero pro nia nepovo realigi nin, atingi celon, esti iu en la mondo ktp. Estas ankaŭ malespero pro soleco kaj malespero pro senfina konfuzo. Ne sciante kion fari, ni nin turnas al iu (politikestro, religia gvidanto, sciencisto) por ke li diru al ni kion fari. Kaj frue malfrue ni konas la tutan senutilon, ke oni diru al ni kion fari.

Ĉar ni estas necertaj, malesperaj, ni amasigas sperton, sed kono ne malaperigas malesperon, sperto ne malaperigas sopirsenton en la vivo. Kono kaj sperto, senfine postulante ankoraŭ plian sperton, estas malesperfontoj, tial ke ne ekzistas nescio ene de tiu kondiĉita stato.

Ne malesperas nur freŝa, nescia menso. Sed la plimulto el ni dormemus, se ne estus prestera postulo. Se ni ne devus vivogajni, konkuri kun la proksimulo, interrilati kun nia ĉefo. Se ne ekzistus la stimuloj de propagando, revuartikoloj, kiuj diras al ni kiel sukcesi, kiel ŝupurigisto povas fariĝi milionulo, prezidanto aŭ kio ajn; se ne ekzistus tiuj eksteraj provokoj kaj incitoj, la plimulto el ni havus sengustan, stagnan, stultan vivon. Fakte nia vivo jam estas tia, sed tiu konstanta ekstera premo ade igas nin plue iri.

## 3. Nescio

Mi ne pledas por nescio. Por mi, nescio ne estas manko de libraj konoj. Se vi ne legis la lastajn novelojn, se vi ne konas la filozofion de dialektika materiismo kaj ĉion alian, tio per si mem ne signifas, ke vi estas nesciantoj. Por mi, nescio estas ne rimarki la funkciadon de la propra menso. Manko de memkono estas ignoresenco. Mi ne diras, ke vi devas rifuzi ĉiun libran konon. Ni ne povas. Kion mi asertas, tio estas ke vekiĝinta menso ne bezonas stimulon de provoko. Ĉar ĝi viglas, ĝi ne serĉas iun sperton. Ĝi estas lumo por si mem. Tutcerte tia menso povas vivi en ĉi kulpeca mondo sen sopiro kaj sen malespero. Nur tiu menso, kiu ne vekiĝis, kiu dependas, kiu ignoras sin mem, estas tiu kiu troviĝas en stato de konflikto kaj mizero.

## 4. Tio nenomebla

Ni ĉiuj maljuniĝas, eĉ la junuloj, kaj ju pli ni maljuniĝas, des pli rigide fiksaj en nia normigo ni fariĝas. Niaj pensmanieroj fariĝas pli pezaj, niaj tagoj pli kaj pli rutinecaj kaj ĉio ajn minacanta la kutimon produktas timon kaj sopiron. Neeviteble, je la fino de ĉio tio estas la morto, kiu fariĝas alia terura hororo.

Ne estas do la lerta menso, nek la informita, nek tiu kiu fariĝis filozofieca, prirezonante ĉion por ne esti perturbita, kiu povas kompreni.

Ne estas iu el tiuj, sed nur la NESCIA menso, kiu povas koni aŭ rimarki tiun **ion**, kiun oni povas nomi "tio nenomebla", "nemezurebla" aŭ kiel ajn al vi plaĉu.

## 5. Rompi

La socio kun ties etikokodo, ties respondecoj, ties tradiciaj valoroj, postuladas, ke la individuo alĝustiĝu al **la establita ŝablono** kaj tiun konformitecon oni nomas moralo. Estas malmorala, do, la persono kiu deflankiĝas de la normo. Sed tutcerte oni devas esti absolute libera de la normo, oni devas **rompi plene kun la psikologia strukturo de la socio**, kio signifas RIMARKI TIES TUTAN STRUKTURON EN SI MEM, tiel en la senkonscia menso, kiel en la konscia.

La socio postulas tian obeon, kian patrino atendas de sia fileto kaj, kiel sklavoj de la influo, ni instinkte akceptas socian aŭtoritaton, sacerdotan, simbolan aŭ tradician aŭtoritaton.

En tiaj aferoj, kiel ekzemple konservi la dekstran sur la vojoj, pagi impostojn ktp, ni devas kompreneble akcepti leĝaŭtoritaton, sed ni ne parolas pri tio. Ni parolas pri la psikologia tendenco obei, kiu implicas sklavecon al la influo.

## 6. Libero kaj virto

En konfuza mondo, kie ekzistas tiom da konflikto kaj mizero, eksterordinare urĝas kompreni, ke **libero** estas unuaranga eco de homa menso. Ne konsolo, ne portempa

plezurmomento, sed tutplena libero en kiu povas nur esti feliĉo. Feliĉo ne estas celo per si mem. Same kiel virto, ĝi estas flanka produkto de libero. Libera persono estas virta. Sed homo, kiu nur praktikas virton, sin adaptante al la establita normo de la socio, neniam povos scii kio estas libero kaj sekve neniam povos esti virta. Sen liberiĝo de la estinteco neniel estas libero, ĉar nescia menso estas libera. Libero neniel rilatas al aĝo, neniel rilatas al sperto kaj mi pensas, ke liberesenco mem estas en kompreno de la tuta mekanismo de kutimo, tiel konscia kiel subkonscia.

### 7. Kutimo

La afero ne estas finigi kutimon, sed entute vidi ties strukturon. Vi devas observi kiel formiĝas kutimoj kaj kiel, rifuzante aŭ rezistante unu el ili, fariĝi alia.

Kio gravas estas ĉiam konscii pri kutimo, ĉar tiam, kiel vi mem vidos, ne plu ekzistas kutim-formiĝo.

Rifuzi, rezisti aŭ batali nur pluvivigas kutimon. Sed se vi nur rimarkas la tutan strukturon de kutimo senreziste, vi tiam trovas, ke vi vin liberigas de ĝi kaj en tiu libero okazas io nova.

### 8. Nur vortoj

Ni psikologie estas la rezulto de socia kaj eduka medio. **Socio** kun ties etikokodoj, ties kredoj, ties dogmoj, ties kontraŭdiroj, konfliktoj, ambicioj, monavidoj, envioj, militoj, **estas kio NI estas.**

Ni diras, ke ni esence estas SPIRITO, animo, ke ni apartenas al DIO, sed tiuj estas nur ideoj disdonataj de eklezipropagando aŭ de kiu ajn religia organizo, aŭ ni kolektis ilin de la libroj aŭ de niaj gepatroj, kiuj reflektas la normigon de difinita kulturo. Ni estas, do, esence, manpleno da memoroj, aro da vortoj.

### 9. Pri kio ni interesiĝas

Se ni havas monon, ni turniĝas al la tiel nomataj spiritaj aferoj aŭ al intelektaj amuzaĵoj. Male ni diskutas pri

arto aŭ dediĉas nin al pentrado por mem esprimiĝi.

Se ni ne havas monon, ni pasigas la tempon, tagon post tago, por ĝin gajni kaj ni estas enkaptitaj en ĉi senfina rutino kaj enuo. La plimulto el ni estas lertigita por mekanike funkcii en iu dungo, jaron post jaro.

Ni havas respondecon, edzinon kaj gefilojn vivtenotajn, kaj enkarcerigitaj en ĉi tiu malsaĝiĝinta mondo, ni klopodas esti seriozaj, fariĝi religiaj, ĉu irante al preĝejo, aŭ partoprenante tiun aŭ tiun ĉi religian organizon.

Sed nenio el tio okazigos la eksterordinaran mensan transformiĝon. La mondo krizostatas kaj estas malintegriĝo, degenero. Ĉirkaŭate de la degenero, ni do sentiĝas malkapablaj eliri el ĝi.

## 10. Tio lernita

Nia konscio estas la tutareo de nia penso, la tuta kampo de la ideo kaj idekonstruo.

Organizita penso fariĝas ideo, el kiu ŝprucas agado; kaj konscio fariĝas el la multaj penstavoloj, tiel kaŝaj kiel evidentaj, tio konscia same kiel tio nekonscia. Ĝi estas tio lernita, la pasinteco rilate al la estonteco. La pasinteco heredita longe de jarcentoj, pasinteco de raso, nacio, komunumo, familio, la simboloj, la paroloj, la spertoj, la kolizio de kontraŭdiraj deziroj, la nenombreblaj luktoj, plezuroj kaj doloroj, la aferoj lernitaj de niaj antaŭuloj kaj la aldoniĝintaj modernaj teknikoj; ĉio tio estas konscio, la kampo de la penso, la kampo de tio konata kaj ni vivas en ĝia surfaco.

Oni instruas al ni ekde l' infanaĝo havigi al ni konojn, konkuri; ni lernas teknikon, ni fakiĝas iucele por havi dungon, por vivteniĝi. Tio estas nia tuta eduko, tial ni daŭre vivas en la surfaco kaj sub la surfaco ekzistas la ega pasinteco, la nememorebla tempo. Ĉio tio estas la konato. Kvankam ni ne rimarkas tion senkonscian, tio estas malgraŭ ĉio ene de la kampo de tio konata.

Tiu estas unu el la plej grandaj problemoj de moderna vivo, tial ke oni instruas, edukas, kondiĉigas nin por resti en la kampo de la konato kaj ene de tiu kampo estas senfina sopiro, malespero, mizero, konfuzo, doloro.

Nur tiu nescia povas esti kreiva, povas krei ion novan kaj ne nur mekanike verki, pentri aŭ fari ion ajn.

## 11. Paroloj

La plimulto el ni estas sklavoj de la paroloj, kiuj jam fariĝis eksterordinare gravaj. Paroloj estas necesaj kiel komunikrimedoj, sed por la plimulto el ni parolo estas menso, kaj ni estas sklavigitaj de la vortoj.

Ĝis ni komprenos tiun profundan aferon, kiu estas paroligo, la parolgravecon, kaj kiom sklavaj ni estas de paroloj, ni ankoraŭ pensos mekanike, same kiel kalkuliloj.

Kalkulilo estas parolo kaj problemo. Sen problemo kaj parolo ne estus kalkulilo, ĝi ne havus ian valoron. Por la plimulto el la homoj ankaŭ parolo kaj problemo estas ege gravaj.

## 12. Plena mutacio

Se ne okazos plena ŝanĝo, kompleta mutacio en la tuta individua konscio, kiu ajn socio bazita sur atingimpulsoj kaj agreso fariĝos pli kaj pli kruela, pli kaj pli tirana, pli kaj pli ŝatanta materiismajn valorojn, kio signifas, ke la menso fariĝos ĉiam pli sklava de tiuj valoroj. Mi ne scias, ĉu vi rimarkas ĉion tion. Eble la plimulto el vi legas la ĵurnalojn ĉiutage kaj domaĝe kutimiĝas al tio. Vi kutimiĝas al tio. Vi kutimiĝas legi pri kruelaĵoj, mortigoj, brutecaĵoj. Legi ĉion tion ĉiutage malakrigas la menson kaj tiel oni kutimiĝas al tiuj aferoj.

Oni observas la katastrofan mondostaton kaj sentas, ke nepre devas okazi ega revolucio, kompleta mutacio en la menso, por ke homo estu vere libera de problemoj, sen doloro, por ke li vivu plenan ekzistadon, kaj ne estu la kondukata, kondiĉita, torturata ento, kiu li nun estas.

## 13. Rimarki

Vi devas rimarki viajn pensomovojn, observi viajn aktivecojn, ĉu konsciajn aŭ senkonsciajn, sen taksado. Tio postulas eksterordinare viglan, aktivan menson. Sed en la plimulto el ni la menso estas mallerta, duondorma; nur par-

toj el ĝi aktivas, la fakiĝintaj partoj, per kiuj ni funkcias aŭtomate laŭ interligoj kvazaŭ elektrona cerbo. Ni vidas, ke en moderna civilizacio, kie ĉio plej alte organiziĝas, pli kaj pli mankas libero en nia agado. Ni perdas spontanecon en la agado. Por la plimulto el ni agado fariĝis rutino. Ne gravas, ĉu ni iras al la oficejo ĉiutage, ĉu ni lavas telerojn en la kuirejo, ĉu ni verkas, pentras aŭ kio ajn, nia agado fariĝas pli kaj pli kanalizita, muldiĝinta al serio de normoj, kaj kiam ĉio kion ni faras estas rutino, senescepte oni tute ne demandas pri agado.

## 14. Interna revolucio

Ĉiu el ni bezonas mutacion, transformiĝon ene de la plej profunda parto, ĉe la radikoj mem de nia konscio, alimaniere ni estas aŭtomatoj vivantaj en ombra surfaca mondo de konfliktoj, doloroj, mizeroj, respondante nur al la plej surfacaj postuloj. Por estigi tiun fundamentan internan revolucion, ni bezonas demandi al la agado. Ni devas eltrovi, ĉu ĝi ne estas agado trudita de la cirkonstancoj, de la ambicio, de sociaj postuloj, de transformigaj idealoj, de naciismaj aŭ alispecaj premoj. Por malkovri ĉu tiu agado ekzistas, ni devas eniri tre profunde en ni mem, tiel profunde, ke la menso ne estu plu operacianta laŭ ideoj, konkludoj, memoroj kaj ke ĝi estu, do, kapabla vivi en tiu plena estanteco, kiu per si mem modifas la naturon de la agado.

## KIO ESTAS AMI ?

Ĉu ne estos granda tragedio, se vi ne malkovros por vi mem kio estas ami? Se vi ne konas amon nun, vi neniam konos ĝin, ĉar kiam vi maljuniĝos, tio, kion oni nomas amo, iĝos malbelegaĵo - posedaĵo, ia komercaĵo por vendi aŭ aĉeti. Sed se vi nun komencas havi amon en la koro, se vi amas la arbon, kiun vi plantas, la vagan beston, kiun vi karesas, tiam - plenaĝiĝante - vi ne restos en via malgranda ĉambro kun ĝia mallarĝa fenestro, sed vi forlasos ĝin kaj amos la tuton de vivo.

Amo estas fakta, ĝi ne estas emocia - io pri kio oni ploras. Ĝi ne estas sentimentalo. Amo tute ne enhavas sentimentalecon. Kaj estas ege serioza kaj grava afero, ke vi konu amon dum vi estas junaj. Viaj gepatroj kaj geinstruistoj eble ne konas amon, kaj pro tio ili kreis teruran mondon, socion ĉiam batalantan kontraŭ si mem kaj kontraŭ aliaj socioj. Iliaj religioj, iliaj filozofioj kaj ideologioj ĉiuj estas falsaj, ĉar ili ne enhavas amon. Ili perceptas nur parton: ili rigardas tra mallarĝa fenestro, de kie la elrigardo povas esti agrabla kaj vasta, sed ĝi ne estas la tuta amplekso de vivo. Sen tiu sento pri intensa amo, vi neniam povos havi percepton de la tuto; do vi ĉiam estos malfeliĉaj kaj je la fino de via vivo, vi havos nenion, krom cindro, multaj malplenaj vortoj.

*

Mi opinias, ke estas malbeno esti ambicia. Ambicio estas formo de mem-intereso, de mem-enfermiĝo kaj tial ĝi generas mens-nebonecon. Vivi en mondo, kiu estas plena je ambicio, sen esti ambicia, signifas ami ion por ĝi mem sen serĉi rekompencon, rezulton. Kaj tio estas ege malfacila, ĉar la tuta mondo, ĉiuj viaj amikoj,

konatoj, baraktas por sukcesi, por plenumiĝi, por iĝi iu grava. Sed kompreni kaj liberiĝi de ĉio ĉi, kaj fari ion, kion vi vere amas - kio ajn ĝi estas, aŭ kiel ajn modesta kaj malagnoskita - **tio**, laŭ mi, vekas la spiriton de grandeco, kiu neniam serĉas aprobon, rekompencon, kiu agas pro la agado mem kaj tial havas sufiĉajn fortecon kaj kapablecon por ne esti kaptata de la influo de neboneco.

............

Aspiri al sekureco en niaj interhomaj rilatoj nepre signifas vivi en sufero kaj timo. Tiu aspiro al sekureco estas kvazaŭa invito al malsekureco. Ĉu vi iam trovis certecon en viaj interhomaj rilatoj? Ĉu ĝin vi trovis? Ni deziras tiun trankviligon, kiam ni amas kaj deziras, ke oni reciproke amu nin; sed ĉu du personoj povas ami unu la alian, se ĉiu el ambaŭ serĉadas sian propran sekurecon laŭ sia propra vojo? Oni ne amas nin, tial ĉar ni ne scipovas ami.

Kio estas amo? Tiu vorto estas tiel misuzata kaj koruptita, ke mi apenaŭ kuraĝas prononci ĝin. Ĉiuj parolas pri amo: ĉiuj periodaĵoj, ĉiuj gazetoj; kaj la misiistoj parolas pri eterna amo. "Mi amas mian landon, mi amas mian reĝon, mi amas tian libron, mi amas tiun montaron, mi amas la plezuron, mi amas mian edzinon, mi amas Dion..." ... Ĉu amo estas ideo? Ĉi-kaze oni povas ĝin kulturi, ĝin nutri, ĝin flegi, ĝin disvolvi, ĝin misformi ĉiumaniere.

Kiam vi deklaras, ke vi amas Dion, kion tio signifas? Ke vi amas projekciaĵon eliĝintan el via imago, projekciaĵon el vi mem, vestitan per speco de respektindeco, konforma al tio, kion vi kredas nobla kaj sankta. Diri "Mi amas Dion" estas absurdaĵo. Adori Dion, tio estas adori sin mem, tio ne estas amo.

*

Ĉar ni ne trovas solvon al la interhoma amo, ni uzas abstraktaĵojn. La amo ja povus esti la fina solvo al ĉiuj malfacilaĵoj inter la homoj, al iliaj problemoj, al ilia malĝojo, sed kiel fari por scii tion, kio ĝi estas? Ĉu ĝin

difinante? La Eklezio difinas ĝin iel, la socio aliel, kaj krome estas ĉiuspecaj deviaĵoj kaj perversoj: adori iun, amori kun iu, interŝanĝi emociojn, kunvivi, ĉu tion ni nomas amo? Jes ja, kaj tiuj nocioj estas bedaŭrinde tiel personaj, tiel sensaj, tiel limigitaj, ke la religioj kredas sin devigataj proklami la ekziston de transcenda amo. En tio, kion ili nomas la homa amo, ili konstatas plezuron, ĵaluzon, deziron arogi, posedi, kapti, superregi, interveni en alies penso, kaj, vidante tiun tutan kompleksecon, ili asertas, ke ekzistas alia amo, dia, sublima, nerompebla, nepoluita.

Sanktuloj, ĉie en la mondo, asertas, ke rigardi virinon estas malbone; ke neeblas proksimiĝi al Dio, se oni trovas plezuron en seksaj rilatoj; kaj, tiel, ili repelas siajn dezirojn, kiuj voras ilin. Neante la seksecon, ili ŝtopas al si la okulojn kaj fortiras la langon, ĉar ili neas la tutan belecon de la tero. Ili malsatigis sian koron kaj sian spiriton. Ili estas skleroziĝintaj, ili forpelis la belecon, tial ĉar la beleco estas asociita kun la virino...

- *Kion vi nomas amo?*

- Ni malkovros kio estas amo, komprenante ĉion, kio kvankam tiel nomata, ne estas amo. Ĉar amo estas tio nekonata, ni povos ekkoni ĝin nur flanken metante la konataĵojn. La nekonataĵon ne povas malkovri spirito plena de konataj elementoj. Kion ni tuj faros, tio estas malkovri la valoron de tio konata, rigardi la konatan ; kaj kiam ĝin ni vidos kun pureco, senkondamne, niaj spiritoj liberiĝos el ĝi ; kaj ni scios kio estas amo. Endas do ekpaŝi al amo negative sed ne pozitive.

Kio estas amo por la plimulto el ni? Kiam ni asertas, ke ni amas iun, kion ni per tio volas diri? Ke tiun ni posedas. Tiel fontas ĵaluzo, ĉar se ni perdas la amaton, ni sentas nin malplenaj, perditaj. Ni do leĝigas la posedon kaj la stato, kiun akompanas sennombrajn konfliktojn, evidente ne estas amo.

Amo ne estas sentimentaĵo. Esti sentimentala, emociita, tio ne estas ami, ĉar sentimentalo, emocio estas nur sensacoj. La piulo ploranta pri Jesuo aŭ Kriŝna, aŭ sia guruo aŭ iu alia, estas nur sentimentala, emociiĝema. Li plezuriĝas en tiu sensaco, kiu estas pensprocezo, kaj penso ne estas amo. La penso estas produkto de l' sensacoj. La sentimentala, emociiĝema persono tute ne povas koni amon. Ĉu ni ne estas emociiĝemaj kaj sentimentalaj? Tio estas maniero ŝveligi la egoon. Esti plena je emocio, tio ne estas ami, tial ĉar la sentimentalulo povas esti tre kruela, kiam ties sentimentoj restas senehaj aŭ ne povas esprimiĝi. Emociiĝema persono povas peliĝi al malamo, al milito, al buĉado : ŝi/li povas multe plori por sia religio ; sed amo tio ne estas.

Kaj ĉu pardoni estas ami? Kion enhavas pardono? Vi insultas min, mi incitiĝas pro vi kaj mi tion memoras ; poste pro trudo aŭ pento mi diras al vi : "Mi pardonas al vi." Unue mi retenas, poste mi forĵetas. Kion tio montras? Ke mi restas la centra persono, ke "mi" gravas, ĉar "mi" pardonas. Tiom longe kiom daŭras tiu pardon-sinteno, gravas ja mi, sed ne tiu, kiu min insultis. Tiom longe kiom mi akumulas revenĝemon aŭ mi neas tiun revenĝemon - kion vi nomas pardono - tio ne

estas amo.

La homo amanta ne sentas revenĝemon kaj indiferentas pri ĉio tio. Simpatio, pardono ; rilatoj bazitaj sur posedo, ĵaluzo kaj timo ; nenio el tio estas amo, ĉio tio apartenas al la penso ; kaj tuj kiam la spirito arbitracias, ne estas amo, ĉar la spirito povas arbitracii nur per sia posedemo kaj ĝia arbitracio estas nur posedaĵo sub diversaj formoj. La spirito povas nur korupti la amon, ĝi ne povas naski ĝin, ĝi ne povas doni belon. Vi povas verki poemon pri amo, sed tio ne estas amo.

Evidente ne estas amo, se vi ne reale respektas la "alian", kiu ajn li estas, via domservisto aŭ via amiko. Ĉu vi ne rimarkis, ke vi ne estas respektema, bonvolema, malavara al la personoj laŭdire "malsuperaj" al vi? Vi respektas nur tiujn, kiuj situas "supere", al via mastro, al la riĉulo, al tiu, kiu havas domegon kaj titolojn, al la homo kiu povas havigi al vi postenon, al tiu de kiu vi povas ion akiri. Sed vi piedfrapas tiujn, kiuj situas "sube", vi uzas apartan lingvaĵon al ili. Kie ne estas respekto, tie ne estas amo. Kie ne estas bonfaro, kompato, forgeso, tie ne estas amo. Kaj ĉar la plimulto el ni estas en tia stato, ni ne amas. Ni estas nek respektemaj nek bonfaraj, nek malavaraj. Ni estas posedemaj, plenaj je sentimentoj kaj emocioj, kiuj povas esti orientataj por mortigi, buĉadi, aŭ por unuigi iun malkleran kaj stultan intencon. Kaj kiel do povas esti amo?

Oni povas ekkoni amon nur kiam ĉio tio ĉesis, atingis sian finon, kiam oni ne posedas, kiam oni ne estas nur emociita en kulto al objekto. Tia kulto estas propetado; ĝi celas atingi ion. La homo preĝanta ne konas amon. Ĉar vi estas posedemaj, ĉar vi celas rezultaton per pieco kaj preĝado - kiuj igas vin sentimentalaj kaj emociiĝemaj - nature ne estas amo. Evidentas, ke ne estas amo, se ne estas respekto. Vi povas aserti, ke vi estas respektemaj, sed vi estas tiaj nur al viaj superuloj, tio estas la respekto de la propetanto, la respekto de la timo. Se vi reale sentus respekton, vi estus respektemaj al tiuj plej malaltaj, same kiel al tiuj personoj laŭdire superaj. Ĉar vi ne havas tion, vi ja ne havas amon. Kiom malmulte el ni estas malavaraj, pacemaj, bonfaremaj!

Vi estas tiaj nur kontraŭ profito ; vi estas bonfaraj nur kiam vi vidas, ke tio povas havigi ion al vi. Sed tuj kiam ĉio tio malaperas, tuj kiam tio ne plu okupas la spiriton, kaj kiam la aferoj de l'spirito ne plu plenigas la koron, tiam estas amo. Kaj nur amo povas transformi la nuntempan frenezon, la frenezon de l'mondo. La sistemoj aŭ la teorioj dekstraj aŭ maldekstraj estos vanaj. Vi reale amos nur kiam vi ne plu posedos, kiam vi ne plu estos enviemaj nek avidaj, kiam vi estos respektemaj, kompatemaj, bonvolemaj, konsideremaj al via edzino, viaj gefiloj, viaj najbaroj kaj viaj malfeliĉaj domservistoj.

Oni ne povas "pensi" pri amo, oni ne povas ĝin kulturi, oni ne povas trejniĝi je ĝi. Trejniĝi al amo, al homfrateco, ankoraŭ apartenas al la kampo de l'spirito, do tio ne estas amo. Kiam ĉio tio haltis, tiam amo ekestas kaj tiam oni scias kio estas ami. Amo estas nek kvanta nek kvalita. Kiam oni amas, oni ne diras : "Mi havas la tutan mondon" ; sed kiam oni scipovas ami unu personon, oni scipovas ami la tuton. Ĉar ni ne scipovas ami unu personon, kiu ajn ŝi/li estas, nia amo al la homaro estas malvera. Kiam vi amas, estas nek "unu" persono, nek "la homoj", estas nur amo. Nur per amo niaj problemoj trovos solvon kaj ni povos ekkoni ĝojon kaj feliĉon.

## PRI LA KREDO JE DIO

*- La kredo je Dio estis forta stimulilo, kiu instigis la homon pli bone vivi. Kial vi neas Dion? Kial vi ne provas revigligi la fidon de l'homo je la ideo pri Dio?*

- Esploru ni inteligente la problemon en ties tuta amplekso. Mi ne neas Dion. Estus stulte tion fari. Nur la homo, kiu ne scias kio estas la realo, kontentiĝas per vortoj sensignifaj. La homo, kiu diras "mi scias", ne scias. Kiu vivas la realon de momento al momento, tiu havas neniun rimedon komuniki tiun realecon.

Kredi estas nei la veron ; la kredoj obstaklas al la realo ; kredi je Dio tio ne estas trovi Dion. Nek la kredanto nek la nekredanto trovos Dion ; la realo estas io nekonata, kaj via kredo aŭ nekredo je la nekonata estas nur projekciaĵo de vi mem, do ne estas la realo. Estas ĉie multaj kredantoj, milionoj da personoj kredas je Dio kaj trovas per tio sian konsolon. Unue, kial vi kredas? Vi kredas, tial ke tio havigas al vi kontenton, konsolon, esperon, kaj ankaŭ signifon al la vivo. Efektive, via kredo estas tre etvalora, ĉar vi kredas kaj ekspluatas, vi kredas kaj mortigas, vi kredas je universala Dio kaj vi interbuĉas unuj la aliajn. Ankaŭ la riĉulo kredas je Dio ; li kruele ekspluatas, akumulas monon kaj poste konstruas templon aŭ iĝas filofozo.

Tiuj, kiuj ĵetis bombon sur Hiroŝimon, diris, ke Dio estas kun ili ; tiuj, kiuj ekflugis el Britio por detrui Germanion, diris ke Dio estas ilia helppiloto. La diktatoroj, la ĉefministroj, la generaloj, la prezidentoj, ĉiuj parolas pri Dio ; ili havas senliman kredon je Dio. Ĉu ili estas je la servo de la homaro? Ili diras, ke ili kredas je Dio kaj ili detruis la duonon de l'mondo kaj ĉie estas mizero. La religia maltoleremo disigas la homojn en kredantojn kaj nekredantojn, kaj kondukas al religiaj militoj. Tio montras kiagrade niajn opiniojn pri-

okupas politiko.

Ĉu la kredo je Dio estis "forta stimulilo, kiu instigis la homon pli bone vivi"? Ĉu via stimulilo ne devus esti via deziro vivi pure kaj simple? Se vi bezonas stimulilon, ja interesas vin la stimulilo, sed ne la fakto ebligi vivon al ĉiuj. Kaj ĉar via stimulilo diferencas de la mia, ni interkverelas pri tio. Se ni vivus feliĉaj ĉiuj kune, ne pro nia kredo je Dio, sed pro la fakto de nia homeco, ni dispartigus ĉiujn produktilojn por produkti por ĉiuj. Pro manko de inteligento, ni akceptas la ideon de super-inteligento, kiun ni nomas Dio ; sed tiu Dio, tiu super-inteligento, ne havigos al vi pli bonan vivon. Kio kondukas al pli bona vivo, tio estas inteligento ; kaj ne povas esti inteligento se estas kredo, se estas klasapartigo, se la produktorimedoj estas en la manoj de malplimulto, se ekzistas izolitaj naciecoj kaj suverenaj registaroj. Ĉiuj tiuj aferoj montras evidentan mankon de inteligento. Tiuj aferoj ja obstaklas al pli bona vivo, kaj ne la nekredo je Dio.

Vi kredas diversmaniere, sed viaj kredoj kuŝas sur neniu realaĵo. La realo estas tio kio vi estas, kion vi pensas ; kaj via kredo je Dio estas nur fuĝo el via vivo monotona, stulta kaj kruela. Krome, la kredoj neeviteble disigas la homojn. Estas la Hindo, la Budhano, la Kristano, la komunisto, la socialisto, la kapitalisto ktp... La kredoj, la ideoj disigas ; neniam ili unuigas la homojn. Vi povas kunigi kelkajn personojn en grupon, sed tiu grupo kontraŭstaros al aliaj grupoj. La ideoj kaj la kredoj ne unuigas ; male, ili disigas ; ili estas malintegrigaj kaj detruigaj. Sekve, via kredo je Dio fakte disvastigas mizeron en la mondo. Malgraŭ ke ĝi povis doni al vi momentan konsoladon, ĝi efektive alportis al vi suplementon da mizero kaj detruoj sub formo de militoj, malsategoj, klasdividoj kaj individuaj faroj senkompataj. Do viaj kredoj neniom valoras. Se vi reale kredus je Dio, se tio estus vera eksperimento por vi, via vizaĝo estus ridema, kaj vi ne estus detruantaj homestaĵojn.

Kio estas la realo, kio estas Dio? Dio ne estas vorto, la vorto ne estas la afero. Por koni la nemezureblan, la sentempan, la spirito devas esti liberigita de la tempo, tio estas, ke ĝi devas esti senbalastigita de ĉiu

penso, de ĉiuj ideoj pri Dio. Kion scias ni pri Dio aŭ la vero? Vi scias nenion pri tiu realaĵo! Kion vi scias, tio estas nur vortoj, alies eksperimentoj kaj kelkaj propraj spertero jmalprecizaj. Sed tio ne estas Dio, tio ne estas la realo, tio ne situas trans la kampo de l' daŭro. Por ekkoni kio situas trans la tempo, vi devas kompreni la procezon de l' tempo, tiu tempo kiu estas la penso, la procezo de l'fariĝo, la akumulado de scioj. El tio konsistas la tuta fono de l'spirito ; la spirito mem estas la fono, samtempe tio konscia kaj tio nekonscia, tio kolektiva kaj tio individua. Sed la spirito devas esti liberigita de l'konaro, kio signifas, ke ĝi devas esti tute silenta, ne "silentigita". La spirito, kiu atingas la silenton kiel rezultaton de determinita agado, de praktiko, de disciplino, ne estas spirito silenta. La spirito altrudata, superregata, modlata, kaj kiun oni silentigas, ne estas senmova spirito. Vi povas momente trudi al ĝi resti supraĵe silenta, sed la vera silento venas nur kiam oni komprenas la tutan procezon de la penso. Ĉar kompreni tiun procezon, tio estas ĉesigi ĝin kaj la fino de la pensprocezo estas la komenco de l'silento.

Nur kiam la spirito estas tute silenta, ne nur ĉirkaŭe kaj supraĵe, sed ĝis la plej profundaj tavoloj, tiam la nekonata povas ekekzisti. La nekonata ne estas objekto de eksperimento ; ĝin la spirito ne povas percepti ; nur la silenton oni povas percepti, la silenton antaŭ la nekonata. Tiom longe dum ajnamaniere funkcias la penso, konscia aŭ nekonscia, ne povas esti silento. La silento liberigas nin el la pasinteco, el la konoj, el la konscia kaj nekonscia memoro. Kiam la spirito tute silentas, kiam ĝi ne estas funkcianta, kiam ekokazas tiu halto, kiu ne estas rezulto de penado, tiam la sentempeco, la eterneco ekekzistas. Tiun staton ne akompanas memoro, ne estas io memoranta, io eksperimentanta.

Dio, la vero - ne gravas la vorto - estas io, kiu ekekzistas de momento al momento, kaj kiu okazas nur en stato de libero kaj spontano, sed ne kiam la spiriton disciplinas imitado de modelo. Dio ne apartenas al la pensomondo ; ĝi ne venas tra la projekcioj de ni mem ; ĝi venas nur kun la virto, kaj la virto estas libero. La virto konsistas en fronta vidado al tio, kio "estas" ; esti

fronte al tiu fakto estas stato de feliĉo. Nur kiam la spirito estas en tiu stato de feliĉo kaj trankvilo, sen eĉ la plej eta moviĝo, sen projekciado de penso, konscia aŭ nekonscia, nur tiam povas naskiĝi la eterneco.

# ENHAVO

*Portreto de Jiddu Krishnamurti* 1

* El "Fronte al la vivo" (Life ahead, 1963)

**Enkonduko** 4

**La timo** 21

**La libero** 25

**La aŭtoritato** 31

**La religio** 38

**Kio estas obeo ?** 42

* Kompilo de konferencoj en Eŭropo 1962-1963

**Rimarki** 45

* Kio estas ami ? 52

* El "La unua kaj lasta libero"

(The first and last Freedom, 1954)

**Kion vi nomas amo ?** 55

**Pri la kredo je Dio** 58

La tradukintoj

Ĝis p.44 kaj ekde p.52, esperantigis : Kribo.
De p.45 ĝis p.51, tradukis : Ruben Feldman Gonzalez

En la sama kolekto de SAT-Broŝurservo :

**Eduko kaj Vivsignifo** (J. Krishnamurti), 40 paĝoj

Por SAT-broŝurservo presis : Baudé, F 47470 Beauville

# EDUKO
# KAJ
# VIVSIGNIFO

Jiddu KRISHNAMURTI

**SAT-Broŝurservo / Laŭte!**
FR 47470 Beauville
1998

# *KRISHNAMURTI*

*Kio ni estas ? Kiu estas la senco, la vera signifo de ĉi tiu febra faro kaj malfaro ĉiutaga, ena kaj ekstera, morala kaj materia ?*

*Homo kredas (ekzistas malmultaj esceptoj) agi libere, laŭ propra volo, sed fakte li nur reagas ĉe la eksteraj stimuloj de la medio kaj ĉe la premo de sia psika fono. En tiu nescio li sentas sin sekura kaj pensas ke tio, kion li individue aŭ kolektive faras, estas « la realo », la vivo mem. Li ne dubas pri la normaleco kaj saĝo de tio, kion li faras, kaj pri tiu de la socia mekanismo, kie li vivas.*

*Se ni ne malkovras ĉion ĉi, se ni ne konas nek komprenas nin mem profunde, se ni plu funkcias kiel aŭtomatoj, nia vivo estos ĉiam sensignifa, tre supraĵa. Ni iros laŭ la vojo de la tradiciaĵoj, konfuzaj kaj enretigitaj pro la ĥaoso de la pasioj, fantazioj, suferoj kaj etaj ĝojoj, kiuj konsistigas nian mondon.*

*Al ĉi tiu eksterordinara kaj vitala malkovro kondukas la parolo de Krishnamurti. Pritraktante la saman problemon centfoje laŭ ties diversaj anguloj.*

*Ĉi tiun malkovron neniu povas fari por alia persono. Por ke ĝi alvenu, ni bezonas energion, malkvieton, pasian deziron por vero, por kompreni la vivon, la adan moviĝon de nia sento, penso kaj faro ; eĉ la sencon de niaj diroj. Tiam ni « mortas » por ĉio malnova, por la pasinteco, por la konataĵoj, ni vekiĝas transformiĝantaj. Tiam alvenas vera mensa mutacio. Tiam ni ekkaptas la cirkaŭan brutecon ; ni perceptemas la stultaĵojn ambicio, posedavido, atingo kaj gajno. Ni ekkomprenas la kialojn de malamo, perforto, intertrompo, timo kaj sufero.*

*Ĉio renversiĝas, oni povus diri, kaj ekaperas novaj rilatmanieroj inter homoj kaj antaŭ la aĵoj. Supozeble ĉi tie ni ne parolas « pri » Krishnamurti. Oni ne povas paroli pri Krishnamurti, same kiel oni ne povas paroli pri amo aŭ pri la parfumo de ekzotika floro. Oni perceptas ĝin kaj scias, do, kio ĝi estas, aŭ oni ĝin ne sentas kaj ĝi*

*ne ekzistas por oni mem.*

*Krishnamurti plene vivas tion, pri kio li parolas. Li estas tute libera de la egocentra revo. Mi ne scias kiagrade, kiel profunde kaj belece li perceptas ĉion. Eĉ estus vane, ke li priskribu tion al ni. Ni reduktus ĉion al nia propra nivelo, al nia nuna stato. Ni ne sentus la florparfumon.*

*Sed ni povas malkovri. Kaj ĉio, kion Krishnamurti diras, helpas nin malkovri, komencante ekde nia propra malkovrado.*

*Ne gravas kion ajn ni faras en nia reva stato : cerbumi, havigi al ni konon aŭ monon, teknikiĝi, serĉi sensaciojn, distron, aliri nelaboron, komercajn, sciencajn aŭ religiajn aktivadojn. Se ni malkovras nian konscian staton, sen la elradika ŝanĝo, kiu tiam okazas, ĉio, kion ni faras, eĉ plej bonintence, daŭrigos sur la mondo stulton, korupton kaj suferon same kiel ilin ni nun vidas (se ni eĉ kapablas ekkapti la evidenton). Se ni ne malkovras nin, se ni ne konas nin, se ni ne vekiĝas, ni ankoraŭ vivos en infero, ne sciante, ke ĝi fakte estas infero.*

*Se ni estas seriozaj, ni neeviteble renkontiĝos kun Krishnamurti kaj li helpos vidi la mondan inferon, nur respegulon de tiu, kiu ekzistas ĉe ni. Ĉar la mondo estas kio ni estas.*

*Kion pli ni diru ? Ni povus paroli senfine, ne pri Krishnamurti sed pri nia propra vekiĝo. Ne necesas. Multaj vortoj konfuzigas. Tie, kie la grundo estas preta, sufiĉos tio jam dirita.*

*Rubén Feldman González*

# EDUKO KAJ VIVSIGNIFO

Kiam oni vojaĝas ĉirkaŭ la mondo, oni vidas ĝis kia eksterordinara grado homa naturo estas ĉie la sama, en Ameriko kiel en Hindio, en Eŭropo kiel en Aŭstralio. Kaj tio veras ĉefe ĉe universitatoj kaj gimnazioj. Ni kvazaŭ ŝablone produktadas homan tipon, kies precipa vivintereso estas trovi sekurecon, fariĝi gravulo aŭ tutsimple sin amuzi senpripense.

Konvencia eduko igas malfacila la sendependan penson. Konformiteco kondukas al trivialeco. Diferenci de grupo aŭ rezisti la medion estas nefacile kaj ofte dangere dum ni kultas al sukceso. Tiu aspiro al sukceso – tiu celado al rekompenco ĉu en la materia mondo ĉu en la t.n. spirita, kiu estas priserĉo de ekstera aŭ interna sekureco, deziro pri komforto – tiu tuta procezo sufokas malkontenton, forigas spontanon kaj naskas timon. Kaj timo baras la inteligentan komprenon pri la vivo. Poste, pro la maljuniĝo, la menso malakriĝas kaj la koro fariĝas malsentema.

Serĉante komforton kaj bonfarton, ni ĝenerale rifuĝas en angulo de la vivo, kie troviĝas minimume da konfliktoj, kaj poste ni timas eliri el tiu rifuĝejo. Tiu timo al la vivo, al la lukto kaj al novaj eksperimentoj, mortigas ĉe ni la aventuremon. Nia tuta eduko, ĉiuj influoj de nia medio, igas nin timi malsimili niajn najbarojn, aŭ pensi kontraŭ la establitaj sociaj normoj, kaj igas nin false respektemaj al aŭtoritato kaj tradicio.

Feliĉe, estas kelkaj sinceraj personoj, kiuj emas ekzameni niajn homajn problemojn sen ajna antaŭjugo, sed en la plimulto el ni ne ekzistas reala malkontentemo, ribelemo. Kiam ni senkomprene cedas al la medio, nepre malvigliĝas la ribelemo, kiun ni eble havis, kaj niaj respondecoj baldaŭ mortigas ĝin.

Estas du ribelspecoj : la perforta, kiu estas nurnura reago sen kompreno kontraŭ la establita sociordo, kaj la profunda, psika ribelo de la inteligento. Multaj ekribelas kontraŭ la establita ortodokseco nur por fali en novajn ortodoksaĵojn, en novajn iluziojn, kaj en kaŝajn indulgojn por si mem. Kio ĝenerale okazas, tio estas ke ni apartigas nin de grupo aŭ idealaro nur por identiĝi kun alia grupo kaj aliĝi al novaj idealoj. Tiel ni kreas novan pensnormon, ŝablonon, kontraŭ kiu ni devos plian fojon ribeli. Reago naskas nur oponon kaj ĉiu reformo necesigas postajn reformojn. Sed inteligenta ribelo ne estas reago : ĝi akompanas la konon pri si mem, tiun memkonon kiu estas akra percepto pri niaj pensoj kaj sentoj. Nur alfrontante la eksperimenton tiel kiel ĝi prezentiĝas, sen proveviti perturbiĝojn, nur tiel ni plu tenas vigla nian inteligenton, kaj tre vigla inteligento estas la nura vera gvidilo en la vivo.

Sed kio estas la vivsignifo ? Por kio ni vivas kaj luktas ? Se ni estis edukitaj nur por atingi honoraĵojn aŭ bonan pozicion, por esti eficientaj* aŭ estri aliajn, do niaj vivoj estas malplenaj kaj malprofundaj. Se ni estis instruitaj nur por esti scienculoj, erudiciuloj aŭ konavidaj fakuloj alkroĉitaj al libroj, do ni kontribuas al la detruo kaj mizero de l' mondo.

Ĉar fakte ekzistas pli alta kaj pli nobla vivsignifo, kian valoron havas nia eduko, se ni malkovras ĝin neniam ? Eĉ se ni estus kleregaj, ni tamen ne havus profundan integriĝon de penso kaj sento, niaj vivoj ankoraŭ estus malkompletaj, kontraŭdiraj kaj turmentataj de ĉiuspecaj timoj. Tiel longe dum eduko kulturas neintegran vivbildon, ĝi do havas malmulte da signifo.

En nia nuna civilizo, ni dividis la vivon laŭ tiom da fakoj, ke eduko ne multe signifas, krom instrui profesion aŭ difinitan teknikon. Anstataŭ veki la tutan inteligenton de individuo,

---

* eficienta : reale efika, rendimenta.

eduko instigas lin alĝustigi al ŝablono kaj sekve malhelpas lin kompreni sin mem kiel totalan procezon. Provi solvi la multajn vivproblemojn ĉe iliaj respektivaj niveloj, tiel apartigitajn en siaj kategorioj, montras kompletan mankon de kompreno.

Individuo konsistas el malsimilaj entoj, sed akcenti iliajn diferencojn kaj stimuli la disvolviĝon de difinita tipo, alportas multajn kompleksaĵojn kaj kontraŭdirojn. Eduko devus efektivigi la integriĝon de tiuj apartigitaj entoj, ĉar, sen integriĝo, vivo fariĝas serio de konfliktoj kaj suferoj.

Kion valoras la kapablo de juristoj, se ili eternigas la disputojn ? Kion valoras kono, se ĝi daŭrigas la konfuzon ? Kion valoras industriaj kaj teknikaj kompetentoj, se ni uzas ilin por nin detrui unu la alian ? Kion signifas nia ekzistado, se ĝi naskas perforton kaj kompletan malfeliĉon ? Kvankam ni eble havas monon aŭ scias gajni gin, kvankam ni eble ĝuas niajn plezurojn kaj niajn organizitajn religiojn, ni estas en daŭraj konfliktoj kun ni mem.

Ni devas distingi tion personan disde tio individua. Tio persona estas akcidenta kaj akcidentaj estas por mi la naskiĝ-cirkonstancoj, la medio kie ni kreskis, kun sia naciismo, siaj superstiĉoj, siaj klasaj kaj rasaj apartigoj kaj siaj antaŭjugoj. Tio persona aŭ akcidenta estas nur momenta, kvankam tiu momento povas daŭri tutan vivon. Kaj ĉar la nuna eduksistemo baziĝas sur tio persona, akcidenta aŭ momenta, ĝi rezultigas pensdegeneron kaj memdefendajn timojn.

Ni ĉiuj estas lertigitaj de medio kaj eduko por serĉi personan sukceson kaj sekurecon. Kvankam ni kaŝas tion per eŭfemismoj, ni estas dresitaj por kelkaj profesioj ene de sistemo bazita sur ekspluatado kaj sur de timo postulataj akiroj. Tia lertigo nepre alportas konfuzon kaj mizeron por ni kaj por la mondo, tial ke ĝi kreas en ĉiu psikajn barilojn, kiuj apartigas kaj izolas lin.

Edukado ne devas esti nura menslertigo. Klerigo igas eficienta sed ne integras. Tiel dresita menso daŭrigas la pasintecon kaj ne kapablas malkovri tion novan. Tial, por scii kio estas vera eduko, necesas ekzameni la tutan signifon de la vivo. Por la plimulto el ni, tiu demando ne estas unuarange grava kaj niaj eduksistemoj substrekas supraĵajn valorojn, kiuj faras nin kompetentaj en iuj kon-fakoj. Kvankam kono kaj eficiento estas necesaj, tro emfazi ilin kondukas nur al konfliktoj kaj konfuzo.

Ekzistas am-inspirita eficiento, kiu atingas pli foren kaj estas multe pli granda, ol la efikeco inspirita de ambicio. Sen amo, kiu donas integran komprenon pri la vivo, eficiento naskas nur krudecon. Ĉu ne tio okazas ĉie en la mondo ? Niaj nunaj eduksistemoj estas kluĉitaj en industriigo kaj milito. Ilia ĉefa celo estas eficiento. Ni troviĝas enkaptitaj en tiu ĉi kruelkonkura kaj reciproke detruiga maŝinaro. Se eduko kondukos nin al milito, se ĝi instruas nin detrui aŭ esti detruitaj... ĉu gi ne fiaskis tute ?

Por estigi veran edukon, evidentas, ke ni devas kompreni la signifon de la vivo entute, kaj por tio ni devas akiri la kapablon pensi rekte kaj sen sekvi penslinion. Tro logika pensanto vere estas senpripensa, tial ke li konformigas al modelo, ripetas frazojn kaj lia penso rutine sekvas sulkon.
Ne eblas kompreni la vivon iel abstrakte aŭ teorie. Kompreni la vivon estas kompreni nin mem kaj jen samtempe la komenco kaj la celo de eduko.

Vera eduko ne estas akiri konojn, kolekti kaj klasi faktojn, sed estas vidi la signifon de vivo kiel tutaĵo. Sed tutaĵon oni ne povas kompreni laŭ unu el ties partoj, kaj tamen tion provas fari la registaroj, la organizitaj religioj, la aŭtoritataj partioj.

La funkcio de eduko estas krei homojn integritajn, do inteligentajn. Ni povas akiri diplomojn kaj esti mekanike eficientaj

sen esti inteligentaj. Inteligento ne estas nura kapablo stakigi informojn, nek fontas el libraroj, nek konsistas en lertaj memdefendaj reagoj aŭ en agresaj asertoj. Kiu ne studis, tiu povas esti pli inteligenta ol erudito. Ni mezuras inteligenton laŭ ekzamenoj kaj diplomoj kaj disvolvis ruzajn mensojn, lertajn pretervidi la urgajn homproblemojn. Inteligento estas la kapablo percepti tion esencan, tion « kio estas ». Kaj veki tiun kapablon en ni mem kaj ĉe aliuloj, jen kio estas eduko.

Eduko devus helpi nin malkovri firmajn valorojn, por ke ni ne plu dependu de formuloj kaj ne plu ripetu sloganojn. Eduko devus helpi nin detrui la naciajn kaj sociajn barilojn anstataŭ ilin fortikigi, ĉar ili naskas antagonismon inter la homoj. Bedaŭrinde, la nunaj eduksistemoj faras nin submetitaj, mekanikaj kaj profunde frivolaj. Kvankam ili vekas nian intelekton, ili lasas nin interne malkompletaj, ŝtonigitaj, sterilaj.

Se ni ne atingas plenan komprenon pri la vivo, niaj individuaj kaj kolektivaj problemoj nur kreskas kaj akriĝas. La celo de eduko ne estas produkti eruditojn, teknikistojn aŭ laborpetantojn, sed integrajn kaj el timo liberajn homojn, ĉar nur inter tiaj homoj povas starigi daŭra paco.

Per memkompreno malaperas timo. Se la individuo devas lukti ĉiumomente kontraŭ la vivo, se li devas alfronti ties kompleksaĵojn, ties mizerojn kaj ekpostulojn, li devas esti ege fleksebla, sekve libera de teorioj kaj pensmodeloj.

Eduko ne devus instigi la individuon alĝustiĝi al la socio aŭ negative harmonii kun ĝi. Ĝi devus helpi lin malkovri la verajn valorojn, kiuj ŝprucas kiel rezulto de nepasia ekzameno kaj memkompreno. Kiam ne estas memkono, individua esprimo estas nur persona aserto kun ĉiuj siaj ambiciaj kaj agresaj konfliktoj. Eduko devus veki ĉe la individuo la kapablon kompreni sin mem kaj ne nur komplezon por esprimo de l' personeco.

Kion valoras instruiteco, se dum la vivprocezo ni detruas nin mem ? Kaj ĉar ni suferas senfinan serion de ruinigaj militoj, ni devas agnoski, ke io radikale erara enestas en la maniero eduki niajn infanojn. Mi kredas, ke la plimulto el ni konscias la problemon, sed ni ne scias kiel alfronti ĝin.

La sistemoj – edukaj kaj politikaj – ne ŝanĝiĝas mistere. Ili transformiĝas kiam okazas ĉe ni ĝisfunda transformiĝo. La individuo, sed ne la sistemo, unuarange gravas ; kaj tiel longe, dum la individuo ne komprenas la tutan procezon de sia ekzistado, neniu sistemo, ĉu dekstra ĉu maldekstra, povas alporti al la mondo ordon kaj pacon.

## Vera eduko

Nescianto estas ne tiu neklera, sed tiu, kiu ne konas sin mem. Klerulo estas stultulo, kiam li serĉas komprenon en libroj, en scikonoj, ĉe eminentuloj. Kompreno alvenas nur al kiu konas sin mem, t.e. al kiu perceptas sian tutan psikan procezon. Eduko, do, versence estas memkompreno, tial ke en ĉiu el ni koncentriĝas la totalo de ekzistado.

Kion nuntempe oni nomas eduko, tio estas amasigo de informoj kaj perlibraj scioj, atingeblaj de ĉiu ajn legpovulo. Tia lern-formo proponas subtilan rimedon por eskapi, kaj samkiel ĉiuj fuĝoj el ni mem, ĝi neeviteble pliigas nian malfeliĉon. Konfuzo kaj konfliktoj rezultas el niaj misaj rilatoj al personoj, aĵoj, ideoj, kaj tiel longe dum ni ne komprenas nek modifas tiujn rilatojn, lernado, informkolektado, lertec-akiro, certe kondukas nin nur al ĥaoso kaj detruo.

Laŭ la nuna sociorganizo, ni sendas niajn gefilojn al lernejo, por ke ili lernu arton aŭ sciencon, per kiu ili iam povos perlabori sian vivon. Ni volas fari el nia infano unue kaj ĉefe specialiston kaj tiel doni al li tutcertan ekonomian stabilon. Sed ĉu lerni teknikon iel faras nin kapablaj kompreni nin mem ?

Kompreneble, necesas, ke ni sciu legi kaj skribi, ke ni havu metion kaj profesion, sed ĉu tiu sci-formo naskas kapablon kompreni la vivon ? Tutcerte ne. Do, se tekniko estas nia nura celo, ni evidente neas la esencon de nia vivo.

Vivo estas doloro, ĝojo, belo, malbelo, amo. Kiam ni komprenas ĝin entute, tiu kompreno, je ĉiu nivelo, kreas sian propran teknikon. Sed la malo ne okazas : tekniko neniam naskos kreivan komprenon. Niatempa eduko estas ega fiasko, ĉar gi trotaksas teknikon. Trogravigante teknikon, ni detruas la homon. Kulturante kapablon kaj eficienton sen kompreni la vivon, sen kompreneme percepti la funkciadon de penso kaj deziro, ni disvolvas nian krudecon, ni estigas militojn, kaj fine endanĝerigas nian fizikan sekurecon. Ekskluziva disvolviĝo de tekniko produktis scienculojn, matematikistojn, pontokonstruistojn, spacokonkerantojn, sed ĉu tiuj komprenas la totalan vivprocezon ? Ĉu specialisto povas percepti la vivon kiel tutaĵon ? Jes, nur kiam li ĉesas esti specialisto.

Teknologia progreso solvas iajn problemojn, por iuj personoj, sur iuj niveloj, sed ĝi ankaŭ estigas pli ampleksajn kaj pli profundajn konsekvencojn. Vivi sur certa nivelo, ne konsiderante la totalan vivprocezon, estas alvenigi mizeron kaj detruon. La plej granda bezono, la plej urĝa problemo por ĉiu individuo estas havi integran vivkomprenon, kiu ebligos al li kontentige solvi la daŭre kreskantajn vivkompleksaĵojn.

Teknika kono, kvankam necesa, neniel solvos niajn spiritostrebojn kaj internajn psikajn konfliktojn. Kaj nur ĉar ni akiris teknikajn konojn sen kompreni la totalan vivprocezon, tial teknikoj fariĝis instrumentoj por nia memdetruo. Homo, kiu scias diserigi la nukleon sed ne havas amon en sia koro, fariĝas monstro.

Ni elektas profesion laŭ niaj kapabloj. Sed ĉu sekvi emon liberigos nin el niaj konfliktoj kaj el nia konfuzo ? Verŝajne ni

bezonas ian teknikan preparon, sed, akirinte la diplomon de inĝeniero, kuracisto, advokato, kion ni atingis ? Ĉu profesiado estas vivefektiviĝo ? Verŝajne tiel estas por multaj el ni. Niaj profesioj povas okupigi al ni la plejparton de niaj vivoj, sed tiuj niaj produktaĵoj mem, kiuj tiel ravas nin, kaŭzas nian detruon kaj nian mizeron. Nia sinteno kaj niaj valoroj transformas niajn okupojn kaj nian mondon en ilojn de envio, amaro kaj malamo.

Sen la kompreno pri ni mem, ĉiuj niaj okupoj alvenigas senigon, frustracion, kun ties nepraj eskapoj tra ĉiuspecaj damaĝaj aktivadoj. Tekniko sen tiu interna kompreno kondukas al malamikeco kaj krudeco, kiujn ni provas kaŝi per belsonaj frazoj. Kion valoras tiom taksi teknikon kaj fariĝi eficientaj entoj, se rezultas reciproka detruo ? Nia teknika progreso estas mireginda, sed ĝi nur pliigis nian povon detrui nin unu la alian, kaj mizero kaj malŝato ĉieas sur la tero. La homaro ne estas paca nek feliĉa specio.

................................................................................

Alia faktoro en tiu kulturo estas, ke ĝi donas al ni senton pri sekuro ne nur ekonomia sed ankaŭ psika. Trankviligas la scio, ke ni estas eficientaj kaj kapablaj. Scii, ke ni kapablas ludi pianon aŭ konstrui domon, tio donas al ni impreson pri vivenergio, agreseman sendependecon. Sed konsideri grava nian kapablon, nur pro nia deziro havi psikan sekuron, estas nei la vivplenecon. La totalan viv-enhavon neniam ni povos antaŭvidi, ĝin ni devas percepti denove de momento al momento, sed ni timas tion nekonatan, kaj tial ni starigas por nia sekuro zonojn de psika protekto per sistemoj, teknikoj kaj kredoj. Kaj tiel longe dum ni celos internan sekuron, la totala vivprocezo ne estos perceptebla de ni.

Bona eduko, tamen samtempe stimulanta lernadon de tekniko, devus plenumi ion multe pli gravan : ĝi devus helpi la homon percepti per eksperimento la integritan vivprocezon.

Nur tiu rekta eksperimento donos al kapablo kaj tekniko la ĝustan lokon. Ĉar, sume, kiam ni havas ion por diri, ĝia esprimado mem kreas la stilon, sed krei stilon sen senti ĝin interne, povas estigi nur artefaritan esprimmanieron.

En la tuta mondo, inĝenieroj persistegas koncepti maŝinojn funkciontajn sen homa kunlaboro. En vivo preskaŭ entute servata de maŝinoj, kio fariĝus la homoj ? Ili havus pli kaj pli da libertempoj, sed ne scius uzi ilin prudente. Ili serĉus fuĝojn en erudicio, en stultigaj amuzoj, en idealoj.

Mi kredas, ke oni verkis multajn volumojn pri idealo en edukado, kaj tamen nia konfuzo pri tiu temo neniam estis pli granda ol nun. Ne povas ekzisti metodo por instrui integriĝon kaj liberon. Tiel longe, dum gravas por ni principoj, idealoj, metodoj, ni nenion faras por helpi la individuon liberiĝi el sia propra egocentra aktivado kaj de ties angoroj kaj konfliktoj.

Neniu idealo, neniu utopia plano pri Estonta Civito estigos la radikalan transformiĝon de l' koroj, kiu ĉefas, se oni volas neniigi la militon kaj eviti tutmondan detruon. Neniu idealo kapablas modifi niajn aktualajn valorojn. Tiujn ĉi oni povas forĵeti nur per vera edukado, bazita sur la kompreno pri « tio estanta ».

Kiam ni kunlaboras por idealo, por estonteco, ni modlas individuojn laŭ nia koncepto pri la estonteco ; ili ne interesas nin kiel homestaĵoj, ĉar interesas nin nur nia ideo pri kio devus esti tiuj individuoj. « Kio devus esti » fariĝas por ni multe pli grava ol « kio estas », nome la individuo kun ĝiaj kompleksaĵoj, tiaj kiaj ili ekzistas. Sed se ni ekkomprenas la individuon rekte, anstataŭ rigardi ĝin tra la ekrano de nia bildo pri « kio ĝi devus esti », tiam tuj okupas nin « kio estas ». Kaj ni ne plu provas transformi la individuon ; nia ĉefa intereso estas helpi, ke ĝi komprenu sin mem. En tio estas neniu propra motivo nek profito. Se ni plene konscias pri « kio estas », ni komprenas ĝin kaj do ni estas liberaj el

ĝi ; sed por konscii pri kio ni estas, ni devas ĉesigi nian strebadon por atingi ion, kio ni ne estas.

Idealo ne havas lokon en edukado, ĉar ĝi malhelpas kompreni la nunon : oni kapablas konscii pri « kio estas », nur kiam oni ne fuĝas en estontecon. Esti turnita al estonteco, strebi al iu idealo, tio montras spiritan malviglon kaj la deziron eviti la nunon.

Ĉu strebadi al artefarita utopio ne estas nei la individuajn liberon kaj integriĝon ? Kiam oni celas idealon, modelon, kiam oni havas formulon pri kio devus esti, ĉu oni ne havas supraĵan kaj aŭtomatan vivon ? Ni bezonas nek idealistojn nek mekanikspiritajn entojn, sed integritajn homojn, inteligentajn kaj liberajn. Voli ekapliki projekton pri perfekta socio, estas batali kaj elverŝi sangon por « kio devus esti », dum ni ne scias « kio estas ».

Se la homoj estus mekanikaj entoj, aŭtomatoj, la estonta mondo estus antaŭvidebla kaj oni povus starigi planojn por perfekta utopio. Tiam ni povus zorge elpensi la kadrojn de estonta socio kaj nin direkti al ilia efektiviĝo. Sed homoj ne estas maŝinoj starigeblaj laŭ difinitaj konceptoj.

Inter nuno kaj estonteco estas vastega nekonataĵo, en kiu multaj influoj agas sur ĉiun el ni. Oferante la nunon al la estonteco, ni uzas erarajn rimedojn por celo, kiun ni imagas probable ĝusta. Sed la rimedoj determinas la celon ; kaj, cetere, kiuj ni estas por difini kio estu la homo ? Kio rajtigas nin decidi ĝian konformiĝon al ajna modelo, kiun priskribas tiu aŭ alia libro, aŭ kiun determinas niaj ambicioj, niaj esperoj kaj niaj timoj ?

Edukado, laŭ mia koncepto, apogas sin sur neniu ideologio, kiuj ajn estas ĝiaj promesoj pri estonta utopio ; ĝi apogas sin sur neniu sistemo, kiel ajn inteligenta, kaj ne devas esti rimedo por iel aŭ aliel kondiĉi la individuon. Edukado devas

helpi la individuon libere maturiĝi, disflori en amo kaj humano. Pri tio ni devus zorgi kaj ne modli la infanon konforme al ideala modelo.

Ĉiu metodo, kiu klasas infanojn laŭ ties karakteroj kaj kapabloj, nur reliefigas iliajn diferencojn kaj pro tio naskas antagonismojn kaj stimulas la sociajn disiĝojn. Ĝi do ne kontribuas disvolvi integritajn homojn. Evidentas, ke neniu metodo kaj neniu sistemo povas esti fundamento de la edukado pri kiu mi parolas. Ekapliklo de metodo estas signo de spirita malviglo ĉe la edukanto. Tiel longe, dum edukado apogas sin sur nete difinitaj principoj, ĝi povas rezultigi nur tre lertajn gevirojn, sed ne homojn kreivajn.

Nur amo povas naski komprenemon pri aliulo. Kie estas amo, tie estas tuja komunikigo kun aliulo, samtempe kaj sur la sama nivelo. Ĉar ni estas mem tiel korsekaj, tiel vakuaj kaj sen amo, tial ni permesis al registaroj kaj sistemoj ekkapti la edukadon de niaj infanoj kaj la gvidadon de niaj vivoj ; sed la registaroj volas eficientajn teknikistojn, kaj ne homojn, ĉar vere homaj estuloj endanĝerigas la Ŝtatojn kaj la organizitajn religiojn. Jen kial registaroj kaj Eklezioj strebas kontroli edukadon.

Vivo ne lasas sin konformigi al sistemo ; ĝin oni ne povas enfermi en kadro, kiel ajn nobla, kaj spirito ekzercita nur al kono de faktoj, ne kapablas ektuŝi vivon kun ĉiuj ĝiaj diversaĵoj, subtilaĵoj, profundaĵoj kaj altaĵoj. Kiam ni instruas niajn infanojn laŭ pensosistemo aŭ aplikante difinitan metodon, kiam ni instruas ilin pensi laŭ fakaj kadroj, tiam ni malhelpas al ili fariĝi integritaj homoj, kaj sekve ili ne kapablas pensi inteligente, do ektuŝi la vivon en ĝia unueco.

Sed la plej alta funkcio de edukado ĝuste estas krei integritajn individuojn, kapablajn konsideri la vivon en ĝia tuteco. Idealisto, tute same kiel fakulo, zorgas ne pri la tuto sed nur pri parto. Ne povas esti integriĝo, kiam oni strebas agi kon-

forme al idealo. Kaj la plimulto el la edukistoj-idealistoj neglektis amon. Sekas iliaj spiritoj kaj koroj. Por studi infanon, la edukanto devas esti atenta, en observa stato, kaj samtempe esti klarvida pri sia propra procezo, kio postulas multe pli da amemo kaj inteligento ol instigi infanon sekvi idealon.

..................................................................................

Alia funkcio de edukado estas krei novajn valorojn. Enradikigi en la spiriton de infano nur la tradiciajn valorojn, tio estas konformigi lin al idealo, kondiĉigi lin sen veki lian inteligenton. Eduko estas intime ligita kun la nuna tutmonda krizo kaj la edukanto, kiu konscias la kaŭzojn de tiu universala ĥaoso, devus sin demandi kiel veki la junularan inteligenton kaj tiel helpi la novan generacion limigi la konfliktojn kaj la ruiniĝojn. Li devas dediĉi sian tutan penson, sian zorgon kaj sian amemon al komprenemo, tiel ke, maturiĝante, la individuoj povu ektrakti inteligente la problemojn, kiuj ekaperos antaŭ ili. Sed tiucele la edukanto devas mem kompreni sin, anstataŭ sin apogi sur ideologioj, sistemoj, kredoj.

Ni ĉesu pensi pere de principoj kaj idealoj. Ni okupiĝu pri la aferoj tiaj, kiaj ili estas.

Eduko, en la vera senco, estas kompreni la infanon tia, kia li estas, sen trudi al li la bildon pri kio li, laŭ nia opinio, devus esti.

Enfermi lin en kadro de idealo, tio estas kuraĝigi lin konformiĝi, kio ĉe li naskas samtempe timon kaj sencesan konflikton inter « kio li estas » kaj « kio li devus esti ». Kaj ĉiuj internaj konfliktoj manifestiĝas ekstere, en la socio. Ĉiu idealo estas vera barilo kontraŭ komprenemo al la infano kaj komprenemo de la infano pri si mem.

Nur en la individua libero povas flori amo kaj homeco ; kaj nur eduko bazita sur memkono povas doni tiun liberon. Nek

la perfekta adaptiĝo al la nuna socio, nek la promeso pri estonta utopio, povas doni al la individuo la internan bildon, kiu necesas al li por eliri el sia konflikta stato.

Bona edukanto, sciante kio estas individua libero, helpas individue ĉiun lernanton observi kaj kompreni la valorojn kaj la sociajn premojn, kiuj emanas el li. Li helpas lin ekkonscii la eksterajn influojn, kiuj kondiĉas kaj influas lin. Li helpas lin vidi, ke la propraj deziroj kontribuas limigi lian spiriton kaj naski timon. Li helpas lin, dum lia disvolviĝo, ekzameni kaj percepti sin en siaj rilatoj kun ĉio ajn. Ĉar estas la aspiro al propra realiĝo, kiu estigas konfliktojn kaj suferojn.

.................................................................

Nur stimulante la infanon pridiskuti ĉiun leĝaĵon, demandi sin pri la reala signifo de la akceptitaj valoroj, tradicioj, regadformoj, religiaj kredoj, ktp, nur tiel la edukanto kaj la gepatroj povas veki kaj pluigi ĉe la infano la kritikemon kaj la klarvidon.

La gejunuloj, se almenaŭ iom vivantaj, estas plenaj de espero kaj malkontento ; kaj tiaj ili devas esti, se ne, ili estus jam maljunaj kaj mortaj. Kaj la maljunuloj estas ribeluloj de l' pasinteco, sed kiuj sukcese sufokis tiun flamon, iel aŭ aliel trovante sekuron kaj komforton. Ili avidas konstantaĵon por si mem kaj por sia familio, ili arde deziras trovi certecon en iu idealo, en siaj rilatoj, en siaj posedaĵoj ; kaj ekde kiam ili sentas tiun internan malkontenton, tiam ili absorbiĝas en siaj respondecoj, en siaj okupoj, aŭ en io ajn, por eskapi tiun tiel ĝenan maltrankvilon.

La junaĝo estas tiu de l' malkontento ; kiam kontentigas nin nek ni mem nek la nin cirkaŭanta mondo. Ni devus lerni pensi klare kaj rekte, por esti interne nek submetitaj nek timemaj. Sendependeco estas ne por tiu kolora mapsekcio, kiun ni nomas « nia lando », sed por ni mem kiel individuoj ; kaj, kvankam ni estas ekstere dependaj unuj de la aliaj, tiu interdependeco ne iĝas kruela nek subprema, se ni, interne,

estas liberigitaj de la deziro akiri potencon, aŭtoritaton, oficon.

Ni devas kompreni la veran malkontenton, kiun timas la plimulto el ni. Tiu malkontento povus estigi ŝajnan malordon. Sed se ĝi kondukas, kiel ĝi devus fari, al memkono kaj abnegacio, tiam ĝi povas krei novan socian ordon kaj daŭran pacon. Kun abnegacio aperas grandega ĝojo.

Malkontento estas la vojo al libero ; sed por kapabli rekte esplori pri vero, oni devas elimini ĉiujn emociajn flankaspektojn, kiaj tiel ofte fariĝas politikaj kunvenoj, sloganoj, ripetitaj krioj, serĉado al guruoj, submetiĝo al spiritaj gvidantoj, ĉiuspecaj religiaj orgioj. Tiuj forfuĝoj eluzas la spiriton kaj la koron. Ili forrabas de ni ĉiun klarvidon, tiel ke ni facile lasas nin modliĝi de timo kaj cirkonstancoj. Novan vivkomprenon naskos ne la facila imitado de l' plimulto, sed la arda esplorado pri vero.

La gejunuloj tiel facile sin lasas instigi de la pastro aŭ de la politikisto, de la riĉulo aŭ de la malriĉulo, pensi laŭ ia maniero ! Sed adaptita edukado devus helpi ilin sin gardi kontraŭ tiuj influoj kaj eviti papage ripeti sloganojn aŭ fali en la retojn de la avido, ĉu propra ĉu aliula. Ili ne permesu al aŭtoritato paralizi iliajn spiritojn kaj korojn. Farigi disĉiplo de eminenta persono, kiel ajn grava ĝi estas, aŭ sin lasi logi de ideologio, tio ne estas rimedoj por krei pacan mondon.

Kiam ni forlasas la kolegion aŭ la universitaton, ĝenerale ni flankenmetas niajn librojn kaj ni pensas, ke lernado estas por ni finita. Male, iuj, stimulitaj kaj dezirantaj plivastigi la kampon de sia penso, plu lernas kaj plu englutas kion aliaj diris, kaj ili dediĉas sin al kleriĝo. Tiel longe dum ni kultos al klero kaj tekniko kiel rimedoj por atingi sukceson aŭ regadon, ni vivos meze de kruelaj konkurencoj, antagonismoj kaj senĉesaj luktadoj por la ĉiutaga pano.

Tiel longe dum ni elektos la sukceson kiel celon, ni ne estos liberigitaj de timo, ĉar la deziro sukcesi nepre naskas la timon malsukcesi. Jen kial oni ne devus instrui al la junularo la kulton al sukceso. La plimulto celas la sukceson sub iu aŭ alia formo, ĉu sur tenisejo, ĉu en mon-aferoj, ĉu en politiko. Ni ĉiuj deziras esti inter la unuaj, kaj tiu deziro senĉese naskas konfliktojn kun ni mem kaj ankaŭ inter ni kaj niaj najbaroj. Ĝi kondukas al konkurado, al envio, al malamikemo kaj fine al milito.

Tute same kiel la antaŭaj generacioj, la gejunuloj celas sukceson kaj sekuron. Kvankam ili komence povas senti ian malkontenton, baldaŭ ili fariĝas respektemaj kaj timas diri « Ne ! » al la socio. La muroj de iliaj propraj deziroj progresive enfermas ilin kaj tiam ili ekpaŝas takte kaj ekprenas la gvidilojn de la aŭtoritato. Ilia malkontento, kiu estis la flamo mem de esploremo kaj komprenemo, estingiĝas kaj mortas, kaj anstataŭe instaliĝas la deziro pri bona situacio, riĉa geedziĝo, brila kariero, mallonge, la soifo pri pli kaj pli certa sekuro.

Ne estas esenca diferenco inter junuloj kaj maljunuloj. Tiuj, samkiel tiuj ĉi, estas sklavoj de siaj deziroj kaj ĝuoj. Matureco ne estas afero pri aĝo : ĝi aperas kune kun la komprenkapablo. La arda esploremo eble estas pli atingebla de junuloj, ĉar la maljunuloj ofte suferis pro la vivo : la konfliktoj eluzis ilin, kaj la morto, sub diversaj formoj, atendas ilin. Tio ne signifas, ke ili estas malkapablaj ĝisfunde esploradi, sed tio estas por ili pli malfacila.

Al multaj plenaĝuloj mankas matureco, ili estas infanecaj, kaj tio estas unu el la kialoj kontribuantaj al la konfuzo kaj al la mizero de l' mondo. Pri la nuntempa ekonomia kaj morala krizo kulpas la maljunuloj, kaj unu el niaj bedaŭrindaj malfortoj estas voli, ke aliaj agu anstataŭ ni, kaj modifu la fluon de niaj vivoj. Ni atendas, ke junuloj ribelos kaj konstruos novan mondon, dum ni restas senfaraj, tial ke ni ne certas pri la rezultato.

Sekuron kaj sukceson celas la plimulto el ni. Kaj spirito, kiu aspiras al sekuro, kiu avidas sukceson, ne estante inteligenta, kontribuas al neniu integrita agado. Povas esti integrita agado nur por la homo tute konscia pri sia kondiĉiĝo pri siaj antaŭjugoj rasaj, naciaj, politikaj kaj religiaj, nome la homo, kiu konscias, ke la egoaj vojoj ĉiam disigas.

La Vivo estas profundakva puto. Ĉe ĝi oni povas sin prezenti aŭ kun etaj siteloj kaj eltiri nur malmulte, aŭ kun grandaj ujoj kaj eltiri abundan akvon, kiu substance nutros. Junaĝo estas esplorperiodo, periodo kiam oni volas ĉion eksperimenti. La lernejo devus helpi la gejunulojn malkovri siajn naturajn kapablojn kaj siajn respondecojn kaj ne nur ŝtopi la spiriton per faktoj kaj teknikaj konoj ; ĝi devus esti la bona grundo en kiu ili povus kreski sentime, feliĉe kaj integre. Instrui infanon, tio estas helpi ĝin kompreni liberon kaj integriĝon. Por ke libero ekzistu, necesas ordo, ordo, kiun nur virto povas realigi. Kaj pri integriĝo, tiu ĉi povas efektiviĝi nur en ega simpleco. Ekde niaj sennombraj kompleksaĵoj ni devas kreski al simpleco. Ni devas fariĝi simplaj en nia interna vivo kaj en niaj eksteraj bezonoj.

Edukado, niatempe, prizorgas la eksteran eficienton kaj tute neglektas aŭ vole fuŝas la internan homnaturon. Ĝi disvolvas nur parton de la homo kaj lasas la ceteron pli-malpli aĉe treniĝi, tiel ke nia interna konfuzo, niaj profundaj antagonismoj, niaj sekretaj timoj, superregas sur la socia tereno, kiaj ajn estas la nobleco aŭ la lerteco, kiuj prezidis ĝian strukturon.

## Eduko kaj paco

Por malkovri la rolon, kiun povas ludi eduko en la nuntempa tutmonda krizo, ni devas kompreni kiel tiu krizo naskiĝis. Ĝi evidente rezultas el eraraj valoroj en niaj rilatoj kun personoj, posedaĵoj kaj ideoj. Se niaj rilatoj kun personoj baziĝas sur propra disvolviĝo, se tiuj kun objektoj estas posedaj, la socia strukturo povas stariĝi nur sur konkuremo kaj disigi nin unujn

de la aliaj. Se, en niaj rilatoj kun ideoj, ni praviĝas ideologion en kontraŭo kun alia, la neevitebla rezultato estas reciproka malfido kaj malamikemo.

Alia kaŭzo de la nuna ĥaoso estas nia submetiĝo al aŭtoritato, ekde la infanlernejo kaj la universitato ĝis en nia ĉiutaga vivo. La gvidantoj kaj ties aŭtoritatoj estas difektigaj faktoroj en ĉiu ajn kulturo. Sekvi iun estas ne havi komprenemon ; tie estas nur timo kaj konformeco, kiuj rezultigas la kruelon de la totalismaj ŝtatoj kaj la dogmismon de Eklezioj.

Sin apogi sur registaroj, peti helpon de organizoj aŭ aŭtoritatoj por tiu paco, kiu devas komenciĝi per memkono, tio estas krei ankoraŭ pli gravan konflikton ; kaj ne povas esti daŭra feliĉo, tiel longe dum ni akceptas sociordon, kiu enhavas senĉesajn luktojn kaj interhoman antagonismon. Se ni volas ŝanĝi la ekzistantajn kondiĉojn, ni devas unue transformi nin mem, t.e. fariĝi konsciaj pri niaj agoj, niaj pensoj, niaj sentoj, en nia ĉiutaga vivo.

Se ni ne efektive volas pacon, ni ne volas ĉesigi ekspluatadon, ni ne akceptas, ke oni intervenu en nia avido nek ke oni modifu la nunan sociordon. Ni volas, ke ĉio plu daŭru kiel antaŭe, eble kun kelkaj supraĵaj modifoj, kaj tiel nepre regas nin potenculoj kaj ruzuloj.

Pacon havigas neniu ideologio kaj dependas ĝi de neniu leĝaro ; ĝi ekaperas nur kiam ni, kiel individuoj, komencas kompreni niajn proprajn psikajn procezojn. Se, rifuzante la respondecon ligitan al ĉiu individua agado, ni esperas, ke pacon alportos al ni iu sistemo, tiu ĉi baldaŭ eksklavigos nin.

Kiam la registaroj, la diktatoroj, la aferistoj, la potencaj ekleziuloj ekkonscios, ke la kreskanta interhoma antagonismo kondukis nin ĝis tia grado de detruivo, ke ne plu eblos eltiri profiton, tiam ili povos devigi nin, per dekretoj aŭ alia

trudpremo, repuŝi niajn ambiciojn kaj kontribui al la homara feliĉo. Same kiel la nuna edukado instigas nin al kruda konkurado, eble iam ni estos devigataj respekti unu la alian kaj labori por la tuta homaro. Sed, eĉ se tiam ni estus bone nutrataj, vestataj kaj loĝataj, ni tamen ne estus liberigitaj de niaj konfliktoj kaj antagonismoj, kiuj simple lokiĝus sur alia tereno, kaj iĝus ankoraŭ pli diablecaj kaj detruivaj. Justa kaj morala agado estas tiu, kiun oni plenumas tutvolonte kaj nur kompreno povas alporti al la homaro pacon kaj feliĉon.

La kredoj, ideologioj kaj organizitaj religioj, stariĝas nin kontraŭ niajn najbarojn ; estas konfliktoj ne nur inter soci-medioj sed ankaŭ meze de ĉiu el ili. Ni devas kompreni, ke tiel longe dum ni identigos nin al iu lando, dum ni alkroĉiĝos al la sekureco, dum ni estos kondiĉitaj de dogmoj, estos konfliktoj kaj suferoj tiel en ni mem kiel en la tuta mondo.

Kaj poste stariĝas la tuta patriotisma afero. En kiuj momentoj ni sentas nin patriotoj ? Kompreneble, tio ne estas ĉiutaga emocio. Sed ĝin ni estas konstante instigataj senti per la klaslibroj, la gazetoj kaj aliaj propagandiloj, kiuj stimulas la rasan egocentrismon, laŭdante la naciajn heroojn kaj ripetante al ni, ke niaj lando kaj vivmaniero estas pli bonaj ol tiuj de aliaj. Tiu patriota sento nutras nian vantemon ekde junaĝo ĝis maljunaĝo.

La senĉese ripetata aserto, ke ni apartenas al iu religia aŭ politika grupo, ke ni estas anoj de tiu ĉi nacio aŭ de tiu alia, flatas niajn etajn egoojn, ŝveligas ilin kiel velojn, ĝis ni estas pretaj mortigi aŭ esti mortigitaj por nia lando, nia raso aŭ nia ideologio. Ĉio ĉi estas tiel stulta kaj tiel malmulte natura ! Ĉar homaj estaĵoj tiel pli gravas ol naciaj aŭ ideologiaj limoj.

La naciisma miskomprena spirito ĉie disvastiĝas kiel fajro. La patriotismon kulturas kaj lerte ekspluatas tiuj, kiuj celas pli da ekspansio, pli da regpovo, da riĉaĵoj, kaj ĉiu el ni partopre-

nas tiun procezon, ĉar ankaŭ ni volas ĉion ĉi. Konkeri teritoriojn kaj popolojn havigas novajn merkatojn por la produktoj kaj ankaŭ por la religiaj kaj politikaj ideologioj.

Tiujn manifestadojn de perforto, de malamo, ni devas observi per senantaŭjuĝa spirito, kiu identigas sin kun neniu lando, neniu raso, neniu ideologio, sed kiu provas malkovri la veron. Estas ĝojo vidi ion klare sen influo de nocioj kaj asertoj de aliuloj, eĉ se tiuj estas regantoj, fakuloj aŭ eruditoj. Tuj kiam ni konscias, ke patriotismo estas obstaklo al la homa feliĉo, ni ne plu devas lukti kontraŭ tiu falsa emocio : ĝi forlasis nin definitive.

Naciismo, patriota spirito, klas- aŭ ras-konscio estas egoaj aspektoj, do disigaj faktoroj. Fakte, ĉu nacio estas io alia ol aro da individuoj kune vivantaj pro ekonomiaj kialoj aŭ pro persona protekto ? Timo kaj sento pri akirado kaj samtempa memprotektado naskas la ideon pri « mia lando » kun ĝiaj limoj, ĝiaj doganoj, kiuj malebligas homajn fratecon kaj unuecon.

La deziro akiri kaj konservi, la avido identiĝi kun io pli granda ol ni, naskas la naciisman spiriton. Kaj tiu ĉi naskas la militojn. En ĉiu lando, la gvidantaro apogata de la Eklezioj stimulas la nacian vantemon kaj la disiĝemon. Naciismo estas malsano ; ĝi neniam povos starigi tutmondan unuecon. Malsano ne estas stadio al sano : resaniĝon ni bezonas.

Ĉar ni estas naciistoj, ĉiam pretaj defendi niajn suverenajn ŝtatojn, niajn kredojn kaj akirojn, tial ni estas daŭre armitaj. Riĉaĵoj kaj ideoj fariĝis por ni pli gravaj ol homaj vivoj, tiel ke malamikeco kaj perforto estas nia konstanta stato. Subtenante la suverenecon de nia lando, ni estas detruantaj niajn filojn ; kultante al ŝtato, kiu estas nur projekcio de ni mem, ni estas foroferantaj niajn infanojn por persona kontentiĝo. Naciismo kaj suverenaj ŝtatoj estas la kaŭzoj kaj la instrumentoj de milito.

Niaj sociaj institucioj ne povas evolui al tutmonda federacio, ĉar iliaj bazoj mem estas malbonaj. La parlamentoj kaj la eduksistemoj, kiuj favoras nacian suverenecon kaj insistas pri graveco de la grupo, neniam ĉesigos la militon. Ĉiu aparta grupo, kun ties registaro kaj regataro, estas konflikto-fonto. Tiel longe dum ni ne radikale modifos la nunajn interhomajn rilatojn, la industria progreso kondukos al konfuzo kaj iĝos instrumento de detruo kaj mizero ; tiel longe dum ekzistos perforto kaj tiraneco, trompado kaj propagando, ne realiĝos homa frateco.

Instruado, kiu formas nur mirindajn inĝenierojn, brilajn scienculojn, kapablajn entreprenestrojn, lertajn laboristojn, neniam povos unuigi subpremantojn kaj subpremitojn ; kaj ni povas konstati, ke nia eduksistemo, kiu favoras la multajn interhomajn malam- kaj kverel-kialojn, ne malhelpis la amasajn murdigojn, kiuj okazis nome de lando aŭ nome de Dio.

La organizitaj religioj, kun ties tempaj kaj spiritaj aŭtoritatoj, estas ĉiuj same nekapablaj havigi pacon al la homo, ĉar ankaŭ ili estas rezulto de nescio kaj timo, de niaj iluzioj kaj egoismo.

Aspirante al sekureco, sur tiu ĉi tero aŭ transe, ni kreas instituciojn kaj ideologiojn, kiuj garantias ĝin al ni ; sed ju pli ni luktas por havi ĝin, des malpli ni havos ĝin. La deziro esti en sekureco kreas nur disiĝojn kaj akrigas la antagonismojn. Se ni profunde komprenas tiun veron, ne nur parole aŭ intelekte, sed per nia tuta esto, tiam ni komencas radikale ŝanĝi la rilatojn kun niaj samuloj, en nia tutproksima ĉirkaŭantaro, kaj nur tiam ni povas realigi unuecon kaj fratecon.

Eluzite de ĉiuspecaj timoj, ni ĝenerale ege maltrankvilas pro nia sekureco. Ni esperas ke, danke al ia miraklo, ne plu estos militoj, dum ni senĉese akuzas la aliajn naciajn grupojn kiel militkulpajn, dum siavice ili mem akuzas nin respondeci

pri la ruinigoj. Kvankam milito estas tiel videble malbona al la socio, ni preparas nin por ĝi kaj enradikigas la militemon en la junulojn.

Sed ĉu milit-instruado havas lokon en eduko? Ĉio dependas de nia deziro, pri kio fariĝu niaj infanoj. Se ni volas fari el ili tre lertajn murdistojn, nepre necesas soldat-trejnado. Se ni volas disciplini ilin kaj servutigi iliajn spiritojn, se ni celas igi ilin naciistaj, kaj sekve malsolidaraj kun la tuta socio, militinstruado estas bona rimedo por atingi tion. Se ni ŝatas morton kaj detruon, soldata disciplino tutcerte gravas. La funkcio de generaloj estas koncepti kaj plenumi militplanojn; kaj se ni intencas konstante batali inter ni kaj ankaŭ kontraŭ niaj najbaroj, nu, ni ne hezitu: ni havu ankoraŭ pli grandan nombron da generaloj.

Se ni vivas nur por daŭrigi senfinajn luktadojn kontraŭ ni mem kaj kontraŭ aliuloj; se ni deziras pluigi sangelverŝadon kaj malfeliĉojn: nu, ni havu ankoraŭ pli da soldatoj, pli da politikistoj, pli da malamikoj. Kaj ĝuste tion ni faras. La moderna civilizo estas bazita sur perforto; ĝi do flirtas kun morto. Tiel longe dum ni kultos al perforto, perforto estos en niaj moroj. Sed se ni volas pacon, se ni volas sanajn rilatojn inter homoj, ĉu kristanoj aŭ hinduistoj, rusoj aŭ usonanoj, se ni volas, ke niaj infanoj estu integritaj homestaĵoj, tiam soldata trejnado estas netranspasebla obstaklo, erara rimedo por atingi tion.

Unu el la ĉefaj kialoj de malamo kaj malkonkordo estas la kredo, ke aparta klaso aŭ raso estas supera al alia. Infano ne havas ras- aŭ klaskonscion; tiun senton pri aparteco enradikigas la lerneja aŭ familia medio. Por li malmulte gravas, ke lia ludkunulo estas nigrulo aŭ judo, bramano aŭ nebramano, sed la premo de la tuta socia strukturo impresas kaj modlas lian spiriton, kiun ĝi senĉese influas.

Ankaŭ ĉi tie la problemo situas ne ĉe la infano, sed ĉe la plenkreskuloj, kiuj kreis sensencan medion el falsaj valoroj kaj apartaĵoj.

Kiun realan bazon ni havas por diferencigi la homestaĵojn ? Niaj korpoj povas malsimili laŭ strukturo kaj koloro kaj niaj vizaĝoj povas diferenci, sed sub la haŭto ni multe similas unu la alian : orgojloplenaj, ambiciaj, enviemaj, koleremaj, ĝuamaj, regavidaj... Forigu la etikedojn kaj ni restas tre nudaj ; sed ni ne volas alfronti nian nudecon, kaj tial insistas pri la etikedo – kio montras kiel malmulte maturaj, kiel reale infanecaj ni estas.

Por ebligi al infano maturiĝi libera de antaŭjuĝoj, oni devas unue detrui la proprajn antaŭjuĝojn kaj poste tiujn de la medio – kio signifas disrompi la strukturon de tiu frivola socio, kiun ni kreis. Hejme, ni povas diri al la infano kiel estas absurde havi ras- aŭ klaskonscion, kaj tiam li probable same opinios, sed kiam li vizitos la lernejon kaj ludos kun aliaj infanoj, li estos infektita de la disigemo. Kaj tio povas okazi inverse : la familio povas havi tradician, mallarĝan spiriton, kaj la lernejo pli larĝan. Ambaŭkaze, estas konflikto inter la familia kaj la lerneja medioj kaj la infano suferas ĝin.

Por sane varti infanon, por disvolvi ties sentkapablon ĝis ĝi ebligas al li vidi tra tiuj stultaj antaŭjuĝoj, ni devas starigi kun li tre intimajn rilatojn, ektrakti ĉiujn temojn, permesi al li ĉeesti inteligentajn konversaciojn, stimuli lian scivolon kaj malkontentemon (kiun li jam posedas) kaj tiel helpi lin malkovri per si mem tion veran kaj tion malveran.

Konstanta esploremo kaj vera malkontentemo naskas inteligenton ; sed plu teni ilin vekitaj estas ege malfacila, ĉar la plimultaj personoj ne volas, ke iliaj infanoj havu tian inteligenton : estas tre maloportune vivi kun iu, kiu senĉese pridubas ĉiujn tradiciajn valorojn.

Kontrolo de la instruado fare de la Ŝtato estas vera plago. Ne eblas esperi stariĝon de paco kaj ordo en la mondo tiel longe dum edukado estas je la servo de ŝtatoj kaj eklezioj. Kaj tamen la registaroj pli kaj pli zorgas pri la infanoj kaj ties

estonteco, kaj kiam ili mem ne faras tion, tiam rolas kiel edukistoj la organizitaj religioj.

Tiu kondiĉado al la infana spirito cele adapti ĝin al difinita ideologio, politika aŭ religia, kreskigas la interhoman malamikecon. En socio starigita sur konkuremo ne povas esti frateco ; kaj naskos ĝin neniu reformo, neniu diktaturo, neniu edukmetodo.

Tiel longe dum vi restos novzelandano kaj mi hindo, estos absurde paroli pri homara unueco. Kiel ja ni povas renkontiĝi kiel homestaĵoj, se vi en via lando kaj mi en la mia, ni konservas niajn respektivajn religiajn antaŭjuĝojn kaj niajn diferencajn sintenojn pri la ekonomiaj problemoj ? Kiel povas esti frateco dum la patriotismo disigas homon de homo, dum milionoj da personoj troviĝas en mizero kaj aliaj en abundo ? Kiel povas ekzisti homara unueco dum kredoj disigas nin, dum iuj grupoj superregas aliajn, dum la riĉuloj estas potencaj kaj la malriĉuloj avidaj je tiu potenco, dum la bienoj estas malegale dispartigitaj, dum iuj estas bone nutrataj kaj homamasoj suferas malsaton ?

.........................................................................................

Ĉu ni povas atingi pacon per perforto ? Ĉu pacon ni povas havi progresive, per la malrapida tempprocezo ? Amo certe ne estas afero pri ekzercado aŭ tempo. La du lastaj militoj estis, mi kredas, batalo por la demokratio, kaj nun ni preparas nin al pli vasta kaj pli detrua milito kaj estas malpli da libero ol antaŭe. Sed kio okazus, se ni liberigus nin de la obstakloj, kiuj baras la vojon al inteligento, nome aŭtoritato, kredoj, naciismo kaj hierarkiemo ? Ni estus personoj senjugaj, t .e. homoj en rektaj rilatoj unuj kun la aliaj, kaj tiam, eble, estus amo kaj kompato.

Se ni opinias, ke vivfeliĉo indas nian pripenson, nian zorgon, nian amemon, tre gravas, ke ni konu nin mem. Kaj se ni deziras konstrui vere kleran socion, necesas al ni edukantoj, kiuj

komprenu, kio estas integriĝo kaj sekve kapablu transdoni tiun komprenon al la infano. Tiel ili devus esti danĝero por la *nuntempa socistrukturo*, kaj, cetere, edukisto kiu, konsciante la plenan signifon de paco, ekmontrus al la infano ĉion implicitan de naciismo kaj la stultegon de milito, tiu rapide perdus sian oficon. Ĉar tion ili scias, la plimultaj edukistoj preferas kompromison kaj tiel kontribuas al pluregado de la nuna ekspluata kaj perforta sistemo.

Por malkovri la veron, unue necesas esti liberigita de la kutimaj konfliktoj okazantaj samtempe en la individuo kaj inter li kaj la ekstera mondo. Kiam ni ne plu konfliktas interne, ni ne plu konfliktas ekstere. Estas la interna konflikto, kiu, projekciite eksteren, fariĝas tutmonda.

Milito estas la spektakla kaj sanga bildo de nia ĉiutaga vivo. Ĝi estas precipitato de niaj ĉiutagaj vivoj. Kaj sen transformiĝo de ni mem, nepre ĉiam estos rasaj kaj naciaj antagonismoj, infanecaj ideologiaj kvereloj, plu multiĝos la soldatoj, la salutoj al flagoj kaj la sennombraj perfortaĵoj, kiuj kontribuas krei la organizitan krimon.

En la tuta mondo eduko fiaskis, ĝi produktis pli kaj pli grandajn mizerojn kaj detruojn. La registaroj nun dresas la junulojn iĝi la soldatoj kaj teknikistoj, kiujn ili bezonas ; oni trudas kaj pluigas la soldatiĝon kaj la antaŭjuĝojn. Tion konsiderante, ni devas demandi nin pri la signifo de ekzistado, kaj ankaŭ pri la signifo kaj celo de niaj propraj vivoj. Necesas malkovri bonajn rimedojn por krei novan medion ; ĉar la medio povas fari el la infano perfortulon, sensentan fakulon, aŭ helpi lin iĝi sentema homestaĵo. Necesas krei tutmondan registaron radikale diferencan de ĉiuj, kiujn ni havas, kiu ne baziĝos sur naciismo, sur ideologioj, sur perforto.

Ĉio ĉi postulas, ke ni komprenu nian respondecon unu al la alia, en niaj reciprokaj rilatoj. Necesas amo en niaj koroj ; ni

ne bezonas tiom da erudicio kaj scio. Ju pli granda estos nia amo, des pli profunda estos ĝia influo al la socio. Sed ni estas nuraj cerboj kaj senkoraj ; ni kulturas intelekton kaj malŝatas humilon. Se ni reale amus niajn infanojn, ni volus savi kaj protekti ilin, ni ne permesus, ke ili estu foroferataj en militoj.

Mi kredas, ke efektive ni volas armilojn ; ni ŝatas spekti la militistan forton, la uniformojn, la ritojn, la drinkaĵojn, la bruon, la perforton. Nia ĉiutaga vivo estas miniatura bildo de tiu supraĵa brutalo kaj ni detruas nin reciproke pro envio kaj senpripenso.

Ni volas esti riĉaj ; kaj ju pli ni estas tiaj, des pli brutalaj ni iĝas, eĉ kiam okazas, ke ni donacas grandajn monsumojn al bonfaraj kaj edukaj fondaĵoj. Priŝtelinte la viktimon, ni redonas al ĝi iom el la rabaĵo kaj tion ni nomas filantropio. Ĉu ni konscias pri la katastrofoj, kiujn ni preparas ? Ni vivas ĉiun tagon kiel eble plej rapide kaj supraĵe, kaj forlasas al la registaroj, al la ruzaj politikistoj, la gvidadon de niaj vivoj.

Ĉiuj suverenaj ŝtatoj nepre devas prepari nin al milito ; kaj estas neniu escepto. Por ke ĝiaj civitanoj estu bonaj militistoj, por prepari ilin efike plenumi sian devon, la ŝtato evidente devas superregi ilin. Ili devas kutimi agi kiel maŝinoj, esti senkompate eficientaj... Suverena ŝtato ne volas, ke ĝiaj civitanoj estu liberaj, memstaraj. Ĝi do superregas ilin per ĉiuj eblaj rimedoj, propagando, misinterpretadoj de historio, ktp... Jen kial eduko pli kaj pli estas instrui « kion pensi », kaj ne « kiel pensi ». Se nia penso estus sendependa de la reganta politika sistemo, ni estus danĝeraj ; liberaj institucioj povus formi pacistojn aŭ oponantoj al la regimo.

.........................................................................

Ni bonvolas etan reformon tie kaj tie ĉi, sed la plimultaj el ni timas faligi la nunan socion kaj konstrui tute novan strukturon, ĉar tio ĉi postulus radikalan transformiĝon de ni mem.

Aliflanke troviĝas tiuj, kiuj strebas estigi perfortan revolucion. Kontribuinte konstrui la sociordon kia ĝi estas, ili deziras nun organizi perfektan socion. Sed tiaj, kiaj ni estas, ĉu ni kapablas organizi perfektan socion, dum ni naskis la nunan laŭ nia bildo ? Kredi, ke pacon oni povas havi per perforto, tio estas foroferi la nunon por estonta idealo, kaj tiu strebado al justa celo per falsaj rimedoj estas unu el la kaŭzoj de la nuntempa ruiniĝo.

Se ni devas radikale ŝanĝi la interhomajn rilatojn, kiuj alportis al la mondo tiom da suferoj, nia ununura tasko estas transformi nin per memkono. Kaj tiel ni revenas al la centra punkto, la individuo. Sed ni flankenmetas tion kaj kulpigas la registarojn, la religiojn, la ideologiojn. La registaro estas kio ni estas ; la religioj kaj ideologioj estas nur niaj projekciitaj bildoj ; kaj tiel longe dum ni ne ŝanĝiĝos, estos nek vera eduko nek paco.

# LIBERO KAJ LERNADO

Mi ŝatus komenci ĉi-matene, altirante vian atenton pri la eksterordinara graveco de libero. La plimultaj el ni ne volas esti liberaj. Ni havas niajn familiojn, niajn respondecojn, niajn devojn kaj el tio konsistas niaj ekzistoj. Ni vivas ĉirkaŭitaj de sociaj leĝoj, moralkodoj, ni portas niajn ŝarĝojn da ĉiutagaj malfaciloj kaj problemoj, kaj se ni povas trovi ajnan konsolon, rimedon por eskapi tiujn konfliktojn kaj tiujn malglataĵojn, ni facile kontentiĝas. La plimultaj el ni volas esti liberaj nenia-maniere, en nenia direkto, je nenia profundo, kaj tamen ŝajnas al mi, ke unu el la esencaj vivaferoj estas malkovri per si mem kiel esti plene, totale libera.

Sed ĉu iel eblas al la homa spirito, tiel peze kondiĉita, tiel strikte truddevigata al siaj ĉiutagaj taskoj, tiel plena je timoj kaj angoroj, tiel malcerta pri estonteco kaj tiel konstanta en sia bezono je sekuro – ĉu eblas al tia spirito estigi en si mem radikalan transformiĝon, kiu povas okazi nur en plena libero ?

Mi opinias, ke ĉiu el ni devus reale interesiĝi pri tiu demando, almenaŭ en la daŭro de tiuj konversacioj. Ni devus, ne nur parole sed esplorante la sencon de l' vortoj por iri profunde en nin mem, esplori ĉu eblas al ni esti vere liberaj. Sen libero neeblas malkovri, kie estas vero kaj kie eraro ; sen libero, la vivo ne havas profundon ; sen libero ni estas la sklavoj de ĉiuj influoj, de ĉiuj sociaj trudoj, de la sennombraj postuloj, kiuj ade okupas nin.

Ĉu oni povas, kiel individuo, reale penetri sin mem, senkompate fosi en si mem por esplori ĉu vere eblas, por ĉiu el ni, esti plene libera ? Evidentas, ke povas okazi ŝanĝiĝo en ni nur se ni estas liberaj. Kaj ni devas ŝanĝiĝi ; ne supraĵe, ne detranĉante kelkajn stumpojn tie aŭ aliloke, sed estigante

radikalan transformiĝon en la strukturo mem de nia penso kaj de nia psiko. Jen kial mi sentas, ke tiel gravas paroli pri ŝanĝiĝo, pridiskuti tiun demandon kaj vidi ĝis ĉiu el ni povas penetri ĝin.

Ĉu vi scias, kion signifas por mi ŝanĝiĝo ? Ŝanĝiĝi estas pensi laŭ tute malsama maniero ; estas naski spiritostaton en kiu neniam estas iu ajn angoro, iu ajn konfliktosento, iu ajn lukto por atingi ion ajn, por esti aŭ por fariĝi io. Tio estas komplete seni je ajna timo. Kaj por kompreni kion signifas liberi je ajna timo, mi opinias, ke necesas kompreni el kio konsistas la rilatoj inter majstroj kaj disĉiploj kaj el tio malkovri kio estas lerni.

Ĉi tie ne estas majstro, kaj sekve ne estas disĉiploj. Ni ĉiuj estas lernantaj. Necesas do, ke vi plene senigu vin je la ideo, ke tie ĉi iu vin instruos aŭ donos al vi kondutregulojn. Kio signifas, ke la rilatoj inter vi kaj la parolanto estas tute alispecaj. Ni estas lernantaj, sed ne estas instruigantaj nin. Se reale vi komprenas, ke tie ĉi vi ne estas por ke iu ajn instruu vin, ke ne estas instruanta majstro, nek savanto por vin savi, nek guruo por diri al vi kion fari – se reale vi komprenas tiun fakton, tiam vi devas ĉion fari per vi mem, kaj tio postulas intensan energion.

La energio estas forigita, fuŝita, tute perdita, kiam establiĝas rilatoj de majstro al disĉiplo ; do dum tiuj konversacioj, mi esperas, ke neniu havos la impreson, ke tiaj rilatoj povas ekzisti ĉi tie. Estus vere mirinde, se ni povus forigi tion komplete, por ke restu nur tiu movado kiu estas la ago lerni.

Ĝenerale, ni lernas per studado, per libroj, per spertado aŭ instruigante nin pere de iu. Tio estas la kutimaj lernrimedoj. Ni donas al memoro kion fari kaj kion ne fari, kion pensi kaj ne pensi, kiel senti, kiel reagi. Per sperto, studo, analizo, per eksperimento, per introspektaj ekzamenoj, ni staplas sciojn kiel memoron, kaj tiu memoro reagas al instigoj kaj petoj, kio

ebligas al ni pli kaj pli instruiĝi. Tiu procezo estas al ni tute kutima : estas nia nura lernmaniero. Mi ne scipovas piloti aviadilon, do mi lernas. Oni instruas min, mi akiras sperton, kies memoro estas konservata, kaj poste mi pilotas. Tiu procezo estas la nura konata de la plimulto el ni. Ni lernas per studado, spertado, ni nin instruas, tio lernata estas donata al memoro kiel scioj, kaj tiuj scioj funkcias ĉiufoje kiam estas instigo aŭ ĉiufoje kiam ni havas ion por fari.

Nu, mi opinias, ke ekzistas tute malsama maniero lerni kaj mi tuj iom parolos al vi pri ĝi ; sed por ĝin kompreni kaj por lerni laŭ tiu malsama maniero, oni devas esti tute liberigita el aŭtoritato ; se ne, oni estas nur instruata kaj oni ripetas kion oni aŭdis. Jen kial tre gravas kompreni la naturon de aŭtoritato. Aŭtoritato malhelpas lerni, lerni alimaniere ol per akumulado de scioj kiel memoro. Memoro ĉiam respondas per kliŝoj ; tie estas neniu libero. Persono superŝarĝita per scioj, kiu subfleksiĝas pro la ŝarĝo de la lernitaĵoj, neniam estas libera. Ĝi povas esti eksterordinare klera, sed tiu sci-akumuligo malhelpas ĝin esti libera kaj, sekve, ĝi ne kapablas lerni.

Ni amasigas ĉiuspecajn sciojn – sciencajn, fiziologiajn, teknikajn, ktp – kaj tiuj scioj estas necesaj por la fizika bonstato de l' homo. Sed ni amasigas sciojn ankaŭ por nin ŝirmi, por glate funkcii, por ĉiam agi en la limoj de niaj propraj sciaĵoj, kaj tiel senti nin sekuraj. Ni volas neniam esti en malcerto ; ni timas malcerton kaj sekve ni multobligas niajn sciojn. Pri tiu psika akumulo mi parolas ; estas ĝi, kiu komplete blokas la liberon.

Do, tuj kiam oni ekdemandas sin pri kio estas libero, oni devas pritrakti ne nur la aŭtoritaton, sed ankaŭ la scion. Se vi kontentiĝas, ke oni vin instruas, se vi nur akumulas kion vi aŭdis, kion vi legis kaj viaspertajn rezultojn, vi ekkonscios, ke neniam vi estos liberaj, tial ke vi funkcias en la kadro de tio konata. Kaj, fakte, okazas tio al la plimulto el ni ; nu, kion ni faru ?

Ni povas vidi kiel funkcias la psiko kaj la cerbo. La cerbo estas animalaĵo, progresiva, produkto de la evoluo, kiu vivas kaj funkcias inter la muroj de sia propra sperto, de sia scio, de siaj esperoj kaj de siaj timoj. Ĝi ĉiam estas, senĉese, sin protektanta kaj sin ŝirmanta – kaj cergagrade ĝi estas devigata tion fari, se ne, ĝi rapide estus detruita. Al ĝi necesas ia sekurnivelo, do ĝi ekkutimas amasigi siaprofite ĉiuspecajn sciaĵojn., obei ĉiuspecajn regularojn, kaj krei al si konformismon al kiu ĝi adaptas sian vivon, tiel ke ĝi estas neniam libera. Se oni observis sian propran cerbon kaj ĝian funkcimanieron, oni konscias tiun konformisman ekzistprocedon, en kiu estas neniu spontano.

Nu, kion signifas lerni ? Ĉu ekzistas malsama lernmaniero, kiu ne estas amasiga, kiu ne fariĝas simple fono el memoro kaj scio, fabriko de modeloj nin katenantaj ? Ĉu ekzistas lernmaniero, kiu ne iĝas ŝarĝo, kiu ne kripligas la spiriton sed male donas al ĝi liberon ? Se vi iam faris al vi tiun demandon, vi ekkonscias, ke oni devas provi scii kial la spirito alkroĉiĝas al aŭtoritato. Ĉu tiu de spirita majstro, ĉu de savanto, de libro aŭ tiu de la propra sperto, kiel la spirito alkroĉiĝas al aŭtoritato ?

Aŭtoritato prezentiĝas en multaj aspektoj. Estas la aŭtoritato de la libroj, la aŭtoritato de la eklezio, la aŭtoritato de la idealo, la aŭtoritato de via propra sperto kaj la aŭtoritato de la de vi amasigita scio. Kial oni alkroĉiĝas al ĝi ? Ĉiu tekniko nepre havas siajn aŭtoritatojn, tio estas simpla kaj evidenta. Sed ni parolas pri la psika stato de l' spirito. Se estas flankenmetita ĉiu demando pri teknika kompetento, kial la spirito alkroĉiĝas al la aŭtoritato laŭ la psikologia senco ?

Evidentas, ke tio estas ĉar ĝi timas malcertecon, malsekurecon ; ĝi timas tion nekonatan, la morgaŭajn neatenditaĵojn. Kaj ĉu povas ni, vi kaj mi, vivi sen ajna aŭtoritato, en la senco de superregado, asertado, dogmismo, agresemo, sukcesvolo, deziro pri famo, aspiro esti persono ? Ĉu ni po-

vas vivi en ĉi tiu mondo – iri al nia laboro, ktp – en stato de plena humilo ? Estas malfacile scii tion, ĉu ne ? Sed mi opinias, ke nur en tiu stato de plena humilo – kio estas la stato de spirito ĉiam akceptanta nescii – oni povas lerni. Alie, oni ĉiam estas akumulanta, kaj sekve ĉesanta lerni.

Ĉu ni povas do vivi de tago al tago en tiu stato ? Ĉu vi komprenas tiun demandon ? Certas, ke reale lernanta spirito havas neniun aŭtoritaton. Nek provas havi ĝin. Pro la fakto, ke ĝi ade estas en stato lerni, ne nur pri eksteraĵoj, sed ankaŭ pri kio enestas en ĝi ; ĝi apartenas al neniu grupo, al neniu societo, al neniu raso aŭ kulturo. Se oni estas senĉese lernanta pri ĉio, sen amasigo, kiel povas esti ajna aŭtoritato, majstro ? Kiel esti ies disĉiplo ? Kaj tio estas la nura vivmaniero : ne lernante el la libroj, sed klarigante al si per la deziroj, kiujn oni havas, per la internaj movoj de la penso, per tio, kio oni estas. Tiam la spirito estas ĉiam freŝa, ĉiun aĵon gi vidas novmaniere kaj ne per rigardo eluzita de la scio, de la sperto, de tio, kion ĝi lernis. Se oni komprenas tion reale, profunde, ĉiu aŭtoritato ĉesas, kaj la parolanto ne plu havas gravecon.

La eksterordinaran staton, kiun malkovras la vero, la vastego de l' realo, aliulo ne povas doni al vi. Ne estas aŭtoritato, ne estas gvidanto. Vi devas malkovri ĝin per vi mem kaj tiel meti iom da simpla saĝo en tiun ĥaoson nomitan vivo. Tiun vojaĝon oni sola devas entrepreni, sen kunuloj, sen edzo aŭ edzino, sen libroj. Kaj ĝin oni povas entrepreni nur kiam oni reale vidas, ke oni devas marŝi tute sola ; tiam oni **solas** ; ne pro amarsento, ne pro ciniko, ne pro malespero, sed ĉar oni konscias, ke absolute necesas esti tute sola. Estas tiu fakto, kaj la percepto pri tiu fakto, kiuj favordonas al vi la liberon marŝi sola. La libro, la savanto, la majstro ? Estas vi mem. Tiam vi devas vin esplori, vin lerni, kio ne signifas amasigi sciojn pri vi mem, nek, per tiuj scioj, observi la movojn de via penso. Ĉu vi komprenas ?

Por lerni vin mem, por vin koni, vi devas observi vin kun freŝo, en plena libero. Vi nenion povas lerni pri vi, se vi nur aplikas sciojn, t.e. se vi nur ekzamenas per vortoj kion vi lernis per instruanto, per libro aŭ per via propra sperto.

La « vi mem » estas eksterordinara ento, kompleksa kaj esenca, ege viva, ade sanĝiĝanta kaj trapasanta ĉiuspecajn eksperimentojn. Estas kirliĝo kun ega energio, kaj por lernigi al vi kion ajn pri ĝi, ekzistas neniu kapabla, neniu ! Jen la unua afero, kiun oni devas ekkonscii. Kaj kiam oni ekkonsciis tion, kiam oni reale rimarkis kiel vera tio estas, tiam oni jam estas liberigita el peza ŝarĝo: oni ne plu petas konsilojn pri kio farota, kaj jam tieas la eksterordinara parfumo de l' libero.

Do, mi devas koni min, ĉar tiom longe kiom mi ne konos min, ne estos fino al konfliktoj, al timo, al malespero, estos nenia kompreno pri la morto. Kiam oni komprenas sin, oni komprenas ĉiujn homestaĵojn, ĉiujn homajn interrilatojn. Kompreni sin estas lerni la fizikan korpon kaj la diversajn reagojn de l' nervaro ; estas konscii ĉiun pensmovon ; estas kompreni kion oni nomas ĵaluzo, krudeco, kaj malkovri kio estas korinklino, kio estas amo : kio estas la tuteco de l' « mi », de l' « vi ».

Tiu procezo ne konsistas en starigo de la sci-fundamentoj : lerni estas de momento al momento, ĝi estas movo per kiu oni sin observas senfine, neniam kondamnante, neniam juĝante, neniam taksante, sed nur observante. Tuj kiam oni kondamnas, interpretas aŭ taksas, oni havas modelon pri scio, pri sperto, kaj tiu modelo malhelpas al ni lerni.

Transformiĝo ĉe la radiko mem de la penskapablo eblas, nur kiam oni komprenas sin mem ; kaj necesas tia transformiĝo ; necesas tiu ŝanĝiĝo. Mi ne uzas la vorton « ŝanĝiĝo » en la senco de la de ni spertitaj influoj, venantaj de la socio, de la klimato, de la sperto aŭ de aliaj premfortoj. La premoj kaj influoj povas nur puŝi nin en iun direkton. Mi paro-

las pri ŝanĝiĝo okazanta sen fortostreĉo, pro la fakto ke oni komprenas sin mem. Estas granda diferenco inter ambaŭ : inter la ŝanĝiĝo pro premdevigo kaj tiu kiu okazas spontane, nature, libere.

Mi pensas, ke nia vivo estas tiel supraĵa. Ni scias multon, ni akiris multe da sperto, ni povas paroli tre lerte, kaj efektive ni ne havas profundon. Ni vivas supraĵe kaj tamen provas fari el tiu supraĵa vivo tre seriozan aferon. Sed mi parolas pri seriozo kiun oni ne atingas per supraĵa nivelo, pri seriozo kiu penetras la profundojn mem de l' estaĵo. La plimultaj el ni ne estas reale liberaj kaj mi opinias, ke tiom longe kiom ni ne estas liberigitaj el niaj zorgoj, niaj kutimoj, de niaj psikaj malfortoj, de la timo – niaj vivoj plu restas ege kavaj kaj malplenaj. En tiu stato mem ni maljuniĝas kaj mortas.

Nu, dum tiuj tri semajnoj, ni esploru ĉu ni povas rompi, pasi tra tiun supraĵan ekzistadon, kiun ni tiel zorge kulturis, kaj fosi en io multe pli profunda. Tiun fos-procezon ni tributas al neniu aŭtoritato ; ne temas, ke iu diru al ni kiel agi, ĉar ekzistas neniu povanta diri tion al ni. Kion ni venis fari tie ĉi, tio estas lerni kune kio estas vera en ĉi tio ; kaj tuj kiam oni komprenas reale kio en ĝi estas vera, ĉesas tiu serĉado pri aŭtoritato. Tiam oni bezonas neniun liberon, oni vizitas neniun preĝejon aŭ templon, oni ĉesis esti disciplo. Ekzistas granda belo, granda profundo, granda amo al libero, pri kiuj nenion ni scias, ĉar ni ne estas liberaj. Do, komence nia atento devas, ŝajnas al mi, instigi nin demandi al ni pri tiu libero, ne nur per parola analizo, sed liberigante nin de la vorto.

Konsideru tiun tujan kazon : tre varmas tie ĉi. Ni faris ĉion eblan por ke tiu tendo estu relative malvarmeta. Ni ne povas kunveni pli frue ĉar multaj personoj venas el malproksimo. Do ni devas konsenti, ke tiu varmo estas parto de neevitebla malkomforto. Nu, necesas disciplini sin, ne per trudoj aŭ strikta kontrolo, sed komprenante kaj lernante kio estas disciplino. Ni povas konscii tiun varmon kaj ne suferi pro ĝi, ĉar

nia interesiĝo, nia enketo, kiu estas la movo kiun ni nomas « lerni », estas multe pli grava ol la varmo kaj la korpa malkomforto. La fakto lerni postulas disciplinon, ĝi mem estas disciplino. Ĝi entenas neniun trudon, neniun artefaritan kontrolon. La situacio estas jena : Mi volas aŭskulti, ne nur tion diratan, sed ankaŭ ĉiujn reagojn, kiujn la vortoj vekas en mi ; mi volas esti konscia pri ĉiu movo de mia penso, pri ĉiu sento, ĉiu gesto. Tio en si estas eksterordinare fleksebla disciplino.

Do ŝajnas al mi, ke la unua malkovrota afero estas, ĉu vi – kiel homa estaĵo vivanta en aparta kulturo aŭ komunumo – reale bezonas liberon same kiel vi bezonas nutraĵojn, seksajn interrilatojn, komforton. Kaj ankaŭ necesas, ke vi sciu kiel foren kaj kiel profunden vi intencas iri por esti liberaj. Mi kredas ke nur tion ni povas fari en unua kunveno – aŭ prefere, dum tiuj tri semajnoj, ĉar nur tion ni povas partopreni : tion kaj ne alion. Ĉu vi komprenas ? Ĉio cetera iĝas sentimentaleco, bigoteco, emociemo, kaj estas tro infaneca. Sed se vi kaj mi estas reale serĉantaj, demandantaj nin pri kio estas libero, kaj lernantaj ; se, resume, ni estas liberaj, ni ĉiuj povos partopreni en tiu abundo.

Kiel mi diris komence, tie ĉi ne estas instruanto kaj ne estas disĉiploj. Tie ĉi ni ĉiuj estas lernantaj sed ne pri la parolanto nek pri niaj najbaroj. La « vin mem » vi estas nun lernantaj, kaj se vin vi lernas, vi estas la parolanto, vi estas via najbaro. Se vin vi lernas, vi povas lerni vian najbaron. Alie vi ne povos kaj ĉio reduktiĝos al vortoj. Vi ne povas ami vian najbaron, se vi havas konkuremon. Nia tuta strukturo socia, ekonomia, politika, morala, religia, estas bazita sur konkuremo kaj samtempe ni diras, ke ni devas ami nian najbaron. Ĉi tio ne eblas ĉar kie ekzistas konkuremo, tie ne povas esti amo.

Por kompreni kio estas amo, kio estas vero, libero necesas, kaj neniu povas doni ĝin al vi. Vi devas malkovri ĝin per vi mem, per peniga laboro.

# MEMKONO

Ni kutimas uzi la tempon kiel faktoron por sukceso : mi estas tio ĉi kaj mi iĝos tio. Estas intervalo inter « kio estas » kaj « kio devus esti ». Ni diras, ke realigi tion, kio devus esti, necesigas tempon, ke oni por tio bezonas multajn tagojn, jarojn, aŭ multajn reenkarniĝojn, kiel oni kredas en Oriento.
Tiu « kio mi estos » estas projekcio de tio, kio mi estas, aŭ la inverso de tio, kio mi estas, en kontraŭo kun kio estas.

Inter « kio estas » kaj « kio devus esti » estas intertempo, dum kiu multaj faktoroj intervenas. La « kio devus esti » ne estas io statika, ĉar estas aliaj faktoroj, kiuj ĉiam agas. Ĉiuspecaj influoj, premoj, ŝanĝiĝoj, intervenas en la intervalo, kaj sekve « kio devus esti » estas senĉese modifata ; kaj ankaŭ « kio estas » konsiderinde ŝanĝiĝas.

Tio, « kio devus esti », tute ne gravas ; idealo, celo, intenco, espero pri sukceso ne havas sencon, ĉar ili estas imagaj. Ĉar nur ideoj, ili estas sen realeco. Tio reala estas tio, kio estas. Mi estas malfeliĉa, mi suferas, mi estas emociita. Jen la nura grava faktoro, kaj la tempo ne helpos kompreni « kio estas ». La tempo estas nur rifuzo, prokrasto, fuĝo en la nerealon. Por kompreni « kio estas », ni ne devas hipoteki la estontecon. Tio signifas, ke ni devas tuj ekatenti la problemon pri « kio estas », per nia tuta esto, sed tion ni ne deziras fari.

Ni diras : « Tion mi faros morgaŭ ». Ni estas timemaj, mizeraj, malfeliĉaj, ĵaluzaj ; sed ni ne kuraĝas diri : « Mi deziras tuj ĉesigi la ĵaluzon ». Ni deziras malkovri kiel ĉesigi ĝin iam aŭ aliam, kaj tiel la tempo fariĝas rimedo eskapi tion, kio estas, ĉar ĝi naskas malordon kaj ne ordon, tio estas facile komprenebla.

Kompreni ĉion ĉi, estas koni sin. Memkono estas nenio eksterordinara, ĝi estas la percepto pri kio okazas en ni. Mi estas en mizero, mi estas maltrankvila, frustraciita, en malespero. Ĉu vi ne konas tian staton ? Tiam kio okazas ? Mi pensas pri morgaŭo kaj en ĝin mi projekcias tion « kio devus esti », por eskapi tion, kio estas, aŭ mi replonĝas en la pasintecon. Hodiaŭ mi malsanas, sed mi bonfartis en la pasinteco, kaj tiel mia spirito rememoras kion mi nomas sano, kaj mi deziras retroviĝi en tiu stato. Premo de tiuj memoraĵoj estigas en mi maltrankvilon, streĉiĝon. Dum, se mi ne remaĉas la memoraĵojn de l' pasinteco, se sufiĉas al mi la nuna fakto, nome ke mi estas malsana, se mi ne permesas al la penso interveni en mia organismo, kun la pezo de la bedaŭroj, tiam la organismo naskos siajn proprajn fortojn por resaniĝi.

Kompreni ĉion ĉi estas parto de memkono. Tio ne estas trudita memkono, tio estas kompreni per vi mem la procezon de penso, de la ago pensi, de la tuta strukturo de via esto. Kaj tio ne estas afero pri tempo. Mi ne diras : « Mi komprenos min iom post iom, tagon post tago, memkono venos progresive. » Ĝi neniam venas progresive. Vi devas vidi la « moi »n komplete, kun ĉiuj ties konfliktoj ; kaj ĝin oni povas vidi nun, ne morgaŭ. Por vidi ĝin entute, vi devas uzi vian tutan energion.

# PENSOJ

Unu el la danĝeroj naskataj de disciplino, estas ke la sistemo fariĝas pli grava, ol la homestaĵoj, kiuj estas enfermitaj en ĝi.

Konformiĝo kaj obeo ne havas lokon en vera eduko.

La gepatroj, kiuj amas siajn infanojn, ne estas naciistoj. Ili identiĝas kun neniu lando ; ĉar la kulto al ŝtato naskas la militon, kiu mortigos aŭ kripligos iliajn filojn. La gepatroj, kiuj amas siajn infanojn, scias kiel sinteni rilate la posedaĵojn ; ĉar la avido donis al tiuj ĉi falsan kaj egan valoron, kiu estas nun detruanta la mondon. La gepatroj, kiuj amas siajn infanojn, apartenas al neniu ajn organizita religio ; ĉar la dogmoj kaj kredoj dividis la homojn en malamikajn grupojn ; ili naskis malamikecon inter homo kaj homo. La gepatroj, kiuj amas siajn infanojn, forĵetas envion kaj kverelojn, kaj eklaboras por radikale ŝanĝi la nunan socian strukturon.

Vera eduko celas la individuan liberon, ĉar nur ĝi povas starigi kunlaboradon inter individuo kaj kolektivo.

Kion ni nomas religio, tio estas nur organizita kredo, kun akompano de dogmoj, ritoj, misteroj kaj superstiĉoj. Vera religio estas la kulturo de libero kaj la strebado al vero.

Por krei novan socion, ĉiu el ni devas esti vera mastro, kio signifas, ke li devas esti samtempe la disciplo kaj la mastro. Necesas, ke ni memedukiĝu.

ENHAVO


* *Krishnamurti (enkonduko)*
Rubén Feldman González ...1

* **EDUKO KAJ VIVSIGNIFO**
(el la libro "Pri edukado") trad. RFG kaj Kribo ...3

- Vera eduko (trad. RFG kaj Kribo) ...8
- Eduko kaj paco (trad. Kribo) ..18

* **LIBERO KAJ LERNADO** (trad. Kribo)
(Unua konversacio en Saanen, Svisio, 1964) ..29

* **MEMKONO** (trad. Kribo)
~~(el "La Homo kaj ĝia bildo"~~, 5a konversacio en Parizo, 1965) ..37

* **PENSOJ** (trad. Kribo) ..39



Presis: Baudé - FR 47470 Beauville